HUNGARA VIVO

2
1979
11,- Ft

KOMENCU ĈE SKALA!

NI ATENDAS VIN

de la 8-a horo ĝis la 19-a horo en nia sekcio de multspecaj industri–varoj

de la 7-a horo ĝis la 20-a horo en nia nutraĵ–sekcio

SKÁLA

Kliento–servo: 850–850

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII. Kenyérmező u. 6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193 H–1368
Aperas dumonate
XIX. jaro 1979. Nro 2
(84)

ENHAVO

Szenes, I.: Intervjuo kun financministro D-ro Lajos *Faluvégi* 42
Goĥstein, V.: Esperanto teatro en Leningrado 44
Benczik, V.: Kiel hungaroj vojaĝas? 45
Publika letero (P.A.*Rados*) 46
Benczik, V.: Vizite ĉe nordaj parencoj 48
Nagy, L.: Kiu transportos la amon (P.A.*Rados*) 48
Bécs, E.: La 8a de Majo 1945 48
Kapitány, L.: Proteinoj el verda vegetaĵo 49
Halász, Z.: Ĉapitroj el la historio de la hungara popolo 8. (VHZS) 50
Giorgi, Aldo de: Refoje pri teatro 52
V.B.: Aŭtomobil-produktado – sen aŭtomobil-fabriko 53
Csák, Gy.: En ŝtrumpetoj (K.*Kalocsay*) 54
József, A.: Jam dumiliarda... (M. Fejes) 55
Nervi, M.: Al Kalocsay 55
Francis, John Islay: Ĝeraldina 56
Gergely, M.: Éva Hajós 57
Farkas-Tatár, É.: Panoramo 60
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 62
Dresen, H.: Kelkaj rememoroj pri Kalocsay 63
Tófalvi, É.: Historio de nia amikeco 64
D-ro *László*, F.: La granda inundo en urbo Szeged en jaro 1879 (A.P.) 66
Bálint, Sz.: Turisma vojaĝo sur la meza maro 73
Esperanto àranĝaĵoj en Hungario 74
Novaĵoj: Kampanjo inter sportistoj relanĉita; Peto el Lahti; Simpozio pri Eŭropa lingvo 74
Uspienski, J.: Esperanto-libro por kultura datreveno de UNESCO 75
D-ro *Berényi*, Zs.: Hungaraj memoraĵoj en la urbo Gdansk 75
Recenzoj de V. *Benczik*, G. *Mihalkov* 76
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 79
Krucenigmo 79
Korespondi deziras 80

Kovrilo: Printempo en Buják. Fotó: Zoltán *Fejér*

Jam la tria ministro...

de Hungario parolas al niaj ' ŋantoj pri tio, kiel li vidas la rolon kaj eblojn de Esperanto en la internacia vivo. S-ro *Faluvégi* – kiel decas al financministro – aliras la problemon sobre kaj racie: li ne pretervidas la malfacilaĵojn, kiujn povus naski vasta lerneja enkonduko de la Internacia Lingvo, sed li ankaŭ konscias la avantaĝojn, kiuj rezultus el tio, se la enkonduko okazus samtempe en aro da landoj. Ĉiukaze, liaj konstatoj estas pripensindaj, kaj ili povos eventuale eĉ nuancigi la celdeklarojn de nia propagando.

En tiu ĉi numero du artikoloj denove temas pri teatro: precipe atentinda estas la iniciato en Leningrado, el kiu povos ĝermi nova vigla Esperanto-teatro.

La fama estona poetino Hilda *Dresen* prezentas al vi siajn rememorojn pri *Kalocsay*. Tiujn rememorojn de samtempano riĉige komplementas la pli kritikema sinteno de la juna itala talento Mauro *Nervi*. Cetere Kalocsay mem reapereas en tiu ĉi numero, kun ankoraŭ ne publikigita noveltraduko . . .

Verŝajne multaj volonte informiĝos, kiel hungaroj povas vojaĝi al eksterlando? Artikolo el la plumo de L. *Kapitány* konigas interesan kaj grandsignifan hungaran inventaĵon, kiu ebligas fari proteinojn el verdaj vegetaĵoj: en la nuna tempo, kiam malsato estas ĉiama minaco por signifa ono de la homaro, tia teknologio havas apartan gravecon. Vi povas legi ankaŭ artikolon pri hungara fabriko, kiu ne produktas aŭtomobilojn, tamen ĝi havigas al nia lando 10 000 aŭtomobilojn ĉiujare. Riĉa recenza rubriko fermas tiun ĉi numeron.

Ĉi-jare *Hungara Vivo* akiris multajn novajn abonantojn, kvankam niaj alvokoj pri varbado restis praktike seneĥaj (entute *tri* personoj informis nin pri sia varbagado: ili akceptu niajn sincerajn dankojn). Nia redakcio tre ĝojus, se niaj novaj abonantoj (kaj kompreneble ankaŭ la malnovaj) bonvolus skribi siajn freŝajn impresojn, ĉu pozitivajn, ĉu negativajn. Kiel vi vidas, en tiu ĉi numero mankas la rubriko *Leterkesto*, simple pro tio, ĉar al nia rubrikestro mankis furaĝo. Skribu do, ne lasu la rubrikestron senlabora. Li volonte atendas ĉiajn originalajn komentojn, kaj tre probable ankaŭ la legantoj mem scivolas pri ekster-redakciaj opinioj.

Do ek! Prenu plumon!

Intervjuo

kun financministro D-ro Lajos Faluvégi



D-ro Lajos Faluvégi, financministro

Financministroj ĝenerale ne okupiĝas pri lingvaj problemoj, ĉar – pro iliaj devoj kaj zorgoj – por tio al ili ne restas tro multe da tempo kaj emo. D-ro Lajos Faluvégi, la ĉefa „trezorejisto" de la hungara ŝtatkaso verŝajne apartenas al la raraj esceptoj. Unu el la rezultoj de tiuspeca lia okupiĝado estas la eldonaĵo „Manlibro de nia oficeja lingvo". Surbaze de tio mi pensis, ke nia financministro interesiĝas ankaŭ pri lingvaj malfacilaĵoj ĉe la internaciaj kontaktoj. Tial mi deziris intervjui lin. Mia unua demando estis:

– *Kamarado Faluvégi, kiel Vi opinias pri lingvaj aspektoj de niaj internaciaj financrilatoj?*

Pro nia lingva izoliteco pór ekonomiistoj, financistoj neniel estas seninterese, ĉu ili konas tiajn lingvojn, kiuj ebligas ilian aktivan partoprenon en internaciaj traktadoj.

– *Ĉu ekzistas ia statistiko pri tio, kiajn monsumojn oni elspezas en nia patrujo por la interpretado kaj tradukado lige kun niaj oficialaj internaciaj kontaktoj? Kiom kostas ĉe ni la lerneja instruado de t.n. mondlingvoj?*

– Tiaj kostoj estas preskaŭ netrarigardeblaj, ĉar ili aperas ĉe miloj da ŝtataj instancoj, entreprenoj kaj ĉe kooperativoj. (En Hungario fakte ne ekzistas privataj firmaoj. – Red.) Mi povas nur ŝajnigi la mezurojn kaj diverskarakterecon de tiuj kostoj helpe de kelkaj faktoj, ekzemploj; la ŝtata budĝeto ĉiujare elspezas proksimume 1,5 miliardojn da forintoj pri edukado en gimnazioj kaj fakaj mezlernejoj. La edukado pri fremdaj lingvoj okupas proksimume 15 procentojn de la tuta kvanto de mezlernejaj instruhoroj, tiamaniere ankaŭ la kostoj elspezitaj tiucele far la ŝtato estas gravmezuraj. (La ĝenerala kaj mezlerneja edukadoj estas senkostaj por la loĝantaro. – Red.) En la jaroj 1977–1978 en la tagaj kursoj de universitatoj kaj altlernejoj studis 65 mil gestudentoj. El ili la unuavice devigan rusan lingvon lernis 32 mil personoj. En la universitatoj kaj altlernejoj 17 idiomoj estas instruataj kiel la dua aŭ eble la tria fremda lingvo. Pli ol duono de la instruitoj lernas la anglan, kvarono la germanan, proksimume 10 procentoj la latinan kaj ĉirkaŭ 7 procentoj lernas la francan. En la jaro 1978 la edukaj kostoj por unu studento de la tagaj kursoj sumis 46 mil forintojn. (Preskaŭ la tuton kovris la hungara ŝtato. – Red.) La studentoj de la fakoj pleje postulantaj lingvoscion lernas lingvojn dum 30 procentoj de la instrutempo, en aliaj fakoj dum ties 6–10 procentoj. Laŭ tio estas imageblaj la kostoj por la lingvoinstruado.

La Tutlanda Oficejo pri Tradukado kaj pri Aŭtentigo de Tradukaĵoj enspezas ĉiujare po 48–50 milionojn da forintoj: por ĝiaj servoj pagas preskaŭ nur entreprenoj kaj instancoj. La Teknikaj Biblioteko kaj Centro pri Dokumentado ĉiujare elspezas por tradukado de teknika fakliteraturo po 30 milionojn da forintoj meze. Ankaŭ la tradukaĵojn far ili utiligas kaj aĉetas entreprenoj kaj instancoj pri scienca esplorado. Funkcias tamen pluraj Centroj pri Dokumentado, tial la menciitajn kostojn pri tradukado eblas multobligi ĉe taksado pri tiuspecaj elspezoj.

– *Laŭ la vicigitaj faktoj kaj aliaj Viaj spertoj, ĉu Vi jam pensis pri tio: kiom pli simple kaj pli malkare estus, se ĉiu popolo havus krom sia nacia lingvo unu alian facile lerneblan idiomon – Esperanton –, kiu povus plenumi la rolon de konvencia lingvo peranta?*

– Tiu idiomo devus esti ne nur fleksebla lingvo por konversaciado, sed devus posedi ankaŭ tre pecizajn, tre ekzaktajn „fakajn" brancojn.

La faktoj pri multflanka utiligado de Esperanto pruvas ĝiajn evoluintecon tiurilatan kaj kontinuan evoluadon tiukampan. Apogas tion ankaŭ aro da pretaj kaj pretiĝantaj fakvortaroj. Sed ekzistas opinio, ke solvo de la lingva problemo estus, se en ĉiuj lernejoj de ĉiuj landoj laŭkonvencie Esperanto estus la sola devige instruata lingvo, kaj ĉiu alia idiomo estus nedeviga lernobjekto. Kiel Vi opinias pri tiu ĉi strebado?

– Pri tio pensi eblos nur, se la kondiĉoj por tio estos maturaj en la plejmulto da landoj, kaj tiu ĉi propono devus samtempe realigi en ĉiuj landoj aŭ almenaŭ en ilia pli granda parto. Alimaniere ekzemple Hungario trafus sin en ekstreme malavantaĝa situacio. Ni ne rajtas riski niajn kontaktojn pro lingvaj malfacilaĵoj, eble tial, ĉar iu el la kuntraktantoj ne akceptus Esperanton kiel lingvon de traktadoj. Ĝuste tial en la proksima estonto ne estus reale instrui Esperanton en niaj lernejoj.

– *Konvencia enkonduko de la lerneja instruado de la internacia lingvo postulas longedaŭran laboradon. Kiel opinias k-do Faluvégi pri la demando strikte ligita al la antaŭa: ĉu la konvencian solvadon de tiu ĉi problemo monda devus iniciati ne ĝuste la ŝtatoj, ne parolantaj mondlingvojn, kiuj faras la plejmulton de la homaro?*

– La ĝenerala uzo de Esperanto dependas ne de tiuj malgrandaj landoj kiel ekzemple Hungario. Multe pli dependas tio de la nacioj parolantaj mondlingvojn, kiuj alkutimiĝis, ke la kuntraktantoj konas kaj uzas iliajn gepatrajn lingvojn. Por la laŭeble plej baldaŭa rezulto tamen ankaŭ malgranda lando, kiel Hungario povas multon fari, sed unuavice sur kampo kultura, per sociaj rimedoj.

– *Ekzistas opinio, ke la registaroj nun baraktas kontraŭ multe pli gravaj problemoj, kaj por konvenciaj edukado kaj oficialigo de la internacia lingvo ankoraŭ ne maturiĝis la kondiĉoj. La starpunkto de esperantistoj estas: la homaro ĉiam laboradis pri solvo de pluraj problemoj. Ankaŭ nun estas faratai multaj registaraj kaj sociaj streboj por venki la lingvajn malfacilaĵojn, nur laŭ la jam malraciiĝintaj metodoj tradiciaj.*

– Tamen laŭ mia opinio la Esperanto-movado ne malhelpas la tradician vojon de lernado de mondlingvoj. La plej bona pruvo de tio estas, ke oni konas multajn hungarajn esperantistojn brile parolantajn en pluraj lingvoj. Unu el ili estas András Sugár, populara kunlaboranto de la Hungara Televido.

– *Mi petas opinion de k-do Ministro pri la propono far 140 hungaraj parlamentanoj, kiun ili jam en 1976 transdonis al gvidantoj de la Kultura Komisiono de la Hungara Parlamento. La esenco de tiu propono estas: parlamentanoj, lingvistoj kaj aliaj fakuloj kreu provizoran sub-komisionon, kiu ekesploru la demandojn de la prilingva edukado kaj la lingvajn problemojn de internaciaj kontaktoj, respektive ilian eblan solvon pere de Esperanto; pri siaj esploroj la komisiono faru science bazitan raportaĵon por la Registaro.*

D-ro Lajos Faluvégi parolas en la parlamentejo.... kaj interŝangas dokumentojn kun Hans Apel, financministro de FRG

– Se tiu komisiono eble estiĝos kaj ĝi tiamaniere deziros ekokupi sin pri la lingvaj problemoj de internaciaj kontaktoj, do ankaŭ mi deziras al ĝi multe da sukceso.

– *Kiel Vi opinias pri tio, ke la provizora komisiono ĝis nun ne estis kreita?*

– Laŭ la informoj de mi posedataj la Kultura Komisiono decidis okupiĝi pri la problemaro en pli larĝaj interrilatoj. Ĝi metos sur la tagordon la aferon de prilingva edukado, inkluzive la priesperantan. Espereble, la Komisiono krom siaj aliaj taskoj, laborplane fiksitaj, trovos tempon kaj eblaĵojn en 1979 pritrakti la proponon far 140 parlamentanoj. Se la subkomisiono kreiĝos, kaj la karaktero, enhavo, celadoj de ilia preta propono pruvos, ke antaŭ ni staras problemo maturiĝanta al decido registarnivela, tiukaze, mi, memkompreneble, subtenos la prezenton de tiu propono antaŭ la Registaro.

– *Koran dankon pro la intervjuo.*

Imre Szenes

Esperanto teatro en Leningrado

Gvidanto de la leningradaj esperantistoj, Semjon Podkaminer gratulas post la spektaklo al Oleg Popkov

Oleg Popkov kaj Rašid Hajrullin en la teatrajeto „Li trosalis"

En la historio de nia apenaŭ pli ol unujara teatro plej interesa kaj instrua estas tio, ke la procezon partoprenis fakte ankaŭ la tutmonda esperantistaro.

Komence estis nekuraĝa – ĉar farita en izoliteco – provo de unu el niaj aktivuloj adeptigi al Esperanto iun konatan maljunan aktoron. La provo fiaskis. Sed onidiro pri tio tamen atingis Rejkjavikon en 1977. Rezulte sekvis telefona voko el Varsovio: s-ino Kalina *Pienkiewicz* proponis al nia teatro aŭ aktoro partopreni en la renkontiĝo de Esperanto-teatroj en Gdansk, okazonta post kelkaj monatoj. Tio plifortigis nian pozicion. Sed teatron ni ne havis.

Antaŭ nia unua propaganda kunveno en la sezono 1977–1978 nia senlaca aktivulino Barabara *Cvetkova,* preterpasante la Teatron de Junaj Spektantoj, lasis tie informon pri la kunveno. Al la kunveno venis nemulte da homoj, sed inter ili estis grupo de junaj aktoroj. Prelegis malnova kaj sperta esperantistino Maria *Abolskaja.* Ŝi prelegis bele, uzante kiel ilustraĵon Esperantajn tradukojn de plej subtila rusa poezio: ŝi recitis pecon ruslingve kaj preskaŭ nerimarkeble ĉio fariĝis esperantlingva! Poste paro de niaj gastinoj el Barnaulo kaj kelkaj leningradanoj, alportintaj gitaron, prezentis kelkajn kantojn en Esperanto. Aliaj aktivuloj ankaŭ aldonis siajn spertojn kaj opiniojn. Do, la aktoroj multe ekinteresiĝis pri la afero. La subskribinto proponis, ke li povus eksperimente uzi kun la aktoroj sian propran metodon de Esperanto-instruado, tre rapidan kaj netedan metodon (en la rusa lingvo mankas ĝis nun bona moderna lernolibro de Esperanto). Fine oni decidis, ke la eksperimenton partoprenos unu aktoro, Oleg *Popkov.* La eksperimento brile sukcesis, kaj post nelonga tempo samideano Popkov mem ekinstruis Esperanton al du gekolegoj. Ni faris antaŭpreparojn por ĉeesti la teatran renkontiĝon en Gdansk.

Intertempe nia anonceto pri serĉado de teatraj kontaktoj aperis en „Heroldo de Esperanto". Respondoj estis abundaj – el la tuta mondo. Ankaŭ Kiril *Draĵev,* gvidanto de Bulgara Esperanto-Teatro (BET) salutis nin letere, kaj sendis bele faritajn propagandajn materialojn de BET. La samon faris Kalina Pienkiewicz el Pollando. Kvankam eble ni ne respondis al ĉiuj skribintoj – pro kio ĉi tie ni pardonpetas – sed certe laŭtlegis ĉiun poŝtkarton, kio kreis favoran atmosferon de tutmonda intereso, solidareco kaj kunhelpo.

Bedaŭrinde, baldaŭ evidentiĝis ke niaj aktoroj ne povos partopreni la renkontiĝon en Gdansk. Nia preparado malrapidiĝis.

La leningradaj esperantistoj, gvidataj de la aktivulinoj Serafima *Medvedeva* kaj Valeria *Cvetkova,* subtenataj ankaŭ de la Esperanto-komisiono de SOD (prezidanto: Semjon *Podkaminer*), sukcesis organizi specialan grupon al Varno, kiu inkluzivis ankaŭ geaktorojn. La impresoj estis bonegaj. Kreiĝis ankaŭ personaj kontaktoj kun Kalina Pienkiewicz kaj aliaj. La afero de nia teatro ankoraŭfoje plifortiĝis, dank' al Esperantujo tutmonda.

Tuj post la UK en Varno BET donis sian prezentadon de „Megero" en Leningrado, en la kulturpalaco „Kirov". Ni ĉiuj povis konatiĝi kun la

Kiel hungaroj vojaĝas?

Ofte ni aperigis jam informojn pri Hungario, kiel celo de turismo; eĉ, ni mem faras nian eblon ekinteresigi kiel eble plej multajn eksterlandanojn pri nia lando. La hungara turismo bele evoluas: dum la jaro 1978 vizitis Hungarion ĉ. 17 milionoj da eksterlandanoj. (Hungario havas iom pli ol 10 milionojn da loĝantoj.)

Sed ĉi-foje ni ekzamenu la alian flankon de la medalo. Kiom da hungaroj jare vizitas eksterlandon, kaj ĝenerale, kiajn eblojn ili havas por vojaĝi al aliaj landoj?

Dum la pasinta jaro 5,4 milionoj da hungaroj – do, ĉirkaŭ duono de la tuta loĝantaro – vojaĝis al eksterlando. Tiu cifero montras, ke la rajto vojaĝi eksterlanden tute ne estas blokita en Hungario, kiel oni ofte legas en okcident-eŭropaj gazetoj. Tamen, certaj limigoj ekzistas, sed ilin klarigas ekonomiaj kaj financaj kialoj, *ne politikaj*. Al tiu ĉi punkto ni revenu poste.

Grupaj vojaĝoj

En Hungario funkcias pluraj turismaj entreprenoj, kiuj proponas tre variajn vojageblojn al la publiko. La ofertoj inkluzivas ne nur praktike ĉiujn landojn de Eŭropo, sed ankaŭ forajn partojn de la terglobo, kiel Japanio, Usono, Kanado ktp. (Kompreneble, ekskursoj al tiel malproksimaj landoj havas piprajn prezojn.) La funkciado de pluraj entreprenoj montriĝas utila, ĉar la konkurenco efikas moderige al la prezoj, kaj stimule al la nivelo de la servoj. Depost kelkaj jaroj hungaroj rajtas ankaŭ senpere mendi servojn ĉe eksterlandaj turismaj agentejoj (inkluzive agentejojn de kapitalismaj landoj).

Tamen, la vasta kaj granda oferto montriĝas ofte nesufiĉa: oni devas plurajn monatojn pli frue anonci sin ĉe la turismaj oficejoj, por kapti lokon en la dezirita grupo. La tumulton kaŭzas verŝajne la lingva problemo: plimulto de la vojaĝemuloj pretas pagi iom pli por havi ĉiam je sia servo ĉiĉeronon kaj interpretiston. Kiuj ne sukcesas kapti lokon en grupo, povas vojaĝi individue. (Hungaraj esperantistoj preskaŭ ĉiam veturas al eksterlando tiamaniere.)

Senlimiga pasporto al kvin landoj

Por individuaj vojaĝoj ekzistas diversaj reguloj, depende de la lando, kiun oni elektis kiel celon.

Plej simple oni povas viziti la sekvajn kvin socialismajn landojn: *Bulgarion, Ĉeĥoslovakion, GDR, Pollandon* kaj *Rumanion*. Por tiuj landoj hungaroj havas apartan, tn. „ruĝan" pasporton, kiu enhavas kvin elirpermesojn. (La kosto de unu elirpermeso estas 20 forintoj, t.e. iom pli ol 1 dolaro.) Tiujn kvin elirpermesojn oni povas foruzi dum laŭplaĉa tempo, kaj se ili elĉerpiĝis, tre simple oni povas aĉeti pliajn, sen ia limigo. Pri la kvanto de la mono, ŝanĝebla al la valuto de la supraj landoj, ekzistas limigo (10 000 forintoj, t.e. ĉ. 550 dolaroj jare), sed fakte nur teorie. (Mi mem ankoraŭ neniam spertis, nek aŭdis pri ia kontrolo koncerne tion.)

Pri tiu eblo hungaroj estas tre kontentaj, kaj vaste utiligas ĝin. Sufiĉas ĵeti rigardon dum dimanĉaj vesperoj al la limstacioj ĉe la ĉeĥoslavakia kaj rumana limoj: miloj da hungaraj aŭtomobiloj atendas tie trapason, por kiel eble plej baldaŭ atingi la hejmon post la eksterlande pasigita semajnfino.

Tiun saman „ruĝan" pasporton uzas hungaroj ankaŭ ĉe vojaĝoj al aliaj socialismaj landoj, tamen, kun antaŭproceduro iom pli komplika.

Ĉiun trian jaron

La vojaĝado al kapitalismaj landoj estas certagrade limigita *pro ekonomiaj kialoj*. Oni scias, ke la hungara mono ne estas *konvertebla*, t.e. internacie ŝanĝebla. La hungara ekonomio bezonas grandegan importon – unuavice por evoluigo, sed fakte ankaŭ por ordinara funkciado – kaj la ekonomio havas prioritaton ĉe la utiligo de la disponebla konvertebla mono. Ĉar la ŝtato havas la principon, ke ĝiaj civitanoj ne vojaĝu senmone al eksterlando, oni rajtas ricevi „bluan" pasporton (t.e. validan por ĉiuj kapitalismaj landoj en Eŭropo, eventuale ankaŭ en aliaj kontinentoj) nur *en ĉiu tria jaro*. Tiu pasporto estas utiligebla por nur unu vojaĝo, kaj oni rajtas ŝanĝi tiam 4000 forintojn (ĉ. 225 dolarojn) al kiu ajn konvertebla valuto. Tiun pasporton rajtas ricevi ĉiuj plenkreskaj hungaraj civitanoj, krom kelkaj specialaj kazoj (akuzitoj de krimprocesoj, personoj grave kulpintaj kontraŭ doganaj preskriboj, ktp.).

Praktike mankas signifaj limigoj, se iu hungaro estas invitita far amiko aŭ parenco vivanta en kapitalisma lando. Tamen, tiam la invitinto devas pagi ankaŭ la vojaĝkostojn de la invitito sur trafikiloj de kapitalismaj landoj.

Sinteno de la ŝtato

Oni povas diri, ke la ŝtato stimulas la vojaĝadon de siaj civitanoj al eksterlando. Nemirinda afero, ja estas evidente, ke konatigo kun aliaj landoj vastigas la horizonton de la homoj, kaj tiamaniere ĝi grave kontribuas ankaŭ al la ekonomia kaj socia progreso de nia lando.

Jam longe pasis la tempo, kiam pro iu aŭ alia kaŭzo parto de la hungaraj turistoj ne volis reveni al sia lando, sed provis ekloĝi kaj eklabori ie en Okcidenta Eŭropo. Tiu cifero neniam estis signifa, sed nuntempe nur oneto de procento de niaj turistoj faras tiel. Eĉ tiuj homoj baldaŭ aperas ĉe iu hungara konsulejo por peti helpon reveni al Hungario.

Milionoj da hungaroj ĉiujare vojaĝas al eksterlando. Ili *ĉiam* ĝojas, trapasante la landlimon: *ne nur elire, sed ankaŭ revene.*

V. *Benczik*

---

bulgaraj aktoroj kaj iliaj spertoj, kaj pridiskuti la ĝeneralan situacion de la Esperanto-teatro kun Kiril Draĵev. Kelkaj gravaj profesiaj problemoj de Esperanto-teatro klariĝis por ni.

Post tio jam rapide antaŭenpaŝis nia malgranda Esperanto-teatro. Je peto de la aktoroj nia gvidanto Semjon Podkaminer tradukis rakonton de Ĉeĥov: „Li trosalis". Du aktoroj, Oleg Popkov kaj Rašid *Ĥajrullin* baldaŭ prezentis ĝin kiel teatraĵeton en la Leningrada Domo de Amikeco. La sukceso estis grandega. En decembro 1978, dum sia vizito al Sovetio, la teatraĵeton vidis Simo *Milojeviĉ*, redaktoro de la revuo „Esperanto", kiu ankaŭ multe laŭdis ĝin.

Nia trupeto daŭrigas la laboron, aligante novajn gekolegojn, kaj tradukante plurajn verkojn por estontaj prezentadoj.

Viktor *Goĥŝtejn*

Publika letero

al turistoj vojaĝantaj peraŭtomobile, permotocikle; al partoprenantoj turismon ĉu individue, ĉu engrupe; al laborantoj kaj estroj de Hungarlandaj fremdultrafikaj oficejoj, al tiuj de organizoj pri trafiko kaj gastigado, al tiuj de bankoj kaj ŝparkasoj interesitaj pri turismo

PRIDISKUTI LA KONSTANTE PLIIĜANTAN LINGVAN PROBLEMON DE LA INTERNACIA TURISMO!

Estu ni la iniciatantoj de internacia solvo!

Dank' al socia-scienca evoluo de nia epoko de jaro al jaro pligrandiĝas la moderna popolmigrado de la mondhistorio, la turisma vojaĝado fare de amasoj, dezirantaj koniĝi pri aliaj landoj, kontinentoj. En la pasinta jaro jam *245 milionoj da homoj* veturis al la urboj, feriaj kaj turismaj centroj de popoloj alilingvaj.

Estas tamen internacia ĝenerala sperto, ke la plejparto de turistoj ne konas lingvojn de vizitataj landoj, ĉar neniu kapablas ellerni tiom da idiomoj, al kiom da patrujoj de diversaj popoloj li povas vojaĝi dumvive. Ne estas pli konsola la statistiko pri lingvoscio de laborantoj de la fremdultrafiko.

Eĉ pli malbone statas la afero en la kazo de laborantoj de komerco, trafiko, gastigado, kvankam multaj el ili havas rilatojn kun eksterlandanoj dumlabore.

En la turismo – kiel en aliaj kampoj de la internaciaj kontaktoj – dominas lingvoj de kelkaj grandaj ŝtatoj aŭ lingvaj teritorioj, kiel la idiomoj angla, franca, germana, rusa, do la t.n. „mondlingvoj". Pro tio ankaŭ kulturvaloroj de la plejparto da popoloj estas en situacio malavantaĝa, kaj iliaj naciaj lingvoj sekve de malegaleco ne rolas en la internaciaj rilatoj.

Tiu ĉi situacio estis formita de lastaj jarcentoj de la historio, *kaj tio restos ĉiam tiel, ĝis la statoj de la Tero konsentos pri konvencia akcepto de internacia idiomo.*

Oni do devas vidi, ke ĉi tie temas pri problemoj ne solveblaj per tradiciaj metodoj, laŭ sugestoj fare de la propagando por *„lerni mondlingvojn"*. Nenio pli bone atestas pri tio ol la statistiko de UN, laŭ kiu el la kvarmiliarda homaro nur 350 milionoj parolas angle kaj nur 82 milionoj france. Ĉi tiuj nombroj inkluzivas ankaŭ tiujn, por kiuj la angla kaj la franca estas nur lernitaj lingvoj. Ili estas nur proksimume 10 procentoj de la tuta homaro.

Ĉiu turisto vojaĝanta eksterlanden ĉu peraŭtomobile, ĉu permotocikle, ĉu individue, ĉu engrupe, havas abundan sperton pri la amaso da malfacilaĵo kaj malagrablaĵoj kaŭzitaj de tiu ĉi situacio. Tio validas ankaŭ en la kazo de fremdultrafikaj laborantoj.

La vera solvo en ĉiuj internaciaj kontaktoj estus do *Esperanto,* kiu jam nun estas parolata de grandaj amasoj, kiu naskiĝis kiel vivanta ĝermo de vivantaj lingvoj, la sola *neŭtrala internacia idiomo, kiu ne apartenas al iu unusola nacio, sed estas komuna proprafo spirita de la tuta homaro.* Sed por tio oni multoble devus pliigi uzadon de la internacia lingvo, kiu estas ellernebla dum kvar monatoj, kiu idiomo sola povus garantii egalrajtecon de naciaj lingvoj. Tio estus precipe utila en la sfero de turismo. En la intereso de tio ankaŭ la organizoj de Hungarlanda fremdultrafiko povus esti iniciatantoj.

Kiel? Oni komencu diskuton pri maturigo, pri la prilaboro de farendaĵoj, pri instigoj bezonaj al la unuaj paŝoj. Pere de *Publika Letero* ni volas servi tiun celon. Nian proponon subtenas gravaj asertoj pri la tutmonda dua lingvo, fare de grandsignifa brita deklaro.

Kelkajn vortojn pri ĝiaj aŭtoroj kaj eldonintoj! En la komenco de la jaro 1977 en la Parlamento de Britio estiĝis specifa organizo: Trade Union and Co-op Esperanto Group (TUCEG), t.e. Sindikata kaj Kooperativa Esperanto-Grupo. Ĝia celo estas popularigi kaj disvastigi la internacian lingvon Esperanto inter organizitaj laboruloj de Britio. Alia celo de ĝiaj anoj, kiel ilia publikaĵo emfazas, estas, ke TUCEG *„. . . volas akiri subtenon fare de la laborista movado por la internacia lingvo Esperanto, por ke ĝi ĉiulande povu plenumi la rolon de dua lingvo."* La deklaro akcentas, ke *„La laborista movado devas aktive subteni Esperanton, la solan demokratian solvon praktikan de la monda lingva problemo."*

Gravecon kaj internacian signifon de la deklaro donas tio, ke TUCEG, decidinta lau la sindikata iniciato pri gia publikigo estigis en la patrolando de plej disvastiginta „mondlingvo". Inter estraranoj de TUCEG troviĝas krom landaj prezidantoj de 12 grandaj sindikatoj de Britio ankaŭ la ĉefsekretario de la *Brita Laborista Partio* kaj aliaj ĝiaj gvidantoj, la prezidanto kaj la ĉefsekretario de *Komunista Partio de Britio,* 23 parlamentanoj de la Laborista Partio kaj pluraj ministroj de la Brita registaro. Prezidanto de *TUCEG* estas parlamentano de la Laborista Partio *Stan Newens,* unu el la gvidantoj de la Londonaj kooperativoj; ĝia honora prezidanto estas *Jack Jones,* la plej aŭtoritata veterano de la brita laborista movado, ĉefsekretario de *Transport and Ĝeneral Workers Union* (Sindikato de Transportaj kaj Ĝeneralaj Laboristoj) kun dumiliona anaro.

Kelkaj citaĵoj el la deklaro:

„El la pli ol 3000 idiomoj de la mondo en la internaciaj kontaktoj estas uzataj nur lingvoj de la plej grandaj nacioj. Tio estas maldemokratia, praktike senrezulta kaj multekosta.

Kelkaj lingvoj disvastiĝis pro militaj konkeroj, ne pro iuj iliaj avantaĝaj ecoj . . .

*Tiu ĉi *Publika Letero* ĝis nun aperis en ses hungarlingvaj gazetoj.

17 milionoj da turistoj vizitis dum la pasinta jaro Hungarion. Kiom el ili scipovas la hungaran?

La angla (kaj la „Usona") lingvo ne estas akceptebla kiel internacia idiomo. *ESPERANTO* ne estas lingvoprojekto, sed vivanta lingvo kun 90-jara pasinto. *Ĉie en la mondo troviĝas homoj parolantaj ĝin kaj ĝia literaturo povus esti fiera∫o por multaj malgrandaj nacioj. Ĝi estas instruata konstante en proksimume 600 lernejoj kaj 20 radiostacioj emisias regule programojn en Esperanto . . .*

Se ESPERANTO estus instruata en ĉiu lernejo de la mondo kiel la unua fremda lingvo, la lingva problemo estus solvita dum la vivo de ununura generacio."

La subskribantoj de tiu ĉi *Publika Letero* konsentas kun la cititaj asertoj de la brita deklaro. Ankaŭ pluraj gvidantoj de la Hungarlandaj sindikata kaj kooperativa movadoj aprobis la britan iniciaton. Iliaj opinioj aperis en la n-ro 1/1978 de la hungarlingva revuo de HEA, *Világ és Nyelv* (Mondo kaj Lingvo), kaj en la n-ro 1/1978 de *Hungara Vivo.*

La hungaraj organizoj interesitaj pri la internacia turismo estu la proponantoj de la nova iniciato. Sed unue ni pridiskutu publike ĝiajn rimedojn kaj eblojn por ke hungaraj turistoj voja-ĝantaj eksterlanden kaj laborantoj de la fremdultrafiko adekvate povu orientiĝi pri la plej grava lingva problemo de nia epoko kaj pri ĝia solvo plej racia, plej justa.

D-ro László *Deme*, universitata profesoro pri lingvistiko, katedrestro
Gyula *Fekete*, verkisto
Mihály *Gergely*, verkisto
D-ro György *Krekács*, ĉefsekretario de Hungarlanda Sindikato de Laborantoj de Komerco, Financo kaj Gastigado
D-ro Ottó *Lázár*, vicprezidanto de la Departementa Juĝistaro en la urbo Debrecen
András *Sugár*, ĉefkunlaboranto de la Hungara Televido
István *Tóth*, ĉefsekretario de la Hungarlanda Sindikato de Laborantoj de Trafiko kaj Transporto

Tradukis: P. A. *Rados*



SOCIPOLITIKAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO–MOVADO

Pri nia lingvo jam verkiĝis ampleksa literaturo, sed maloftas studoj, kiuj esploras la kontaktojn de la E-movado kaj la sociaj medioj, en kiuj ĝi evoluis dum la lastaj 90 jaroj.
Tiu ĉi studaro – redaktita de Detlev Blanke – stopas tiun breĉon per aperigo de studoj jam klasikaj (Zamenhof de E. Drezen, Esperanto dum la Tria Regno de U. Lins ktp.) kaj ankaŭ per konigo de novaj esploroj sur tiu kampo.
Prezo: 13,80 gld. 226 p., 19 cm.
Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio

BAZA LITERATURA KRESTOMATIO

Nemalhavebla manlibro!

Per 128 verkoj aŭ fragmentoj de verkoj de 56 Esperantaj aŭtoroj tiu ĉi libro donas superrigardon pri nia tuta literaturo. Necesega helplibro por superaj kursoj, nepra akompanaĵo de Gvidlibro por supera ekzameno kaj samtempe alloga legaĵo por ĉiuj esperantistoj. Redaktis: Vilmos Benczik.
Prezo: 13,80 gld. C. 250 p., 19 cm.
Eldonis: Hungara Esperanto-Asocio



Vizite ĉe nordaj parencoj

Hungaroj delonge sentas fortan simpation al Finnlando, kio estas afero nemirinda, ja finnoj, estonoj kaj hungaroj havas lingvojn parencajn: ĉiuj tri lingvoj apartenas al la finno-ugra lingvofamilio. Meze de januaro laŭ invito de la Esperanto-Klubo de Kuopio mi faris prelegvojaĝon ĉe niaj nordaj „parencoj", kaj mi povis konstati, ke tiu simaptio estas minimume reciproka.

En Helsinki min renkontis ĉe la trajno s-ro Jussi *Jäntti*, kompetenta tradukinto de „La kanto pri la fajr-ruĝa floro" de *Linnankoski*. Sekvis dutaga konatiĝo kun la vidindaĵoj de la finna ĉefurbo, ekskurso al Espoo, rezidejo de la eterne juna Vilho Setälä, kaj poste fulmvizito al Lahti.

La prelegprogramo komenciĝis en la Esperanto-Klubo de Kuopio. La temo de la prelego estis la hungara literaturo, sed la postaj demandoj ne limiĝis nur al tiu temo: la esperantistoj en Kuopio volis scii ĉion pri Hungario.

Post Kuopio sekvis la norda universitata urbo Oulu, kie la lokaj esperantistoj laŭdinde „ekspluatis" min: dum tri tagoj mi faris kvin prelegojn, kaj el tiuj kvar antaŭ neesperantista publiko. Plej signifa el tiuj sendube estis la prelego farita en la Katedro pri Ĝenerala Literaturscienco de la Universitato de Oulu. En tiu urbo mi akiris ankaŭ tri geamikojn, kiujn verŝajne neniam mi forgesos, eĉ se mi volus tion fari: Krystina kaj Allan *Mehtonen*, kaj Osmo *Buller*.

La sekva stacio estis Kajaani, lulilo de la malnova finna kulturo. Ĉi tie mia prelego okazis en la civitana lernejo, kies rektoro, s-ro *Matti* – kvankam li ne estas esperantisto – montris vere kortuŝan afablecon al mi. En Iisalmi mi prelegis same en la civitana lernejo, kies rektoro, s-ro Reino *Eriksson* mem estas esperantisto. Ĉi tie la prelegon ĉeestis ankaŭ du elstaraj finnaj verkistoj, Eino *Saissa* kaj Aarno *Kellberg*.

Miaj impresoj pri Finnlando estis tre bonaj. La ĉefa trajto, kiu precipe kaptis min, estis la solida ŝato de finnoj al la kulturo. Ili amas la propran kulturon, tenere vartas ĝin, sed ne forfermas sin disde la ekstera mondo. En la diskonigo de sia propra kulturo ili havas la samajn problemojn kiel ni, hungaroj: la lingvan baron. (La finna lingvo estas nepenetrebla eĉ por hungaroj; mi devas konfesi, ke ĉie mi serĉis la svedlingvajn surskribojn, ĉar ili montriĝis malpli misteraj, malgraŭ la fakto, ke neniam mi studis la svedan lingvon. La finnan, jes ja, mi studis dum unu semestro antaŭ deko da jaroj.)

Estis aparte bona la gazetara bilanco de mia vojaĝo. Dank' al la lerteco de miaj gastigintoj, ses finnaj ĵurnaloj faris kun mi longajn intervjuojn, kaj krome aperis pluraj mallongaj informoj pri la prelegoj. La suma eldonkvanto de tiuj ĵurnaloj estas ĉirkaŭ duonmiliono.

En Finnlando estas relative multaj esperantistoj, sed mi havis la impreson, ke ilia organiziteco ne estas perfekta, almenaŭ ne en tutlandaj dimensioj. Estas bedaŭrinde, ĉar tiamaniere multaj latentaj talentoj ne estas ekspluatitaj.

Ire kaj revene, mi dufoje trapasis Leningradon, kaj mi trovis tie ne nur gastamajn, sed ankaŭ aktivajn kaj tre energiplenajn esperantistojn. La ĉi-numere aperanta raporto pri la Leningrada Esperanto-Teatro ankaŭ estas frukto de tiu renkontiĝo.

Esperantujo estas grandega, sed tre maldensa „lando". Tiel maldensa, ke foje-foje oni ekhavas dubon pri ĝia ekzisto. Estas do agrable havi de tempo al tempo palpeblajn pruvojn, ke tamen ĝi ekzistas. Dank' al la finnaj kaj leningradaj esperantistoj, la pruvo, kiun mi ricevis, estis brila.

V. *Benczik*

László Nagy

Kiu transportos la Amon

Se mia vivo fine foros,
gril-ĉirpon kiu plu adoros?
Kiu al prujno flamon spiros,
al ĉielark' sin streĉe tiros?
Rok-koksojn per brakumoj ploraj
kiu sorĉos terbuloj molaj?
Kiu lulos per karesaro
la murojn kun vejnet' kaj haro?
El blasfemar' al kredoj tretaj
ĉu iĝos katedraloj pretaj?
Se mia vivo fine foros,
vulturon peli kiu volos!
Kiu en dentoj mol-tenere
la Amon portos trarivere!

El la hungara: P. A. Rados

Ernesto Bécs

La 8a de Majo 1945

La helicoj ankoraŭ ŝanceliĝis, ankoraŭ streĉiĝis.
Sub la kasko de la kabinoj atendis aviadistoj
kaj la febro de la veantaj morsosignaloj ilin turmentis.

Ĉe la muroj gazon-ŝrumpigite sidetis la vunditoj,
tra malklara vitro palpebretis al ili la Maja suno.

La kripluloj alrigardis siajn lambastonojn
kaj la vidvinoj de konvulsia buŝo malfermis sian fenestron.

Fuĝantaj Gauleiter*oj dentklakis en la intermontejoj*
kaj pro timo ili drinkis francan konjakon.

La valojn inundis la armeo de la venkintoj,
kiuj penetris tra la vintraj arbaroj
kaj travadis la kazernojn de feraj katenoj en Pomeranio.

Vento dancis sur la faŭkantaj Apellplatz*oj*
la malliberuloj de l' barakaroj iris kontraŭ la urboj,
milionoj da iliaj kameradoj estis jam kuŝantaj en la sablejo de la riveroj
kaj la fumo de la cindrigejoj balanciĝis por nigra birdo
super la kontinento.

La ruino de la venkita armeo fumis kiel la eksplodiĝintaj mekanismoj,
La ladaj faŭkoj de Göbbels mutiĝis por ĉiam en la placoj genuantaj.

Dise en Eŭropo, kie brulis la krucoj de l' senkulpuloj
kaj la urboj de svarmanta zumado sin enpolvigis,
tiun ĉi tagon la kapreoloj ekkuraĝis aperi ĉe arbarrandoj
kaj sur la senbruiĝintaj senarbejoj kuŝiĝis la cervoj.

Proteinoj – el verda vegetaĵo

Timiga problemo – kune kun la ne malpli grava demando de konservo de la paco kaj homa medio – konturiĝas antaŭ la Homaro: tio estas la fantomo de la malsato, minacanta popolamasojn de nia planedo.

Laŭ la prognozoj de kompetentaj organizoj, nombro de la loĝantoj de la Terglobo – ĝis fino de la dua jarmilo – atingos la ciferon de ses miliardoj. Paralele kun tiu kresko, produktado de la nutraĵoj postrestas sur multaj terpartoj. Statistikoj pruvas, ke centmiloj da homoj malsatmortas en ĉiu jaro, eĉ ĉ. okono de la homaro suferas malsaton pro manko de nutraĵoj bezonataj por la minimumaj vivkondiĉoj. Okulfrape danĝera estas la situacio rilate tiujn ŝtatojn, kies loĝantaro tro rapide multnombriĝas (ekz. Hindujo), kaj en tiuj landoj, kie la naturaj cirkonstancoj (dezertaj, senakvaj, varmegaj teritorioj) estas malfavoraj por produkti la necesan nutraĵon.

Baze de la menciitaj faktoj, la scienculoj esploras la eblojn depost jaroj, kiel ĉesigi la malsaton kaj prizorgi homan vivon por la malsatuloj. Tiucele komenciĝis vastaj eksperimentoj en Usono, Francio, Japanio, tiel ankaŭ en Hungario en la j. 1964.

Kiel konate, la plej grava konsistoparto de la homa nutraĵo estas la proteinoj, ili disponigas la nemalhaveblajn kemiajn elementojn por la evoluo kaj de la homa organismo.

Kiel estiĝas la proteinoj? La digestorganoj de la brutoj(mambestoj)transformas la konsumitan furaĝon verdan aŭ sekan, parte je proteinhava viando, parte je lakto. Simila procezo okazas ankaŭ ĉe la birdoj, donantaj viandon kaj ovon al la homo. Mekanismo de la cerealoj kaj sojo – je la efiko de la sunbriloj, laŭ la fotosintezo – transformas la diversajn mineralojn kaj akvon, sorbitajn el la grundo, je proteinoj. Tio koncentriĝas en la foliklo, resp. en la foliaro (etparte ankaŭ en la fibrino) de la vegetaĵo. La viando, lakt(aĵ)o, ovo, faruno (pano, bakaĵo) gajnitaj el la menciitaj protein-fontoj, estas kaj estos ĉiam la bazaj nutraĵoj por la homo.

Produktado de la bazaj nutraĵoj – laŭ la tradicia „nutrad-ĉeno" t.e. „Vegetaĵo → Bruto → Homo" pretendas relative longan tempon kaj vastajn investojn, ĝis oni povas utiligi la proteinojn. tiu fakto instigis la esploristojn prilabori procedon por dum reduktita tempo produkti proteinon, taŭgan je senpera konsumado kaj por la brutaro kaj por la homo. Agado de la esploristoj celis malpliigi la kostojn ankaŭ de la tradicia protein-produktado. La ĉirilataj eksperimentoj sukcesis, kaj du hungaraj scienculoj: prof. János *Holló* direktoro de la Centra Kemia Esplorinstituo, kaj Lehel *Koch,* scienca ĉefkunlaboranto de la Agrikultura Kemia Fakultato de la Teknika Universitato en Budapest, solvis la problemon. Ili, *unuaj en la mondo* sukcesis ekstrakti proteinon *el verda vegetaĵo* inter laboratoriaj cirkonstancoj en la j. 1964. Tiu sukceso kreis la bazon plilarĝigi kaj pluevoluigi la procezon de protein-produktado en Hungario. Baldaŭ okazis internacia patentigo de la produkt-principo sub la marko WEPEX (WEgetable Protein EXtraction – Vegetaĵa Protein-Ekstrakto). Dum la posta tempo daŭris la evoluigo kaj en la j. 1970 sub la patronado de Hungarlanda Tekniko-Evoluiga Komisiono kaj kun la kontribuo de tri agrikulturaj kooperativoj, okazis la konstruo de uzino por protein-produktado en industriaj dimensioj. Tiu uzino – situanta en *Tamási,* sudhungarlanda urbeto – funkcias kun kapacito 8 T/h (dum horo el 8 tunoj da verda vegetaĵo estas ekstraktita proteino).



Profesoro János Holló

Profesoro Lehel Koch

Proteino produktita laŭ WEPEX-procezo, servas por kompaktigi furaĝon por la brutaro. Tiel reduktiĝas la bredad-tempo, kio estas grava avantaĝo por la ekonomia mastrumado.

Antaŭ ses jaroj komenciĝis en *Tamási* la produktado de speciala t.n. Folio-Protein-Koncentraĵo (Leaf Protein Concentrate – LPC), ekskluzive por homa konsumado. FPK estas uzata kiel abundiga materialo en la diversaj nutraĵoj kun bonaj rezultoj.

Grandegan signifon havas la produktado de la proteinoj por la homaro, speciale por la popoloj de la evolulandoj, sekve manifestiĝas mondskala interesiĝo pri la invento de prof. J. *Holló* kaj L. *Koch* Al pluraj ŝtatoj de la mondo Hungario eksportas la licencon kaj teknologion de la protein-produktado. Industrie evoluintaj landoj (Danio, Sovet-Unio, Japanio) aĉetis la prototipon de protein-produktaj fabrikoj, konstruitaj fare de la hungara WEPEX-Entrepreno.

Lajos Kapitány

Ĉapitroj el la historio

8. Turka regado, Habsburga potenco

La sigelo de reĝo Johano, kronita far grupo de nobeloj en 1526

La malvenko en la batalo ĉe Mohács signifis tragikan ŝanĝon en la hungara historio, kaj ĝiaj efikoj sentiĝis ankoraŭ dum jarcentoj. Ĉe Mohács perdiĝis la mezepoka nacia unueco kaj la sendependeco. Post la morto de Ludoviko la 2-a, la partio de l' meza nobelaro elektis reĝo Johanon *Zápolya*, regnestron de Transilvanio (1526–1540), dum la kortega partio kunvokis asembleon, kie Ferdinando Habsburgo (1526–1564) estis surtronigita. Per tiu ĉi duobla reĝelekto, sigeliĝis la sorto de la lando. La turka armeo post la batalo ĉe Mohács retiriĝis el Hungario. Ferdinando Habsburgo sendis siajn soldulojn kontraŭ Zápolya, kiu tenis en siaj manoj grandan parton de la lando. Gajninte por sia parto la fidelulojn de Zápolya, Ferdinando forpelis lin kaj li fuĝis al Pollando. De tie li sendis ambasadoron al la sultano, petante lian helpon; en 1528, formale li federaciiĝis kun la sultano. Sulimano la 2-a baldaŭ komencis kampanjon kontraŭ Hungario, jam la sekvan jaron, celante helpi reĝon Johano. De tiam la lando fariĝis trapaŝa teritorio por la turkoj, intencantaj konkeri la urbon de Vieno.

Post la morto de reĝo Johano, liaj fideluloj elektis reĝo lian filon, Johanon Sigmundon (1540–1571), pro kio Ferdinando Habsburgo sendis armeon por sieĝi la urbon de Buda, kie la tiam ankoraŭ infanaĝa reĝo sin trovis. La sultano rapidis por helpi sian protektiton: la turkoj forpelis de Buda la trupojn de l' Habsburgoj, kaj profitante la okazon ili mem okupis la hungaran ĉefurbon, kiu kune kun la centraj regionoj de Hungario dum 150 jaroj restis dum turka regado.

La turkoj ne ĉesis grandigi la kojnon enigitan en la centron de la lando, okupintaj unu post la alia tre gravajn fortikaĵojn kaj urbojn. Johano Sigmundo ricevis la teritorion situantan oriente de la far turkoj okupita zono; Ferdinando, siavice, tenis sub sia potenco Nordan kaj Okcidentan Hungarion.

La publika opinio ĉiam pli energie postulis la reunuigon de la reĝa potenco, ĉar pro la konsolidiĝo de la turka okupiteco jam ne estis racia kaŭzo, por ke la partio de Zápolya plu ekzistu. Sed vane. La Habsburga armeo – kiu, estrita de Georgo Martinuzzi, faris aŭdacan klopodon por la reunuigo de la lando kaj tial invadis Transilvanion – maltaŭgis en la defendo de l' lando kontraŭ la turkaj atakoj. Dank' al la heroa rezistado de urbo Eger, la granda atako de la turkoj, celanta konkeri la nordhungarajn minurbojn, malsukcesis. En 1552 István Dobó, kapitano de la Eger-a fortikaĵo kune kun manpleno da soldatoj sukcese rezistis la sieĝon de la centmil-membra turka armeo, kiu finfine devis retiriĝi.

Kadio – turka urba juĝisto

La reĝino Elizabeta, vidvino de reĝo Johano

Tiamaniere, ekde 1541 la centra – la plej fekunda – parto de Hungario apartenis al la turka imperio, etendiĝanta sur tri kontinentoj. Samkiel la tuta imperio, ankaŭ tiu teritorio estis dividita je vilajetoj* kaj sandĵakoj*; la tutan okupitan zonon estris la bejo de Buda. La turka sistemo de tributoj kunportis grandajn ŝarĝojn por la hungaraj servutuloj, al kiuj, krome, estis malpermesite ŝanĝi sian loĝlokon. Ordinare la turkoj ne entrudiĝis en la religian vivon de la konkeritaj provincoj. Sed okaze de milito, eĉ la plej

*Administraj distriktoj en la turka imperio.

La 18-an de oktobro de 1552, la venkitaj turkaj trupoj fuĝas de Eger

de la hungara popolo

minimumaj rajtoj de la loĝantaro neniiĝis. La soldatoj faris kruelan rabadon, okazigis terurajn detruadojn kaj centmiloj da kaptitoj estis forportataj al la centro de la turka imperio. En ĉi tia duba situacio, la loĝantaro fuĝis en la grandajn koloniojn por trovi relativan sekurecon. Sekve, senhomiĝis kaj detruiĝis aro da vilaĝoj.

Dume la okcidentaj kaj nordaj provincoj, sub la potenco de Ferdinando, estis submetitaj al la Habsburgoj sub nomo de Hungara Reĝlando. Ferdinando, kiu regis la orientan parton de l' Habsburga Imperio en la nomo de sia frato, Karlo la 5-a, unuigis la hungaran kabineton en la centraj reĝimaj organoj. La Konsilantaro pri Milito, siavice, komencis fortikigi la frontlinion tráirantan la koron de la lando. Meze de la 16-a jarcento estis preta la linio de landlimaj fortikaĵoj; komenciĝanta norde, laŭiranta la piedojn de l' Karpata montaro, la serpentumojn de l' Danubo, la nordan bordon de l' lago Balaton, kaj finiĝanta ĉe la Adria maro. Dum pli ol unu jarcento, ĉi tiu fortikaĵlinio faris la limon inter la teritorioj en manoj turkaj kaj tiuj sub potenco de la Habsburgoj. Intertempe Maksimiliano Habsburgo (1564–1576), komence de sia reĝado, sajnis agi laŭ la deziro de l'

La poeto Bálint Balassi (1554–1594)

plejparto de la hungararo por forte defendiĝi, eĉ ekataki la turkojn, sed tio ne efektiviĝis. Tute kontraŭe: kiam la trupoj de Sulimano la 2-a, ege fortaj, estis ekirintaj en 1566 por ataki Vienon, la Habsburga armeo restis senmova en la urbo Győr. Kaj dum ĝi malaktivis, malgranda grupo de soldatoj estis defendantaj la fortikaĵon de Szigetvár. Estritaj de Miklós Zrínyi, ili heroe oferis sin kaj tiel haltigis la turkan antaŭeniron.

Okazis dum la turka regado, ke disvastiĝis en Hungario la Reformacio, kvankam ties ideoj jam pli frue estis atingintaj la landon. Unue populariĝis la idearo de la luteranismo, pli poste, ekde 1560, ankaŭ la kalvinismo; eĉ la anabaptisma doktrino trovis por si varbitojn. Ferenc *Dávid*, gvidanto de la unitarianoj predikis pacon, justecon kaj la rekonkeron de la teritorioj forrabitaj far la „malpiuloj". Sed malvenkis la ribelo de kamparanoj kontraŭ la nobeloj, kaj la plej radikalaj tendencoj de la Reformacio estis eklipsitaj. La predikistoj, kiuj en la komenco energie kritikis la regantan klason, pli poste proklamadis jam la paciencon kaj la obeemon; finfine, la gvidon de ĉiuj protestantaj eklezioj prenis en la manojn la reganta klaso.

La Reformacio signife ŝanĝis la evolulinion de la hungara lingvo, ĉar la predikistoj alparolis siajn fidelulojn en ilia gepatra lingvo. János *Sylvester*, adepto de la ideoj de



Germana ĵurnalo heroldanta la okupon de Buda, en 1541

Erasmo, tradukis hungaren la Novan Testamenton; en 1590, Gáspár *Károli* pretigis jam la kompletan tradukon de la Biblio. Sebestyén *Lantos de Tinód*, kronikisto de la bataloj en la landlimaj fortikaĵoj, rakontis la heroaĵojn en la hungara lingvo, per rimitaj versaĵoj; kaj Bálint Balassi, la unua elstara personeco de la hungara liriko, atingis la ĝistiaman plej altan pinton de la hungarlingva poezio montranta jam aprezindan literaturan valoron.

Libro de Péter Bornemissza, elstara verkisto en la epoko de la Reformacio


TRAGOEDIA
MAGIAR NELVENN, AZ
SOPHOCLES ELECTRAIABOL
Na giob rezre forditatot, ez az Kerez
teneknek erkoec zóknek iobitasokra
peldaùl szepen iateknak mogia
sze rint rendeltetet Pesti
Bornemizzà Peter
deak altal.
Luc: VI.
Iai nęctek kik ueùettek most,
mert męg sirtok.
M. D. LVIII.

La preĝejo de Hasano Jakovali, nun muzeo, en urbo Pécs



Refoje pri teatro

Nia numero 6/1978, kiu estis dediĉita al la Esperanta teatro, vekis vastajn reeĥojn. Ni ricevis plurajn artikolojn ankaŭ, interalie ampleksan studon el la plumo de Aldo di' *Giorgi*. Ĉi-sube ni publikigas parton de tiu studo, kiu atentigas pri aspektoj eble ne sufiĉe emfazitaj en nia teatra numero.

. . . Rigardante en retrospektivo la ĝisnunajn atingojn de la esperanta teatro, oni povas formuli plurajn rimarkojn. Ĉar la ĝeneralan situacion ni ne povas taksi kontentiga, oni povas senĝene aserti, ke multo restas por fari.

Unue mi ripetas la konstaton, ke preskaŭ tute mankas vere ludindaj tekstoj; la ekzistantaj tradukoj ne ĉiam estas senriproĉaj el lingva vidpunkto kaj la plej multaj jam arĥaikiĝis. Originalaj tekstoj estas tre malmultaj kaj konsistas preskaŭ ekskluzive el mallongaj, naive popularecaj satiraĵoj.

Ankaŭ la nivelo de niaj aktoroj estas kutime tre amatora, malgraŭ la apologiaj emfazoj de niaj recenzistoj. Tro ofte, ekzemple, tiuj aktoroj posedas sufiĉan teatran metion sed tre proksimuman konon de Esperanto, tiel ke ilia elparolo tre ofte sentigas la naciajn kadencojn kaj prononcapartaĵojn. Kaj inverse, ekzistas aktoroj kun bona kono de la esperanta elparolo sed kun tre lama recita metio.

La jam priplendita multfakeco de niaj verkistoj, la konstatita neekzisto ĉe ni de aŭtoroj funde specialiĝintaj en la verkado por teatro, tre limigas la eblecojn, ke ankaŭ tiu aparta ĝenro povu fariĝi sinkrona kun la pli ol digna nivelo atingita en aliaj literaturaj kampoj, ekzemple en poezio. Tro heterogena verkado, fakte, ne estas konceptebla en vere serioza literaturo, kie la plej altajn pintojn de arto oni povas atingi nur pere de longa studado kaj pacienca specialiĝo. Alvenis la tempo, kiam improvizado kaj diletanteco ne plu havas rajton je civitaneco en nia maturiĝinta literaturo. Kaj tio validas ĉefe por la teatro-verkado, malfacila fako, kiu postulas la konon de apartaj teĥnikoj, tempoj, ritmoj, majstradon de la semiotikaj leĝoj kaj teorioj.

Ni ne forgesu, ekzemple, ke, diference de prozo aŭ de radio-ludoj, la sursceneja teatro estas ne nur parolo sed ankaŭ – kaj ne malofte ĉefe – ago, movo. Krome, se ekzemple en romanoj la dialogoj nur mallarĝproporcie konsistigas la esencon de la verko, en teatro dialogoj ludas la cefanrolon. Krome, pecoj konsistantaj el longaj monologoj kaj senmovaj rezonadoj nur malofte taŭgas por teatro. Kaj la nemalmultaj esceptoj en la nacilingvaj teatro-verkoj ne malkonfirmas tiun regulon. Ja, Shakespeare produktis verkojn kun longaj monologoj, sed li estis li. Kaj se Cocteau verkis „La voix humaine", kie nur unu aktoro senpaŭze monologas, tio restas sukcesinta escepto, tamen nur escepto.

Kromaj konsideroj. Laŭ Carlevaro teatraj verkoj estas malmultaj en nia literaturo, pro tio ke ekzistas malmultaj teatraj trupoj. Laŭ mi, tio estas ne tute ĝusta. Laŭ mi ekzistas malmultaj teatraj trupoj, ĉar ne ekzistas publiko; ĉar ne ekzistas la eblo organizi regulajn turneojn, por reciti regule kaj ne nur sporade, antaŭ plurnacia, *komprenanta* publiko (ankaŭ dum U.K. maksimume unu triono de la ĉeestanta spektantaro komprenas ĉion recititan).

Mi eĉ diru, ke en la historio de la Internacia Lingvo eble ekzistis pli da teatraj trupoj (improvizitaj, efemeraj, se vi volas) ol da reciteblaj tekstoj. Demonstre oni povas atentigi, kiel multaj teatraj ensembloj estis ofte devigataj mem verki aŭ traduki la recitotajn tekstojn (vidu ekzemple BET, kies plej multaj surscenigitaj pecoj estis tradukitaj de Draĵev mem).

Ni ne forgesu ankaŭ, ke teatraĵoj por esperantista publiko postulas tute apartajn startprincipojn, nome, oni devas atenti, ke oni sin adresas al internacia publiko, al personoj kun tute malsamaj kulturfonoj, etikpreparoj kaj gustoj. Carlo Minnaja, ekzemple, atentigis, ke ne ĉiam la tipe regionaj humuroj de Molière aŭ de Goldoni same efikas kaj estas komprenataj de la orienteŭropanoj. Inverse ne ĉiam la fatalismaj filozofiadoj de la rusaj aŭtoroj aŭ la introverta simbolismo ekzemple de Kafka estas ĝisfunde digestataj de okcidentanoj. Por ne paroli pri spektantoj kun tute aliaj, ekstereŭropaj kulturpreparoj.

Tial mi opinias, ke ĝis nun neniu aŭtoro jam verkis ion komplete konvena por la esperantista publiko, ion vere internacia.

Kelkaj klopodoj estis faritaj tiudirekten. Ekzemple Giorgio Silfer verkis kaj mem enscenigis drameton „Doktoro Rosales", kiu celis – estas liaj vortoj – „enkonduki Esperanton en teatron – evitante tradukaĵojn kaj forlasante la kutimajn stereotipajn temojn de la prozo en la internacia lingvo", kaj „aldoni la strebon rekte partoprenigi la spektatorojn en la *reprezento*, kaj la ĝuon pri *introrsa* analizo, hereditan el miaj studoj pri Pirandello kaj nordamerikaj aŭtoroj". Tamen, malgraŭ tiaj asertoj, la rezulto estis aborta.

Jen, post tiu hasta trarigardo, kiu neniel pretendas esti elĉerpa, multaj aliaj rimarkoj kaj deduktoj estus eltireblaj. Kaj, tiucele, ege gratulindaj estas la aranĝoj, kiuj floradas lastatempe por stimuli la debatojn pri ĉi tiu tute ne malgrava temo, kaj por, konsekvence, instigi intereŝiĝon kaj ekaktivadon en la fako. Tial, post la iniciato de Itala Esperantista Junularo, kiu dediĉis al teatro la studrondon de la Internacia Junulara Festivalo, okazinta en Jesolo dum Pasko 1978, post la tre sukcesinta Internacia Teatra Renkontiĝo", organizita de Pola Esperanto Asocio pasintan Majon, tre bonvena estis la speciala numero de HV.

Aldo *di Giorgi*

Finkontrolado de distribuiloj en la fabriko Bakony Művek en Keszthely. Ĉi tie funkcias ankaŭ Esperanto-brigado.

Miloj da aŭtoj ĉe la renkonto de ŝoseoj M1 kaj M7 antaŭ Budapeŝto

Aŭtomobil-produktado – sen aŭtomobil-fabriko

En la nuna epoko verŝajne unu el la kulminoj de la vaste aplikata teknologio estas la produktado de aŭtomobiloj, ja tiuj relative malgrandaj kreaĵoj de la homo sintezas en si la atingaĵojn de pluraj kampoj de la tekniko kaj scienco. El tio sekvas, ke la produktado de aŭtomobiloj efikas stimule al pluraj brancoj de la industrio, ĉar ĝi kvazaŭ postulas ties intensan evoluon.

Antaŭ iom pli ol dudek jaroj, kiam sentebla bezono de personaj aŭtomobiloj aperis en Hungario, la ekonomiaj gvidantoj staris antaŭ dilemo. Ĉu konstrui propran fabrikon, aŭ komenci kunlaboradon kun eksterlanda entrepreno?

Meze de la kvindekaj jaroj venis propono de la firmao Opel, sed la jaro 1956 interrompis la traktadojn. Alia kunlabor-oferto venis el Japanujo: ĝi celis starigon de kunmuntejo en nia lando, sed baldaŭ montriĝis, ke la transportkostoj de la pecoj estus tro grandaj.

Evidentiĝis ankaŭ, ke starigo de eĉ nur kunmuntejo signifus troan ŝarĝon por la hungara ekonomio. Tial estis tre favora por ni propono veninta el Sovetio antaŭ dek du jaroj: ĝi estis invito kunlabori kun la granda aŭtomobilfabriko ĉe Volgo, konstruita surbaze de FIAT-licenco.

En la jaro 1968 estis subskribita interkonsento, laŭ kiu Hungario liveros al la soveta fabriko glacoviŝil-kompletojn, startigilojn kun stirrad-fiksilo kaj aliajn elektrajn ekipaĵojn. Entute kvin hungaraj entreprenoj partoprenis en la liverado, sed la plej grandan taskon ricevis la *Fabriko Bakony* en la departemento Veszprém (norde de la lago Balatono).

La komenco de la kunlaborado ne estis tre flora. La Fabriko Bakony ne kapablis plenumi la limdatojn de la liverado, kaj ankaŭ la produktokostoj grave (duoble) superis la atenditan kaj dezirindan nivelon. Necesis ŝtata helpo financa kaj organiza: la nekapable laborintaj gvidantoj estis eksigitaj, kaj la fabriko ricevis subvencion por evoluigo.

La interveno havis bonajn rezultojn: ĝis la jaro 1975 ĉio ordiĝis, kaj la produktado de elektraj ekipaĵoj por Lada fariĝis glata kaj ankaŭ profitiga. Nuntempe la ĉiam pli famiĝanta Lada-veturiloj ĉie en la mondo kuras sur la ŝoseoj kun hungaraj elektraĵoj.

La Fabriko Bakony fakte estas nia sola „fabriko de aŭtomobiloj". Por la elektraj instalaĵoj faritaj en Hungario, ĝis nun ni ricevis 120 000 aŭtomobilojn el Sovetio; nuntempe la jara kvanto jam estas 10 000 veturiloj.

Intertempe formiĝis samspeca kunlaborado kun la sovetaj fabrikoj *Moskviĉ* kaj *KAMAZ* (fabriko de kamionoj), kaj ankaŭ kun *Polski Fiat*. Progresas intertraktoj pri eventuala kunlaborado kun fabrikoj en Jugoslavio kaj Rumanio.

La hungara industrio per tiu ĉi kunlaborado elektis vojon tre adekvatan al la cirkonstancoj de nia lando: ni havas malmulte da krudmaterialoj, kaj la enlanda merkato fakte ne sufiĉus por profitige funkciigi propran aŭtomobilfabrikon. La elektraj instalaĵoj de aŭtomobiloj enhavas malmulte da krudmaterialoj, kaj la granda soveta fabriko povas mendi kvanton abunde sufiĉan por profitiga, grandseria produktado.

V. B.

Gyula Csák

En ŝtrumpetoj

Masto, klif-roko, ŝtalo – tiaj komparoj venis en la kapon, kiam oni alrigardis la sinjoron profesoron, aŭ kiam nur temis pri li okaze de ia konversacio. „Absoluta viro." „Vir-idealo de ĉiuj tempoj" – tiaĵojn oni diris pri li. Kaj lastatempe ankaŭ jenon: *superman.*

Li instruis gimnastikon kaj dum la gvidado de la ekzercoj li ĉiam trovis okazon por interkroĉi kun la trejnado de la korpo la konstruadon de la karaktero. „Konkave la ventron, knaboj! Streĉetendi la spinon! – li stentoris super la plumpa, senforma, bubkorpa grego. Kaj, se estis necese, eĉ ne sia aĝo de kvindek ok jaroj li ne estis pigra montri mem, kiel oni devas meti sin en „ponton". „Menso sana en korpo sana" li ripetadis multefoje, kaj se iu malfruis en la horo aŭ faris komfortaĉe la preskribitajn ekzercojn, pasie li tondris siajn principojn spartajn pri devo, forto, persisto.

Same li kondutis en la ekster-lerneja adolta vivo. Li iris ĉiam kun entirita ventro, antaŭen-streĉita brusto kaj levita kapo. Kaj kvankam la movado PLB (Preta Labori kaj Batali) jam eksmodiĝis, ĝis nun troviĝis kelkaj dekduoj da homoj en la urbeto, kiuj entreprenis iradi al la sportejo kaj trejni sian korpon laŭ lia reglamentado.

Ankaŭ li mem „laboris" en trikotaĵo kaj senindulge knedis la molaĉan bandon. „Konkave la ventron!" – li kriĉis al la kavabrusta aŭ grasatrunka, ĉiamaniere turpakurba ensemblo. – „Belan korpotenon! Eĉ se vi rompos al vi spinon, gardu pri la bela korpoteno!"

La simboliko de liaj vortoj kaŝiĝis, pli ĝuste: tute ne kaŝiĝis, eĉ tre klare vidiĝis en ĉiu momento de lia vivo kaj donis malproksimen lumantan ekzemplon pri la unueco de la teorio kaj praktiko.

„Dio, patrujo, familio" jen estis la sumo de lia morala mondbildo . . . iam antaŭe, sed nun, influite de la nova epokspirito, li modifis ĝin jene: „Laboro, patrujo, familio". Ĉi tiu devizo, kiun ofte li deklaradis ĉe siaj publikvivaj funkciadoj, ŝajnis tiel ĝusta, ke ĝi tute ĝeneraliĝis, kaj la partia sekretario finis per ĝi ĉiujare sian solenan paroladon je la sepa de novembro.

Iam la sinjoro profesoro ellernis ankaŭ la kantorecon, kaj sian ĉi-koncernan diplomon li povis bone utiligi ĉe la instruado de laboristaj kantoj.

Digno kaj aŭtoritato radiis el li en ĉia situacio. Ne riproĉebla li estis ankaŭ en sia familia vivo. Al sia fragila, mild-rideta edzino li elmontris ja tenerecon kelkafoje, sed nur en tia mezuro, kiu ebligis al li ĉiumomente retiriĝi kaj postlasi nenian spuron perfidan, nenian memoron, kiu revokus liajn malfortajn minutojn. Ilia interrilato, escepte de la – pli kaj pli maloftiĝantaj – noktaj kvaronhoroj, pli similis tiun inter oficiro kaj oficirservisto ol tiun inter geedzoj.

La vivo de la sinjoro profesoro do estis volba konstruaĵo el bazalto, de ega firmeco kaj solideco: tia vidaĵo, kiu, kun ĉiuj siaj apartenaĵoj, apenaŭ similis iom la dise videblajn kaj falemajn homo-vivojn. Pleje ĝi ŝajnis fundamentita sur la feraj leĝoj de la matematiko.

Ĝis foje disfalis ĉi tiu superba konstruaĵo kaj sepultis sub siajn ruinojn sian konstruinton.

Oni invitis la sinjoron al renkontiĝo okaze de la kvardekjara jubileo de lia matur-ekzameno. En akompano de sia edzino li eniris noktan trajnon, por povi ĉeesti en la signita tempo kaj loko, en Budapeŝto. Ili ricevis malplenan kupeon, kaj la sinjoro profesoro opiniis allasebla, ke ili loku sin komforte, hejmece kaj ripozu kelkajn horojn. Ili lasis malsupren la fenestron, pro kio enfrapis bruo, sed ankaŭ freŝa aero, kvazaŭ ne-senebla, rigarde al la sufokaera somervetero. La sinjoro profesoro demetis sian jakon kaj metis ĝin zorgeme sur la valizo-tenilon, demetis ankaŭ la ŝuojn, poste kuŝiĝis sur la kusenita sidejo kaj baldaŭ endormiĝis. Tiel same ankaŭ lia edzino.

Tiam ili vekiĝis, kiam la trajno jam malrapidiĝis kaj, kun milda puŝiĝo, haltis sub la vitrokupolo de la Orienta Stacidomo. Ĉar ili havis nenian kaŭzon hastadi – la trajno alvenis ja sian finstacion – komforte ili komencis kolekti siajn aĵojn.

– Ĉu vi ne forprenis miajn ŝuojn, mi vin petas? – demandis la sinjoro profesoro kun dormema voĉo.

– Ne – respondis lia edzino.

– Strange – murmuris la sinjoro profesoro, poste incitite li kliniĝis por pli funda ĉirkaŭesplorado. – Ĉi tien mi metis ilin.

Nenie ili estis.

– Nu jen, vidu la mondo! – li metis la manojn sur la koksojn. Kaj kvankam li klopodis gardi sian famiĝintan trankvilon kaj dignon, iom da angoro trakuris sur lia vizaĝo.

Ili rekomencis serĉi kaj metode traesploris la kupeon, sed la ŝuoj estis netroveblaj.

La trajno dume malpleniĝis, la vojaĝantoj foriris, kaj maljunulino de malamika sinteno aperis en la kupea pordo kun balailo kaj sitelo.

– Sekvas purigado – ŝi diris krude. – Oni moviĝu, ĉar la vagonaro ne estas hotelo!

La sinjoro profesoro plenspiris sian pulmon kaj estis preta admoni la alvenintinon, sed lia edzino lin antaŭis.

– Mi vin tre petas – ŝi ekvoĉis milde – al mia edzo . . . la ŝuoj . . . perdiĝis. Eble vi povus helpi, ke ni trovu ilin.

– Perdiĝis? – miris la maljunulino, poste gestis mansvinge, trempis la balailon en la sitelon kaj frapadis la akvon dekstren-maldekstren. – Kial ili perdiĝus? Oni ŝtelis ilin. Ilin vi povas ja serĉi senfine. Granda halo, ĉambro numero dek kvar. Tie vi devas anonci la aferon, se iu entute troviĝas nun tie.

– Pli bone, se ni ne diskutos – trankviligadis la edzino la edzon kaj, kunpreninte siajn valizojn, ŝi ekiris. La sinjoro profesoro sufokiĝadis de la senpova kolerego, sed, rekoninte, ke nun li povas fari nenion alian, li postiris sian edzinon.

– Ne rapidu tiom, mi petas.

Lia edzino haltis, sin returnis, sed kiam ŝi rigardmezuris la viron ankaŭ nun bravstaturan, en bone tajlita kostumo, sed sen ŝuoj, apenaŭ rimarkebla rideto ekbrilis en ŝiaj okuloj. Sed la sinjoro profesoro rimarkis tion.

La ĉambron numero dek kvar ili trovis malplena. Senkonsile ili tiriĝis apud la muron kaj la sinjoro profesoro stariĝis post la kofron.

– Eble . . . mi vokos taksion – diris la edzino.

– Kaj kien sur tiu ni iros? – demandis la sinjoro profesoro.

– Eble . . . vendejon de ŝuoj . . .

– Kie vi trovos dimanĉe ŝuo-vendejon nefermitan?

– Ni povus iri en restoracion . . .

– Kaj poste? Ĉu anstataŭ rostaĵo mi petu de la kelnero ŝuojn?

– Eble – meditis plu la edzino – ni revojaĝos per la plej proksima trajno.

– Kaj ĉu hejme mi marŝu tra la stratoj . . . nudpiede?

– Mi alportus ŝuojn al la stacidomo . . .

Ankaŭ ĉi tion malakceptis la sinjoro profesoro. Li proponis, ke prefere ili serĉu ie subpordegan ŝuiston privatsektoran, kiu ankaŭ loĝas samloke.

Ili ekiris sur la avenuo Rákóczi, sed apenaŭ ili iris kelkajn paŝojn, la sinjoro profesoro ekvidis, ke konato proksimiĝas, kaj de la timo esti rekonita, lin kaptis neatendite forta urinemo. Lia tuta situacio, ties komikeco kaj tragikeco, nun jam ŝarĝis lin per tia pezo, ke sub ĝi kaj figure kaj reale li fleksiĝis.

– Haltu, mi petas – li diris al la edzino iranta antaŭ li. – Paŝu strikte antaŭ min. Unu konato . . .

La edzino haltis, alrigardis lin, kaj li ree rimarkis, ke ia insida gajeco embuskas en ŝia rigardo. Li reprenis sian tutan forton por ree ekposedi la kutiman senton de neniiga superemo kontraŭ sia edzino, kaj elrektiginte sin, li admonis:

– Reprenu vian prudenton, mi petas . . .

Sed nun tio jam ne sukcesis. El la edzino eksplodis freneza jelpado-simila rido, kaj ju pli severe ŝin alrigardis la sinjoro profesoro, des pli senbrida ĝi fariĝis.

Kiam post tre longe ŝi kvietiĝis, ŝi viŝis siajn okulojn kaj diris:

– Pardonu . . .

La sinjoro profesoro kun senmovaj, vitriĝintaj okuloj ŝin rigardis, poste, ŝveliginte sian bruston en la kiel eble plej granda mezuro, li diris rigide kun senkolora voĉo:

– Kompreneble vi konscias pri tio, ke mi eksedziĝos.

– Kompreneble – kapbalancis la edzino preskaŭ ĝentile kaj kun sensanga bonhumoro. – Ja neniam vi min amis, kaj post la unuaj semajnoj ankaŭ mi ne amis vin. Post tridek sep jaroj nun ree mi amis vin iomete, ĉar troviĝas en vi io homa tiamaniere en ŝtrumpetoj, sed ĉi tio certe ne ripetiĝos plu.

Poste ree ŝi ridis, serene kaj libere.

Trad.: K. Kalocsay

Attila József

Jam dumiliarda . . .

Jam dumiliarda homaro min ligas
en tiu ter' por iĝi best' fidela.
Sed for de l' mond' ilia suden migras
la milda sento kaj la bono bela.
Ilian kosmon mi esplori tra
la lum' ne povas en fiolo vitra,
rezigne cedus mi al sort' arbitra,
se vi ne helpus min, ho amo vera.

Mi vin bezonas, kiel la plugantoj
la humon, pluvon, tagon sunebrilan,
kiel bezonas por la viv' la plantoj
en la folioj verdon klorofilan,
kiel inerta, laboranta, spita
amas', tremanta kaj ekscita
pro la futur', sufere ne naskita,
liberon, panon kaj la bonon diran.

Mi vin bezonas, Flora, kiel puton,
lernejon, domon, lumon la vilaĝo,
kiel infanoj varton kaj la ludon,
konscion homan laborista klaso,
kiel modelon la povrulo, virton
kaj en tiun kaosan implikiton,
socion ni bezonas, la spiriton,
kiu por voj' sin montras per la sago.

Tr.: Márton Fejes

Mauro Nervi

AL KALOCSAY

Kaj tamen mi relegas la poemojn
de via juno, Kalocsay, kaj pensas,
ke laŭkutime bone vi kompensas
la ĉagreneton legi. Lipotremojn

abunde vi disdonas; molajn ĝemojn
romantikulajn vi troige lensas.
Kaj tamen mi relegas la poemojn
de via juno, Kalocsay, kaj pensas.

La pioniroj raŭkas: „Kiajn gemojn!"
kaj tra la ŝpino longan tremon sensas;
sed stultaj laŭdoj, kiuj vane densas,
stimulas nur la junajn malŝatemojn.

Kaj tamen! Mi relegas la poemojn.



John Islay Francis (1924–) estas unu el la plej originalaj figuroj de la moderna Esperanta literaturo. Li debutis kiel poeto en la antologio KVAROPO (1952 kaj 1977), sed poste li turnis sin al la prozo. La novelaro VITRALO (1960) distingiĝas per sia groteska-satira tono, dum LA GRANDA KALDRONO (1978) estas monumenta realisma romano – laŭ pluraj kritikistoj la plej bona originala romano, iam verkita en Esperanto. Nun la aklamita prozisto reaperas kiel poeto.

John Islay Francis

ĜERALDINA

Ĉu vivo revis vin kreante
ĉiel subliman, sen difekto?
Kvankam animoj pri perfekto
mensogas, kiam briliante

beloj kunpendas, se pedante
ni reesplorus, ia aspekto
senŝarĝus nin de l' miskoncepto.
Do se per vi perfekt' konstante

sin manifestas, kaj se kuŝas
obseda kaj senintermita
sorĉo sur vi, naturo fuŝas.

Sed montris ja ridet' subita,
ke l' antaŭdentoj kruce tuŝas –

farante ravon pli incita!

2

Nigra hararo sidas krone
super okuloj radiantaj
lumon mortigan – sed ŝirmdone
nigra hararo sidas krone.
Vido levota fine do ne
tediĝos tuj de aĵoj vantaj:
nigra hararo sidas krome
super l' okuloj radiantaj.

3

Mi himnas vin, la Belon mem;
svatajn fuŝontojn do devancis,
ĉar tia sorĉo ĉiam lancis
plej prozajn korojn ĝis ekĝem',

kaj stimulite al verkem'
eĉ la Komerc' ekstravagancis.
Mi himnas vin, la Belon mem;
svatajn fuŝontojn do devancis.

Ĉu vin adoros fuŝpoem'?
Dum sort' ankoraŭ sin balancis
feliĉe vi renkontis Francis,
kaj ekzaltite de la tem'

Li *himnas vin, la Belon mem.*

4

Estu kompata, kaj lasu memoron.
Kial restante perturbi sen fin'?
Nura fantomo ne rajtas adoron.

Antaŭ vi mem mi ŝajnigis ignoron,
flegmis parade kun brava obstin'.
Kial post iro do plendi la foron?

Suno mergita postlasas la gloron;
same persistas sur mia retin'
glora miraj , kiu ĉendas fervoron.

Arde gravuras ĝi ĉiun kontoron;
tamen anstataŭ l' konita kombin'
rete skarifas konfuzan simbolon.

Tiu spiteme fintadas esploron,
daŭre ŝanĝadas kaj retiras sin,
fone ŝvebadas rolante sufloron.

Floro plu ĉarmas lasinte odoron:
kvankam foriris vi mem Ĝeraldin',
estu kompata, kaj lasu memoron;
nur parcimono ne rajtas adoron.

5

Vi, belo drasta, nepre el
la mitoj venis, kaj por ter'
tro brilas. Ni, mortemaj fine,
ekbrulas ja, sed brulinkline
orbitas daŭre ĉe kandel'.

Sidis en ĉambro vi domine;
la inoj gvatis – nu, virine,
kaj – jes, eĉ min – vi kuspis per
ĉi belo drasta.

Ĝin mi spitadis kun fier',
sed fordegelis ĉi aŭster',
kaj postnelonge (kvankam vi ne
eĉ notis tion) cedis kline,
ĉar enuigas pri liber'
ĉi belo drasta.

6

Viajn okulojn
vidinte mi vertiĝis;
sed pro blindigo,
aŭ post vivapogeo,
la mondo tuj griziĝis.

7

Dummanĝe – SANGO?!
Frontante vin mi prenas
forkon el vango.

8

Mi iam povis ja imagi
diinojn, kies bel' superos
naturon, kaj sukcesis blagi
al mi, ke tiaj eĉ aperos –
je kio, cedon mi preferos
al venk' facila, sendolora;
do nun, se daŭre vi surteros ,
mi estos via sklav' fervora.

Mi lasos mian vidon vagi,
kie sorbado nur generos
avidon; igos ĝin zigzagi
ĝis tuton sate ĝi parkeros;
kaj kvankam ĉiu paŭz' kaperos
epokon dum rigard' devora,
ne sole Tempo min konkeros:
mi estos via sklav' fervora.

Ĉu malprudente tiel agi:
ekstazi ĉar okuloj belas?
Ne ĉiam koren povos sagi
rigardo, kiu degeneros.
Nu, mia menso ne mizeros
sub la Praktiko diktatora,
kaj ĝuste ĉar la pens' liberos,
ĝi estos via sklav' fervora.

Princino mia, efemeros
allog' de Belo provizora;
sed dum la via tiel helos,
mi restos ĝia sklav' fervora.



Éva Hajós

Priŝtelante la naturon

Mi esperas, ke niaj legantoj helpe de ĉi tiu modesta kroniko ricevas iometan gustumaĵon el la artvivo de nia epoko. Jes, ĉar Hungario estas parto de la mondo, do la ĉefaj tendencoj, modoj – jam ekde du jardekoj – estas similaj al tiuj en aliaj landoj.

Estas tre interese, ke post la antaŭa numero, post la plej tipa moderna artisto, Endre *Bálint*, mi deziras prezenti al vi pentristinon, Éva *Hajós*, kiu laboras ankaŭ nuntempe laŭ la tradicia stilo. Ŝi pentras bildojn pri pejzaĝoj, pri ŝatataj floroj, objektoj kaj pri homoj, foje-foje pri si mem. Ŝiaj bildoj vere similas la modelojn. Kompreneble ne tiel, kiel scias fiksi la naturan bildon fotoaparato, sed tiamaniere, kiel nur homo kapablas travivi ian okazaĵon, observi ian vidindaĵon.

Ŝin tute ne ĝenas la plej novaj modoj de la pentrarto, kiuj ankaŭ en Hungario estas tre fortaj fenomenoj. Kiel multaj, ankaŭ ŝi ne kredas, ke la nonfigurativa stilo povas diri al la samsortanoj ian daŭran esencon pri la homoj kaj iliaj sortoj.

Kaj mi opinias, ke la *Domoj en Malnova-Buda, La ruĝĉapela fraŭlino* kaj aliaj ŝiaj pentraĵoj estas ankaŭ modernaj verkoj, ĉar ili gardas memoron de la nerompitaj, lastaj domoj en la malnova kvartalo de nia ĉefurbo, (kie vivas kun sia familio Éva Hajós, en sesetaĝa domo), la bildon de *hodiaŭa* Budapeŝtanino, kiel ŝi staras antaŭ la spegulo, eble kiel ŝi atendas elektran veturilon aŭ aŭtobuson. Sendube: *La ruĝĉapela fraŭlino* estas nia samsortano, kiu vivas je la fino de la 20-a jarcento kaj ne alitempe, en Eŭropo, ankoraŭ pli precize en Mez-Eŭropo, ankoraŭ pli precize en Mez-Eŭropo, kaj ne aliloke.

Mi pensas, ke la tria bildo – estu ĝia titolo: *Priŝtelante la naturon* – estas kuriozaĵo. La artistino, sur la pinto de iu monto proksime de Budapeŝto, kun sia „korpgvardiano". Jen, tiel naskiĝas multaj pejzaĝbildoj: ĉi tiu metodo, eblo estas same *nuntempa* situacio, kiu apartenas al iu fiksita tempo kaj loko.

Fine menciinde, ke Éva Hajós estas ankaŭ konata grafikistino, kiel partoprenanto de ekslibrisaj ekspozicioj en Hungario kaj aliaj landoj.

Mihály *Gergely*

Domoj en Malnova-Buda

La ruĝĉapela fraŭlino

PANNONIA







PANNONIA Eksterakomerca Entrepreno de UZINOJ CSEPEL

Budapest, VI., Bajza u. 26. 1062
Telegramadreso: PANEXPORT Budapest
Telefono: 228–850. Teletajpilo: 225128 PANEX–H
Poŝta adreso: Budapest, P. f. 354. 1394

•

Fajnmetalurgiaj duonfabrikaĵoj por telekomunikada tekniko, elektra kaj elektrona industrioj

•

Inkandeskaj elektrodoj kaj kablokerno por pretigo de elektrodoj de temperature regulita fandofitingo[2]

•

Ŝtaltuboj
Ŝtalboteloj por oksigeno ktp.
Bicikloj por sinjoroj, sinjorinoj kaj infanoj
Biciklo-konsistaĵoj

•

Maŝinoj por la konfekcioindustrio
- **Elektraj tajladmaŝinoj**
- **Kudromaŝinoj**
- **Gladmaŝinoj**
- **Gladilaro**

Specialaj maŝinoj kaj iliaj subtipoj

•

Maŝinoj por lavejoj kaj por la teksaĵpuriga industrio

•

Kompletaj konfekcio-instalaĵoj por teksaĵ- kaj led-konfekcio-industrioj

•

Kompletaj lavejoj kaj vestpurigejoj

•

Transportinstalaĵoj por konfekcio-fabrikoj kaj lavejoj

•

Prilabormaŝinoj por tuboj kaj stangoj
- **Pintigmaŝinoj**
- **Tub-rektigaj, fleksaj maŝinoj**
- **Longigaŭtomatoj por tubo kaj stangoj**

•

Spiraltub-veldejoj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por produktato de senfugaj tuboj

•

Maŝinoj kaj uzinoj por ŝtalbotel-fabrikado

•

Maŝinoj kaj uzinoj por pretigo de arklum-veld-elektrodoj

•

Instalaĵoj kaj uzinoj por pretigi biciklo-konstruerojn, kaj por munti biciklojn

•

Konigo de Know-how[2] **kaj teknologio, instrukcioj por fakpersonaro**

[1] **fitingo** (PIV): kuniga interorgano (mufo, krano) de tubokondukiloj (por brulgaso, akvo); interĝustiga tubo, vaporkondukaj tuboj.

[2] **Know-how**: fabrikad-teknologio, »scii kiel«

Tr. Alfonso *Pechan*

La fortreso de Visegrád en la pitoreska Danubo-kurbiĝo

Fortreso-pretkonstruita

Preskaŭ naŭ mil artaj kaj historiaj konstruaĵoj estas registritaj en nia lando. La inspektoradon kaj la faklaborojn kun granda faksperto prizorgas la Tutlanda Oficejo pri historiaj konstruaĵoj. Al ĝia laboro apartenas ankaŭ esplorado kaj planado; malkovro de novaj memoraĵoj el la historio de agrikulturo kaj registrado de konsiderindaj, interesaj konstruaĵoj kiuj havas dokumentan valoron pri sia epoko.

Sep konstruestraroj funkcias grupigitaj ĉirkaŭ historiaj urboj de la lando – Eger, Nyíregyháza, Pécs, Sopron, Székesfehérvár, Szombathely kaj Visegrád kaj en la ĉefurbo laboras la centra oficejo kaj metiejo.

La Oficejo pri historiaj-konstruaĵoj ĉijare disponas pri 100 milionoj da forintoj el kiuj preskaŭ cent konstruaĵoj estas renovigataj, resp. estos pretkonstruitaj en 1979. Krom tiu sumo ankaŭ la konsilioj kaj la eklezioj elspezos proksimume 500 milionojn da forintoj por la sama celo.

Al la plej signifaj laboroj apartenas la baldaŭ finiĝonta rekonstruado de la fortreso de Visegrád kaj tiu de la „Malhela Pordego" de Eger. Plue estas daŭrigata la renovigo de la romkatolika preĝejo de Feldebrő, de la fortikaĵo de Csesznek en la montaro Bakony kaj tiu de la franciskana monaĥejo en Siklós ktp.

La Oficejo havas aktivan rolon ankaŭ en arthistoria sciencpopularigo. Ĝi organizas landajn renkontiĝojn por fakuloj, partoprenas en la antaŭpreparo de sekcio pri protektado de artobjektoj en la somera universitato de Eger kaj en la helpado de la populara movado „Regionoj, epokoj, muzeoj".

Hungara Filmo 78

Hungaraj kaj eksterlandaj fakuloj enketis post la 11-a revuo de la hungaraj filmoj produktitaj en 1978. Dr. Szilárd Ujhelyi en la enkonduka prelego emfazis, ke kontentigante la pretendojn de amuziĝo niaj filmoj devas direkti la atenton ankaŭ pri aktualaj sociaj problemoj. Li memorigis pri tio, ke jam dum la pasintjara film-revuo estis rimarkebla la tendenco al dokumentismo. Tiuj filmoj, uzante erojn de la realo, fekundige influis eĉ la klasiksencajn ludfilmojn. Sed oni atendas ankaŭ de la dokumentfilmoj, ke ili ne cedu al la malkovritaj, implikiĝintaj faktoj, sed volu trovi kaj montri direkton inter ili.

En la diskuto post la enkonduka prelego oni konstatis, ke montriĝas manko de gajaj, amuzaj filmoj. La publiko pretendas pli grandnombre filmkomediojn.

PANO

Jubileo

Unu el niaj mondfamaj naciaj trezoroj estas la hungara ruĝa papriko. Pri ĉi tiu nia ne malhavebla spicokreskaĵo, devenanta ankoraŭ el la turka epoko, scienculoj komencis okupiĝi antaŭ sesdek jaroj en Kalocsa. De tiu tempo oni selektis kreskaĵojn kaj gajnis tiujn plej taŭgajn specojn, el kiuj Hungario ĉiujare eksportas plurajn dekmilojn da tunoj de Kaplando ĝis Groenlando.

La 80–100 kvintalan rikolton por hektaroj prilaboras Papriko- kaj Konservindustria Entrepreno de Kalocsa. Post la kontentigo de la enlandaj bezonoj oni eksportas paprikon en valoro de 4 milionoj da dolaroj jare.

Okaze de la jubileo estis aranĝita scienca konsultiĝo en Kalocsa, centro de la papriko-esploro, kaj oni inaŭguris memortabulon honore al elstaraj esploristoj de la papriko-selekto.

En la tempo de kapsiko-rikolto la muroj d
de sekiĝantaj,

RAMO



La konstruaĵo de la aŭlo de la Agronomia Universitato en Gödöllő

uĝa oro"

noj en la ĉirkaŭaĵo de Kalocsa estas ornamitaj
psiko-girlandoj

Vizite ĉe agronomoj

Granda grupo da agronomoj el Germana Federacia Respubliko vizitis – inter alie – la Ŝtatan Bienon de Szombathely, la Agronomian Kombinaton de Agárd kaj la studbienon de la Agronomia Universitato de Gödöllő. En ĉiu universitato studas pli ol mil studentoj en moderne ekipitaj laboratorioj, prelegejoj kaj praktikas sian scion en la studbieno.

Hungario prezentis sin en Parizo

La Hungara Fremdultrafika Oficejo reprezentis Hungarion en la Mondekspozicio de la Internacia Turisma Semajno en Parizo. Por la prezentadoj de la hungara pavilono kontribuis ĉiuj hungaraj vojaĝoficejoj. – Pasintjare 36 mil francaj turistoj vizitis Hungarion kaj 22 mil hungaraj turistoj vojaĝis al Francio.

Hungaraj popolartaĵoj en Madrido

La *Urbis Club* en Madrido kun kontribuo de la hungara ambasado aranĝis ekspozicion el artaĵoj de la Hungara Etnografia Muzeo. En la malfermo de la ekspozicio, kie parolis László *Perczel*, hungara ambasadoro, aperis multaj konataj personoj de la hispana kultura kaj scienca vivo kaj ankaŭ pluraj eksterlandaj diplomatoj, funkciantaj en Madrido.

Infanoj sur poŝtmarkoj

La hungara poŝto emisiis la 26-an de februaro serion el tri unu-forintaj poŝtmarkoj okaze de la Internacia Jaro de la Infano.

REVUO DE REVUOJ

Beboj kaj bebaĵoj – pri tiu ĉarma temo, ja malofta en niaj periodaĵoj, artikolas kun desegnoj la sveda LA ESPERO. Plezura kaj certe necesa lingva helpo por ge-oj, despli ĉar krom „faka" vortlisto oni ricevas abunde konsilojn pri la vartado. Ni sekvu iomete la ĉiutagan vivon de la etulo laŭ la artikolo: sur la *vartotablo,* kovrita per *ŝaŭmplasto* kaj *guma tuko,* oni vestas la bebon – ekzemple – per *trikota ĉemizo, plasta vindotuko . .,.,* por eliri metu ĝin en *promensakon* kaj tiel en *bebportilon* . . . Jen taŭga demonstro de Franko *Luin* pri la ĉiutaga Esperanto, kion sekvi ŝajnas deca tasko, estimataj redaktoroj!

Por resti ankoraŭ en la sfero de la familio, mi ĉerpas el L'ESPERANTO itala, kie legindas inter aliaj valoraj skribaĵoj artikolo de la erudicia Aldo *de' Giorgi.* La propraj nomoj! Ho kiom da artikoloj ĝis nun en tiu ĉi temo, kvankam oni povus jam fini tiun mar-serpentan aferon, ankaŭ per lia bonega analizo. Ankaŭ nia revuo devis jam plurfoje reagi je tiu diskuto, laste per konsentanta mencio de argumentoj de V. *Oljanov.* Pravajn kaj decidajn tezojn kompilis en tiu artikolo de Giorgi – kelkiuj pardonu, ĉar *li,* kaj ne iu *Deĝorĝi* estas la aŭtoro. Li disbatas la plej ofte falsan metodon de E-a transskribado de nomoj, kion kontraŭas la rekonebleco, la tiucela nesuficeĉo de nia alfabeto 28-litera, kaj precipe la tute mala internacia kutimo, almenaŭ ĉe la latinskribon uzantaj popoloj. Por la leganto plejparte ne gravas – kiam li renkontas en revuo fremdajn nomojn – ties ĝusta prononco: sufiĉas ilin nur *rigardi,* sed ne necesas ilin *legi,* eĉ malpli prononci. Neniu devas lerni la prononcmanierojn de multegaj lingvoj. Maksimume, por orienti interesemulojn, vojaĝantojn, oni indikas *interkrampe* la proksimuman prononcon – kutimo de nia redakcio pro peto de multaj legantoj. Memkompreneble estas plena rajto de ĉiu e-isto transskribi *sian propran* nomon, eĉ traduki (paraleligi) sian personnomon (Ivan aŭ János aŭ Hans al Johano). Tamen neniu rajtas transformi la nomon de aliuloj, kiuj tion ne deziras. Oni respektu ĉies nomon, finas la aŭtoro, lasu en paco tiun arbitran problemon. Prave, kaj Aldo-nu ankoraŭ tion, ke oni ne *miĉigenigu* sur la koverto la ŝtaton Michigan!

BUDAPEŜTA INFORMILO publikas seriozan recenzon pri la JARLIBRO 1979 de la hungarlingva MONDO KAJ LINGVO. Estas vere taŭga kaj valora propagandilo tiu 250 paĝa, bonaspekta Jarlibro, kiun oni vendas surstrate en gazetbudoj. Ĝi enhavas interesajn skribaĵojn de konataj verkistoj kaj ĵurnalistoj, ankaŭ de eksterlandaj. La recenzisto aludas tamen al la relativa manko de la volumo: tro malmultas la praktikaj aplikoj de Eo. Li mencias bonegan praktikon: oficante en iu entrepreno oni informiĝu pri e-istoj en kunlaboranta *eksterlanda* entrepreno, ekkontaktu kun ili, por proponi al la estraro la seninterpretistan labor-kontaktadon dum reciproka oficiala vizito, kunlaboro kaj korespondado. Utila kaj lerta ideo!

EŜLI, la ŝak-ligo, respektive ties Hungarlanda grupo EŜGH inaŭguris novan fakan, ŝak-bultenon sub nomo TEMOSERIO. „Ŝakolimpiadoj de duon-jarcento" estas la temo de la unua numero, kiu donas vastan trarigardon kaj resumon de la rezultoj kaj partoprenantoj, ankaŭ pri la virinaj konkursoj. Mi devis tutan vesperon pasigi kune kun tiu ĉi mirinde lerte redaktita bulteno, kaj mi atendas jam scivole la 2an numeron pri la mondĉampionoj de ŝako.

KONTAKTO, la revuo de TEJO, ĝenerale elstaras per elokventaj, junul-freŝaj artikoloj, libervoĉaj kaj ideojnhavaj. La pluraj aspektoj, diversaj vidpunktoj ene de la skribaĵoj igas tiun revuon vere leginda; la libera diskutado, disputado (neniel dissputado!) certe forte helpas la junularan movadon, kaj klarigas, kial multaj pli-aĝuloj legas ĝin. En la nro 59 la jubileanta Deklaracio pri homrajtoj estas traktata el multaj, kaj, kial-ne, oponaj vidpunktoj, kvazaŭ donantaj temojn por dumjaraj enketoj. Manke de spaco mi ne detaligas, nek resumas; malserioze eble, tamen mi mencias nur tion, kio amuzis min, aparte de mia respekto al la aŭtoro kaj lia elektita temo. La longa kaj detala pensoĉeno pri la rajtoj en la *Universo* inter la loĝataj planedoj, inter ties – eksterteraj – vivuloj . . . Kian rajton havos ekzemple teranoj atingantaj aliajn planedanojn? Ĉu rajto je libera foriro – eble temos pri hasta fuĝo aŭ pri rajto je memdefendo? Nu, tiuj „rajtoj" spekulitaj *amuze* forgesigis min pri la fonto kaj esenco de ĉia juro, rajto: kaj tiu estas nemiskompreneble kaj ĉiam, ia *potenco,* kaj sub ties egido la *interkonsento.* Tio estas la universa-la leĝo, kvazaŭ naturleĝo; la cerbumado pri tut-universa rajtaro (!) per sia spriteco igis gaja mian tutan societon, kie iu terano tuj anoncis sin por adapti nian lingvon Tut-Universa Lingvo. Mi jam antaŭvidas, ke *post-nia venko* la superfluiĝanta UEA daŭrigos la lukton – TUEA – por atingi la venkon en la Tut-Universo . . .

Sed multe pli proksime, en Aŭstrio, la lastan numeron dissendis INTERNACIISTO, espereble same provizore nur, kiel iam en la 30-aj jaroj ĝi ĉesis en Berlino. Fiere konstatas la redaktoro, ke – male al multaj E-gazetoj – li ĉesas la eldonadon ne pro manko de subteno de abonantoj, pro financoj. Mankas *junulaj* kunlaborantoj apud la veteranoj, kiuj fizike jam ne kapablas aranĝi ĉion. Ĝojinde, ke anstataŭ la monata eldono de ISTO, oni tamen kapablos eldoni almenaŭ la konatajn broŝurojn (ĝis nun 27 aperis!), pruvante, ke revolucia E-gazeto necesas kaj daŭros plu. Multaj legantoj esprimas sin cetere en la lasta numero el multaj landoj, laŭdante la interesan, valoran, sed en la nuna formo malaperantan revuon.

Ervin *Fenyvesi*

Hilda Dresen

La artikolo de Reto Rossetti (Esperanto, 7–8/1978) elvokis grandan ĉhon: multajn personojn ŝokis precipe la vorto diletanto. Estas sendube, ke Kalocsay ne estis diletanto laŭ la difino trovebla en PIV, ja grandan parton de liaj verkoj naskis unuavice forta socia bezono en la vicoj de la esperantistaro. Li surprenis amasegon da taskoj, por kiuj certe li ne sentis profundan inklinon: verkado de didaktike-lingvaj artikoloj, lingva reviziado de grizaj artikoloj ktp. Estas alia afero, ke per utilega memsugestio li kapablis trovi plezuron eĉ en tiaj laboroj, neallogaj por li, sed gravegaj por la Esperantaj movado kaj kulturo. La ĉi-subaj rememoroj de la estona poetino Hilda Dresen certe kontribuas al tio, ke oni pli klare vidu lian figuron.

Kelkaj rememoroj pri Kalocsay

En revuo ESPERANTO, nro 7–8/1978 aperis artikolo de Reto *Rossetti* okaze de la reeldono de la poemaro IZOLO de K. Kalocsay. Min malagrable impresis la surskribo „Kalocsay, la kolosa diletanto" – same la *falsa* eldiro pri Hendrik *Adamson,* ke „Kalocsay el nepoeto fabrikis poeton, kaj la brava estono iris kun falsita pasporto en la Esperantan panteonon".

Kun *Baghy* kaj Kalocsay mi persone konatiĝis en 1923 dum UK en Nürnberg. Poste Baghy pro kursgvidado kelkan tempon vivis en Tallinn, kaj tiam mi havis la eblon ofte renkontiĝi kun li. Ni restis ĝis lia morto en bonaj hejmecaj interrilatoj, regis bonvolemo kaj komprenemo. Kun Kalocsay mi havis nur hazardan personan kontakton. Kio rilatas la iom riskajn esprimojn de R. Rossetti pri denaska kaj memfarita poetoj – koncerne ilin –, do al mi ŝajnas, ke Baghy kaj Kalocsay *ambaŭ estis veraj poetoj,* certe diverstipaj, sed ili ambaŭ estis bezonaj por la Esperanta poezio kaj movado – ja ne senmerite ili tiom famiĝis.

La poezio de ambaŭ poetoj estis al mi kara, tamen ĉiam, ĉe bezono, mi referis pri la poezio de Kalocsay. Li estis por mi aŭtoritato, kaj mi ĉiam penis observi decan distancsenton. Tamen en 1932, kiam okazis la konflikto en *Literatura Mondo,* mi skribis al li longan leteron, al kiu li tre afable respondis kaj detale klarigis la kaŭzojn de la konflikto. Li kompreneble aludis ankaŭ la neologismo-demandon. Mi citas iom el la letero, por ke oni vidu, kiel li komprenis la vorton „diletanto", per kiu oni nun titolis lin.

„Fari literaturon per lingvo, kiu glorigas malriĉon, estas naiva ludo de diletantoj, nenio pli . . . Eble mia letero estas iom konfuza, sed tio fidele spegulas mian animan staton. Min trafis dolora bato, mi senreviĝis pri io, por kio mi laboris longajn jarojn. Se nun mi pensas pri la nepretaj kantoj de INFERO, mi konfesas, ke mi dubas, ĉu mi povos ilin fari en la konscio, ke mi faras tute senutilan laboron. Mi konfesas, ke de kiam tre malnova, tre fervora, tre influa esp-isto skribis al mi, ke mi verku nur por mi mem, ĉar mi pli malutilas ol utilas, mi ne povis traduki eĉ unu tercinon. Malutili per tiel pena laboro al io, kion mi amas – kio estas pli stulta en la mondo?"

Estas ja klare, ke li ne estis diletanto (en la senco klarigita en PIV), li ja ne laboris nur por sia plezuro. Li aspiris progreson por la E-literaturo, tial ankaŭ lia troa emo al polurado, kiu ofte povas iĝi danĝera en la poezio. Al mi eĉ ŝajnas, ke – en la nuna stato de nia literaturo – oni unuavice poluru la E-prozon, se oni atente legas la aperintajn librojn, oni konvinkiĝas pri tio. R. Rossetti pravas, ke Kalocsay ĉe reviziado ankaŭ ne indulgis sin mem. Antaŭ dek jaroj Kalocsay interalie skribis al mi, ke li siatempe poluris siajn poemojn en „Mondo kaj Koro" antaŭ ol enmeti ilin en „Strečitan Kordon", kaj nun li eĉ ne kuraĝas legi ĉi tiun libron, timante, ke li trovos tie tro multe da polurendaĵoj. Tamen li aldonis, ke kelkfoje povas okazi ankaŭ tiel, ke poste oni komprenas, ke la polurado ne plibonigis la tekston. Mi opinias, ke verŝajne ne ekzistas E-poeto, en kies poemoj li ne estus trovinta ion por poluri. Tamen al novaj talentoj, al komencantoj li kondutis kuraĝige, nur poste fariĝis pli postulema, kio eĉ elvokis ofendiĝojn. Sed kial bonvolema kritiko ofendu iun, ĝi estas ja utila!

Oni tamen evitu blindan konsenton, ne manku konvinkiĝo. Al mi li povis ĉiam rekte diri, se io en miaj tradukoj ne plačis al li, ekz. mia „rigida rilato al la ritmo-demando". En 1938, kiam li redaktis miajn poemtradukojn por „Svisa Antologio", mi kuraĝis skribi al li, ke mi miras, ke li, batalanta por libereco en la poezio, volas tiel severe limigi la vortordon en E-poezio. Por pruvi, ke la kelkfoje libere uzata vortordo en miaj poezitradukoj ne estas mia monopolo, mi citis plurajn lokojn el la poezio de *Tárkony* (Totsche), *Waringhien* kaj ĉefe de li mem. Mi postulis, ke certaj lokoj restu senŝanĝaj, kaj mi petis lin ne koleri, ĉar mi ne agas tiel pro obstino, sed simple pro tio, ke ĝis mi ne estas konvertita, mi ne povas agi kontraŭ miaj konvinkoj.

Kalocsay ĉiam bone rilatis al mi, kaj nun mi kun honto komprenas, ke mi en la postmilita tempo plurfoje estis malĝentila, kaj arogante demandis lin, ĉu iu gramatika formo, uzita en liaj tradukoj, estas modela? Li ne koleris; tamen foje li menciis, ke iu vere kolerigis lin, sed li aldonis, ke „mia kolero ne daŭras pli ol tri tagojn."

Eble mi ne konis lin kiel homon tiom, kiom necesus, almenaŭ L. Tárkony asertis tion; li sendube plej bone konis lin. Ekde 1932 mi estis kun Tárkony en bonaj amikaj interrilatoj. Antaŭ la milito ni multe korespondis, ne nur pri literaturo, sed senĝene pridiskutis diversajn demandojn. Post la milito li iĝis kvazaŭ ligilo inter mi kaj Kalocsay. Kutime mi de li ricevis komune skribitajn leterojn. Nun kiam mi eksciis pri la forpaso de L. Tárkony, mi estis dolore frapita. Malgraŭ lia lasttempa malbona sanstato, mi ne estis preparita por tio. Unu post la alia forpasas amikoj . . .

Éva Tófalvi

Historio de nia amikeco

Johano,

ĉu vi scias, ke Mateo mortis? Antaŭ du jaroj, kiam mi estingis eĉ la eblecon de niaj estontaj dialogoj, mi bone sciis, ke mi devos havi iam la okazon paroli kun vi – ne, pli ĝuste: paroli al vi. Tiam mi ne konjektis, ke tio estis mia unua demando al vi.

Li mortis. Mortis. Por vi tiu ĉi vorto ne estas pli ol unu verbo en pasinta tempo. Por mi ĝi signifas teruran travivaĵon, la plej maltrankviligan en mia vivo. Mi vidis lin morti.

Ĉu vi rememoras nian studenthejmon? Vi estis ĉe mi kelkfoje en mia ĉambreto sur la deka etaĝo. Post du jaroj, kiam mi finis miajn studojn – eble vi scias tion – Mateo studentiĝis kaj hazarde li ekloĝis en la sama kolegio. Ĉirkaŭas ĝin granda parko kun futbalejo. Kial mi rememorigas tion al vi? Ĉar eble ankaŭ viaj pensoj foje revenadas al tiuj bonaj maĉoj, kiujn ni ludis tie. Sed ekde unu monato miaj piedoj ne povas tuŝi tiun futbalejon. Igas ĝin por mi tabua teritorio la korpo de Mateo, kiu ĉesis vivi precize tie, en la loko de niaj dimanĉaj futbal-ludoj.

Estis tute kutima printempofina tago, varmeta posttagmezo, kiam mi intencis viziti Mateon. Proksimiĝante al la studenthejmo mi vidis homamason ĉirkaŭ la futbalejo. Estis iom strange, ke la homoj silentis. Ĉu vi rememoras, kiel brue la spektantoj kutimis instigi la ludantojn.? En tiu muteco estis io animprema.

Ĉe la enirejo deĵoris du studentoj. Deĵorantoj ĉe la pordego de la parko? Nekredeble.

– Kio okazis? – Mi demandis ilin alpaŝante.

– Unu knabo sin ĵetis el la fenestro. Ni atendas la sanitaristojn kaj la policon.

– Kiel li nomiĝas?

– Mateo, se mi bone aŭdis, mi ne konas lin.

– Ĉu li vivas ankoraŭ?

– Espereble.

Mi komencis kuregi. Ekde tiu momento, kiam la deĵoranto eldiris la nomon „Mateo", mi estis certa: estas li.

Se oni entute rajtas uzi en tia okazo la esprimon – vere, li ankoraŭ vivis. Mia lasta rememoro pri li estas – preskaŭ fotografita en la cerbo – ke li volis levi la kapon, etendis la brakojn kaj post momento ĉesis moviĝi.

(Dum la sekvontaj tagoj multfoje venis al mi la ideo: kie mi renkontis jam similan vidaĵon? pasis semajno, kiam mi trovis la respondon. En mia infanaĝo ĉe mia avinjo en vilaĝo post ŝtormo falis la kruco kun Kristo apud la vojo al kampo – la lasta movo de Mateo tion kopiis.)

Baldaŭ aŭdiĝis sirenoj. Alvenis ankaŭ la sanitaristoj kaj la policanoj. Juna kuracistino rapidis al la terenfalinto, palpis lian pulson kaj zorgeme remetis la brakon sur la skorion. La esprimo de ŝia vizaĝo sciigis al ĉiuj, ke ne plu estas espero.

La policanoj komencis fotografi, traekzamenis la futbalejon, poste iris al la ĉambro de Mateo – konvinkiĝi aŭ elimini la suspekton ĉu ne okazis krimo.

Mi, kiu konis lin, sen esplorado sciis, ke ne. Tiam, en tiu momento mi komprenis, ke lia vivovojo devis konduki tien.

Johano, ni ĉiuj tri venis el la sama urbeto kun la sama deziro: ni volis fariĝi universitatanoj. Kune ni prepariĝis por la akcepta ekzameno. Foje ĉe viaj gepatroj, foje ĉe la miaj. Mateo neniam invitis nin. Li hontis pro la hejma mizero. Ni sciis, ke ili havas unusolan ĉambreton kun la vidva patrino. Ho, Johano, estis ĉe vi plej bone! Via domzorgantino portis al ni interesajn sandviĉojn, nek Mateo nek mi iam gustumis similajn. Kaj vespere, kiam via panjo hejmenvenis, ŝi volonte pianludis por ni, ĉar kiel ŝi diris, „ne povas malutili iom da refreŝiĝoj". Ĉe vi tiuj posttagmezoj estis tiel feliĉaj, preskaŭ idiliaj, ke en miaj sonĝoj mi ofte ripozas en tiu paradizo. Kaj dumtage mi havas nostalgion, ofte vidas vian panjon, kiun mi admiris – neniu havis en la klaso tiel belan patrinon kiel vi.

Ĉu vi kredas, ke mi estis certa, ke ni ĉiuj tri sukcesos atingi la celon? Ĉu vi kredas, ke mi vere ne supozis, ke elinter ni oni akceptos nur min kiel universitatanon? Mateo estis talenta, vi diligenta. Tiam mi ankoraŭ ne konsciis, kion signifas nerva malstabileco – tion mi taksis malgranda manko en la naturo de Mateo. Mi ne sciis, ke ĝi tute ne estas pozo, mi eĉ imagon ne havis pri tio, ke lian konduton difinas la vivanta bazo, la animprema mizero – Johano, nek vi, nek mi havis spertojn pri la malriĉeco. Ni imagis ĝin romantika.

Ni ambaŭ venis el gardita mikromondo, kaj mi restis naiva. Sed baldaŭ – kaj tion mi povas danki al vi – mi perdis la virgecon de mia pensmaniero. Ne pensu, ke ĝi estis facila. Mi defendis ĝin kiel la knabino defendas sian korpan virgecon, knabino, kiu opinias, ke ĝis la unua seksa kontakto ŝi ne devas aparteni al la plenkreskuloj.

Kial tamen mi dankas vin? Ĉar jam estis la tempo, iu aŭ io devis veni kaj malfermi miajn okulojn – mi estis jam deknaŭjara.

Kompreneble, mi kunsentis kun vi ambaŭ post la malsukcesa ekzameno, sed mi estis certa – vi denove ne kredas min, ĉu? – ke en la sekvonta jaro ni renkontiĝos en la universitato.

Johano, tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke vi estas stulta. Tiun fakton ege bone kaŝis via diligenteco en la mezlernejo. Helpis vin eĉ via aktora talento – vi ne respondis la demandojn de la profesoroj, vi prelegis. Nur tiam mi konvinkiĝis pri via stulteco, kiam jam la trian fojon vi ne sukcesis solvi la taskojn de la akcepta ekzameno. Ĉiujare ŝanĝiĝis iomete la sciindaĵoj, laŭ la progreso de la scienco, kaj kiam mi klopodis klarigi ion novan al vi, mi devis rimarki, ke vi povas alproprigi nur tute pretajn tekstojn, solvi nur tiujn matematikajn problemojn, kies rezultojn vi jam konas.

Ne argumentu nun per tio, ke ankaŭ Mateo malsukcesis. Ĉar lian unuan fiaskon kaŭzis ne la manko de la krea pensokapablo, sed tiu de la memfido. Liaj skribaj taskoj estis kompletaj, tamen kiam li iris antaŭ la komisionon, li konfuziĝis, preskaŭ mutiĝis. Nur post kvin jaroj li havis la kuraĝon denove ekprovi la ekzamenon – kaj tiam li sukcesis.

Do, mi reiras al la okazintaĵoj antaŭ sep jaroj. Pasis semajnoj, monatoj. Mi veturis hejmen el la ĉefurbo por semajnfino. En la vagonaro vi salutis min kun granda entuziasmo:

– Saluton, mia oldulo, sidiĝu kaj rakontu, nu, kio estas kun vi? Mi povis diri vere nenion eksterordinaran, mi prefere scivolis pri vi.

– Mi estas purigisto! – Vi sciigis laŭte kaj fanfaroneme. – Jes – vi daŭrigis –, mi estas laboristo. Mi gajnas mian monon per la propraj manoj. Rigardu! Kaj vi montris al mi en via polmo unu vezikon – tion kaŭzis balailo!

Ĉiuj kapoj turniĝis al vi. Sur la vizaĝoj montriĝis miro. Ne pro

tio, ĉar neniu vidis ankoraŭ purigiston, ne. Sed via vestaĵo laŭ la plej nova modo al ĉiuj ŝajnigis, ke vi ŝercas.

Mi komencis farti malagrable. Kaj sentis kontraŭ vi ion nekutiman. Naŭziĝon. Sed tiam mi ankoraŭ ne sciis, kial?

Tion mi konsciis, kiam Mateo invitis nin en sian subluan ĉambron. Ĉu vi ankoraŭ rememoras la vintran dimanĉon, kiam ni sidiĝis ĉirkaŭ fera forneto ĉe li, en la periferio de la ĉefurbo? Ni rakontis pri nia vivirado. Vi estis la unua. Mi ne volas rememorigi al vi, kion vi diris, eĉ mi ne povus citi korekte. Ĉar la akcento estis sur la maniero. Post viaj plendoj pri la malfacileco de la purigado sekvis Mateo. En lia voĉo estis iom da ironio:

– Mia laboro ne estas tiel malfacila, kiel la via. La Centra Fabriko por Kemiaĵoj dungas min kiel helplaboriston. Mi komencas matene je la sesa kaj je la dua kaj duono mi estas jam preta. Tio signifas, ke mi povas bone profiti posttagmezon.

– Posttagmezon? Mi pensis, ke estas jam vespero, kiam vi hejmenvenas tien, en la alian parton de la urbo – mi rimarkis.

– Nu, estas ĉirkaŭ la kvara, sed ne gravas, se mi ne estas laca, eĉ ĝis noktomezo mi studas.

– Kion vi devas fari en la fabriko?

– Estas tre sentemaj krudmaterialoj, kiujn oni devas unue dum certa tempo lasi en acido, poste, mi deprenas ilin kaj permane transportas al la alia fako, kie oni aplikas ilin.

– Ĉu ili ne estas pezaj?

– Relative, unu peco estas ĉirkaŭ dudek-kilograma.

– Kial oni ne uzas transportan maŝinon?

– Mi diris. Temas pri tre sentemaj, preskaŭ delikataj aĵoj.

– Kaj ĉu la acido ne malutilas al via haŭto?

– Mi havas specialajn gantojn.

Estis jam malfrua vespero, kiam mi adiaŭis. Vi, Johano, ankoraŭ restis. Kiam mi iris hejmen sur la neĝkovritaj stratoj, mi jam sciis, kio kaŭzis tiun malagrablan senton kontraŭ vi. Por vi la purigado estis rolo. Vi neniam devis timi, ke vi restos en tiu stato. Kiel aktoro, kiu rolas en la teatro la reĝon Lear, konscias, ke kiam finiĝas la prezentado, finiĝas ankaŭ liaj suferoj, cetere imititaj, poste li denove estos N. N., la homo, edzo kaj patro de du infanoj. Por Mateo la helplaboristeco estis devigo, la unusola eblo por la vivteno. Li ne havis malantaŭan pordon, la tiama vivperiodo povis resti konstata por li.

Ŝajnas al mi, kiam li iom moke bagateligis la malfacilaĵojn de sia laboro, li volis doni al vi lecionon. Ke tio ne utilis, mi povis sperti ankaŭ sur mia propra haŭto. Mi rememorigas vin, eble tute superflue, ĉar vi certe gardis tiun tagon en via animo simile forte kiel mi.

Ricevinte mian diplomon, mi devis translokiĝi el la studenthejmo. Ne nur mi, ĉiuj, kiuj finis la studojn en la ĉefurbo. Do, ĉirkaŭ kvin mil homoj serĉis loĝejon aŭ almenaŭ subluon. Mi malsukcesis. Tamen mi ne perdis la esperon, opiniante, ke mi bezonas nur la tempon kaj paciencon. Tiam mi turnis min al vi, al unusola amiko, kiu havis propran loĝejon. (En parentezoj: viaj gepatroj neniam estis avaraj kontraŭ vi.)

– Kion vi pensas?! – vi demandis. Tio ĉi estas nur fraŭla loĝejeto. Tie ĉi tute ne estas loko. Ĉu vi volas ĝeni mian privatan vivon? Pensu pri tio, ke mi ne plu estas infano . . .

– Johano, temas nur pri kelkaj semajnoj . . .

– Ho, mi scias, ke estas tre malfacile trovi loĝejon, kio okazos, se vi restos pli? Cetere, mi tute ne komprenas vin, kial vi turnas vin al mi, al simpla homo, vi estas intelektulo, certe vi havas intelektulajn amikojn kiuj helpos vin.

– Kaj kie mi dormu hodiaŭ?

Via respondo superis ĉiujn miajn supozojn:

– Estas somero, estas varme. Dormu en la parko. Antaŭ kvin jaroj, kiam vi libertempis post la sukcesa akcepta ekzameno, mi jam eklaboris, kaj tri tutajn noktojn mi dormis en la parko. Estis sufiĉe agrable, eĉ sanige sub la ĉielo. Mi povas proponi al vi.

Mi foriris. Senvorte. Poste vi multfoje telefonis, interesiĝis ĉu mi jam havas loĝejon. Unufoje vi sendis eĉ nomaron de viaj konatuloj, ĉe kiuj mi estus povinta ekprovi . . .

Mi ne provadis. Mi certigis vin, ke ĉio estas en ordo. Tamen ne estis. Post unu monato mi ekloĝis en malgranda ĉambro de unu afabla familio. Sed . . . Oni havis tri infanojn, eble tial bezonis la monon. Mi faris decidon doktoriĝi. En la uzino, kie mi eklaboris kiel komencanta inĝeniero, mi trovis interesan esplorteritorion. Sed post la laboro mi trovis en la hejmo la tutan familion. La infanojn mi devis helpi en fiziko, kemio, matematiko. Preskaŭ ĉiutage. Pri la konstanta bruo mi eĉ ne parolas. Post kelkaj monatoj evidentiĝis: mi ne povas progresi en mia fako, kaj se mi stagnas aŭ malprogresas, mi povas perdi eĉ mian laboron.

Kiel tio rilatas Mateon? Li tranoktigis min ĝis tiu tempo, kiam mi konatiĝis kun la menciita familio. Mi ne scias, ĉu vi informiĝis pri tio aŭ ne? Lin mi ne devis peti, li mem proponis loĝi ĉe li en la sublua ĉambreto...

Ne, Johano, mi ne rakontis tiam al li nian sortodecidan interparolon. Nur poste, kiam por li estis iom strange, ke mi ne emas fari komunajn programojn kun vi. Ne miru, ke poste laŭeble ankaŭ li evitis vin.

„Mi estas simpla homo" – diris vi. Kiel vi komprenis tion? Ĉar vi ankoraŭ ne estis intelektulo? Sed vi jam delonge ne purigadis, estis oficisto, kaj vizitadis la vesperan universitatan kurson. Se mi bone scias, en la sekvonta jaro vi finos viajn studojn. Intertempe vi anstataŭis vian inĝenieran ambicion per la juro. Baldaŭ vi estos advokato – certe populara. Tre populara. Kiu multe perlaboras. Ne, ne pensu, ke mi envias vin.

Mateo ekstudis en septembro, antaŭ du jaroj. Li invitis min multfoje en la studentan hejmon, kie mi povis trankvile labori en la biblioteko. Kaj kiam lia kolego estis for, mi ankaŭ tranoktis ĉe li. Ankaŭ tiam, kiam li mem forestis. Ĉar li entreprenis noktan laboron. En la presejo, en filmstudio, en stacidomo. Matene hejmenveninte li prenis duŝon kaj tuj kuris aŭskulti la prelegojn. Tiamaniere li vivis du jarojn. Li petis nenies helpon. Li eĉ sendis monon regule al la patrino. Fine de la kvara semestro li havis du malsukcesajn ekzamenojn.

Kion mi diru? Ĉu mi diru, ke mi antaŭvidis lian sorton? Mi mensogus. nur tion mi spertis, ke li fariĝis neparolema. Li vagadis enpensiĝante en la parko, tien kaj reen, kaj kiam mi demandis lin, li nur respondis:

– Mi bezonas iom da aero kaj moviĝo.

Mi klopodis konsoli lin, sed li nur rigardis min kun iom da malico, jes, vi bone legas, kun iom da malico, kaj mi eksilentis.

Tiom, nur tiom mi volis rakonti al vi . . . Ho, jes, ankoraŭ ion.

Unu tagon post la tragedio mi revenis en la studentan hejmon. Mi devis dividi mian doloron, kaj mi volis paroli kun la samĉambrano de Mateo, kiu intertempe fariĝis ankaŭ mia amiko.

Enirante ĉe la pordejo mi ekvidis la patrinon de Mateo. Ŝi serĉis la filon. El mallonga telegramo, kiun oni sendis, ŝi ne komprenis, kio okazis. Ĝi tekstis jene: „Via filo havis akcidenton. Venu tuj."

La sekretario de la studenthejmo alpaŝis, karesis ŝian ŝultron, kaj mallaŭte kondolencis.

Neniam mi vidis similan ŝanĝon sur la homa vizaĝo. Ne pensu nun pri la filmoj, la filmoj estas imitaĵoj.

Post minuto, kiam ŝi finfine komprenis, kio fakte okazis, ŝi komencis plori preskaŭ mute. Kaj ŝia malfortiĝinta mano terenfaligis la sakon, el kiu disruliĝis oranĝoj, bakita kokido, pano.

Mi scias, ke mi estus devinta brakumi ŝin, diri almenaŭ kelkajn konsolajn vortojn, rompi la pezegan silenton, sed mi ne kapablis. Kiam iu knabo kliniĝis por kolekti la manĝaĵojn, kaj la du aliaj brakumis la patrinon de Mateo, mi profitis la tempon kaj fuĝis.

(2-a premio en la Belartaj Konkursoj de UEA, 1978)

La granda inundo en urbo Szeged en jaro 1879

„La terura merkredo" (siatempa gravuraĵo)

D-ro Ferenc László

De praaj tempoj luktadas la homo kun ŝveliĝantaj riveroj por ŝirmi siajn hejmon kaj valoraĵojn kontraŭ detruoj de furiozaj inundoj. Tiu lukto daŭras eĉ hodiaŭ kaj, eĉ se pli malofte, tamen troviĝas okazoj en iu regiono de la mondo, kiam la homo estas venkata en tiu luktado.

Tia malvenko okazis antaŭ cent jaroj en marto de 1879, en la valo de rivero Tiso, kiam la inundo ruinigis la plej grandan urbon de la Hungara Granda Ebenaĵo, *Szeged*-on. La katastrofo atingis la urbon nokte la 12-an antaŭ mateniĝo. Sole parto de la praa urbokerno, de la Urbinterno restis seka, nur kelkaj centoj el ĝiaj ŝtonaj domoj restis sendifektaj. Preskaŭ sesmil loĝdomoj konstruitaj el argilo plene detruiĝis en la pli malaltaj urbopartoj. En la urbo mem sesdek mil homoj restis senloĝejaj, kune kun la ĉirkaŭaj vilaĝoj kaj kortodomoj entute cent mil. La katastrofo postulis pli ol centkvindek homvivojn. La proksimajn urbojn *Csongrád, Hódmező-vásárhely, Szentes* per streĉitaj fortoj povis savi de la simila sorto la loĝantaro kunlabore kun la soldataro.

„Kiel serpento siblante, rampante venis la giganta inundo, okupante la valaĵojn, poste la montetojn . . . Maro, kiu dum kelkaj minutoj plimultigis sin en la ŝveliĝo, venante ŝtele, kiel rabmurdisto, kaj pli rapide, ol la timo. Kaj samtempe venis en ĉiu punkto. Ne eblis eviti ĝin ie. Kaj kiam oni vidis el la malfermita fenestro de alte, ke la domoj blankantaj en la malhelo iĝas iom post iom pli malgrandaj, pli malaltaj, evidentiĝis, ke tio sube estas la akvo . . . La aŭroro ne trovis plu la urbon Szeged . . .nur ĝiajn ruinojn, kiel tiuj iĝas unu post la alia ŝlimo de malpura maro."

Tiel vidis la urbon forbalaantan inundon Kálmán *Mikszáth*, eminenta romanverkisto, el fenestro de sia loĝdomo en la nokto de 12. marto 1879.

En la historio de la oftaj inundoj detrue efikantaj sur la Granda Ebenaĵo la plej granda katastrofo torentis en tiu teruron memoriga nokto sur tiun prosperan urbon, kiu tiam estis la dua plej granda en la lando. Ĝia ekonomia, socia signifo progresive kreskis precipe ekde la komenco de la 18-a jarcento. (En 1719 ĝi ricevis la privilegiojn de t.n. *„libera regia urbo"**) Prosperplene ekfloris la industriiĝo de la urbo, krome la evoluo de ĝiaj kulturaj institucioj. Multon oni faris ankaŭ por beligi la urbaspekton. En la internurbo de Szeged ekde la sesdekaj jaroj de la 18-a jarcento estis permesite konstrui sole etaĝajn domojn. Ĉio ĉi komprenebligas, ke la inundo furiozanta en la urbo minacis grandegajn valorojn.

La granda inundo en Szeged superis – precipe en siaj efikoj – la memorindan inundon en j. 1838, kiam la Danubo ruinigis grandan parton de Peŝto kaj Buda (tiam ili estis apartaj du urboj)**. Dum pli ol du monatoj multloke kovris tri-kvar metrojn alta akvo urbon Szeged kaj ĝian ĉirkaŭaĵon. La rivero Tiso retiriĝis en sian fluejon nur post 186 tagoj, en aŭgusto. Tamen la aktivado de la urba magistrato eĉ unu tagon ne ĉesis por lokigo kaj provizado de la damaĝon suferintoj.

Ĉio okazis tiel, kiel en sia letero el la emigracio skribis Ludoviko *Kossuth****: „Szeged-on la popolo de Szeged povas revivigi."

Kaŭzoj de la inundo

En 1876 komenciĝis periodo de precipitaĵoj, inundoj, kiu – pro koincido de malfavoraj meteorologiaj kaj hidrologiaj faktoroj – kaŭzis tre danĝeran situacion dum

la vintro 1878/79. La akvonivelo de Tiso jam en decembro estis tiel alta, ke la rivero elfluis el sia fluejo kaj dum monatoj ŝarĝis la ŝirmadliniojn – parte ĵus tiutempe rekonstruitajn. Samtempe kun la vintrofina degelado komenciĝis daŭraj pluvadoj, kiuj kune ekirigis novajn kaj pli novajn inundo-ondojn sur Tison kaj ĝiajn flankriverojn *(Sajó, Zagyva* kaj la tri *Körös)*. La nivelmaksimumo de preskaŭ ĉiuj flankriveroj koincidis kun la altakvo de Tiso.

Ties rezulto estis, ke en aŭroro de 12-a de marto Tiso torentis sur urbon Szeged.

La inundo tiam jam daŭris preskaŭ unu monaton kaj metis la ŝarĝoportan kapablon de la malfortaj digoj al tre severa provo. La 5-an de marto 30 km-jn norde de Szeged, ĉe *Petres* rompiĝis la tiam nove refortigita digo de la bordlinia konkavaĵo de *Percsova*.

La 10-an de marto jam ankaŭ *Dorozsma* subakviĝis. Eble estus mildiginta la situacion, se la teknikaj taĉmentoj de la korpuso de *Temesvár* (urbo sude de Szeged, nun *Timisoara* apartenanta al Rumanio) estus eksplodigintaj la ponton de *Maty-éri* kaj tranĉintaj la digon tie, por ke la akvoamasoj sieĝintaj la urbon de okcidento povu trovi vojon konvenan al la fluejo de Tiso. La eksplodigo ne okazis, nur mallarĝa trafluejo en la digo estis tranĉita.

Oni devas rememori kun plej granda rekono pri la volontulaj organizaĵoj de Urba Danĝerkomitato kaj pri la plej bonaj teknikaj fortoj de la riverinĝenieraj oficejoj, kiuj kune kun la teknika helpo de la soldataro heroe luktadis laŭlonge de la fervoja taluso, por reteni la kreskantan torenton almenaŭ por iom da tempo kaj ebligi la vojon de la sinsavo tra la flosponto al Újszeged (Nova Szeged) sur transa bordo, kiu estis ŝirmata per alta bordo.

Estas eble, ke troviĝis mankoj en la defendaj laboroj, tamen tio estis sinofera, heroa, brava faro, kaj jam ankaŭ tio estis grava rezulto, ke inter eksterordinaraj cirkonstancoj oni tiel longe sukcesis reteni la inundon al la urbo.

En la lasta fazo de la kontraŭ-inunda luktado eksplodis impetega norda tempesto, kiu definitive malebligis la defendadon.

Kaj eksonis la alarmsonoriloj je duono post la dua en 1879, marto, la 12-an, antaŭ aŭroriĝo. Ĉe la arbaro *Makkos* la inundo forbalais la fervojan talusон en longo de cent metroj.

Kiam mateniĝis maro da akvo etendiĝinta ĝis la horizonto inundis la urbon . . .

Esplorante la kaŭzojn de la 1879-jara Szegeda inundokatastrofo oni devas almontri antaŭ ĉio la koincidon, sumiĝon de eksterordinare malfavoraj meteorologiaj kaj hidrologiaj cirkonstancoj.

Tiutempe la teknikaj spertoj estis ankoraŭ mankhavaj, la preteco kaj teknikaj ilaroj por defendado estis malmodernaj. Pro sensistemeco de inundoforigo kaj malorganizeco de la ŝirmado, la alveno de katastrofo – malgraŭ egaj fortostreĉoj – estis neevitebla, eĉ kvazaŭ aŭgurebla. Tion asertas multaj tiutempaj dokumentoj.

Sistemaj reguligaj kaj kontraŭinundaj laboroj de Tiso komenciĝis post la inundoj inter 1830–1840. Grafo István *Széchenyi** havis vaste antaŭrigardan koncepton ekonomi-politikan, laŭ kiu kaj laŭ la planoj pretigitaj en 1875 de Pál *Vásárhelyi** (1795–1846) komenciĝis somere de 1876 la granda laboro ĉe *Tiszadob* (en supra parto de la rivero en Norda Hungario). La plano en siaj teknikaj bazprincipoj montriĝis ĝusta ĝis la nuna tempo.

Post la pli-malpli sukcesa luktado kontraŭ la ripetiĝintaj inundoj de la antaŭaj jaroj, la inundokatastrofo en Szeged montris plenan fiaskon de la jardekaj laboroj kontraŭ inundoj. Laŭ la publika opinio la katastrofo estis pli ol simpla malvenko. La laboro farita kun granda oferemo ŝajnis kompleta bankroto. La neorientita publika opinio serĉis la eraron en la bazaj principoj de la Tisoreguliga sistemo.

La restintaj dokumentoj kaj teknika literaturo evidentigas, ke la fonto de eraroj troviĝas ne en la ĝustaj teknikaj kaj organizaj principoj de la planoj, sed kontraŭe en la devio de tiuj planoj. La projekto de Vásárhelyi deziris kune solvi la taskojn de riverreguligo kaj de inundprevento (kiujn oni pli poste burokrate apartigis) laŭ unusola ĝusta maniero. Sur etdekliva etapo de la rivero li deziris redukti la tempon de refluo per pligrandigo de la deklivo, per mallongigo de la riverfluejo tratranĉante la troevoluiĝintajn riverkurbiĝojn. La digojn li planis tiel, ke per tio samtempe ili formu la regulan inundofluejon de Tiso kaj protektu la ĉirkaŭajn teritoriojn kontraŭ inundoj.

Pro la liberecbatalo (1848/49) ĉesis la reguligaj inundpreventaj laboroj. Post 1850 oni daŭrigis ĝin en maniero malĝusta kaj laŭ teknika, organiza kaj laŭ financa vidpunktoj. La riverreguligo, kiel ŝtata tasko, estis apartigita de la konstruado de kontraŭinundaj digoj, ĉar tio estis rigardata ekskluziva tasko de la koncernaj interesatoj kuniĝintaj en asociiĝoj. Samokaze la aŭtokratio – pro politikaj kaŭzoj – detruis la aŭtonoman centran organon, la Tisa-valan Asociiĝon, kiu kunigis la kontraŭinundajn societojn, kies aktivadojn ĝi harmoniigis, kaj metis en kadron de unueca teknika koncepto. Kune kun tiuj okazis la malkonstruo de riverinĝenieraj oficejoj kaj de la organizaĵo de akvoafera direktado, krome la malsevereco de la ŝtata kontrolado kaj direktado, kio malfermis liberan vojon por la senplanismo, por la privilegiado de etaj socitavoloj, unuavice por tiu de la bienegaj interesoj. La digo-etapoj de la diversaj societoj estis diversmezuraj. Oni ne zorgis pri la konservado. Mankis organizaĵo de kontraŭinunda permanenteco kaj la avertado pri inundoj. Enŝoviĝintaj digopartoj rompis la unuecan liniogvidadon de la inundejo, kaŭzis obstrukcojn, transvers-direktajn fluojn en la divers-larĝa inundejo, kaŭzis neŝirmadeblon de iuj digoetapoj. Kaj krome ĉion pligravigis, ke dume – eĉ se neregule, tamen daŭris la konstruado de digoj – je la kosto de societoj, – tre malmulto okazis por riverreguligo, tratranĉadoj, – kiuj estis ŝtataj taskoj.

Efektive el tiuj rezultiĝis la teknikaj eraroj: parte pro manko de la unueca laborplanado kaj de ŝtata kontrolo, aliparte pro la forlasiteco de la societoj, pro dissplitiĝo de iliaj fortoj, pro malproporcio de iliaj ŝarĝado kaj ŝarĝpovo, sed pleje pro neglektado de la riverreguligo, kiu ja estis grava ŝtata tasko.

La ĝeneralaj mankoj de la Tiso-reguligo speciale montriĝis sur la etapo ĉe Szeged, kie tiuj pariĝis kun specialaj lokaj kaŭzoj en la estigo de la katastrofo. Inter tiuj kaŭzoj unu estis la plej decida maljusteco, kontraŭ kiu la urbo Szeged jam delonge indigniĝis: nome la urbo estis devigita eniĝi en tiajn sociajn organizaĵojn, kiuj servis la inundoprotektadon de la latifundio *Pallavicini* situanta norde de Szeged, kaj kies kostojn devis pagi grandparte la urbo. Tio malkapabligis la urbon konstrui por sia propra ŝirmado la necesan digaron.

La memuaro de Szeged rajte konstatis pri la problema digo-etapo: *Percsora,* ke tiu digo kaj tiu societo *„estis tio, kies ekzistado estis plej ĉefa kaŭzo de nia pereo."* Nome la bordlinia konkavaĵo de *Szeged-Algyő* situis plene aparte, la bordkonkavaĵo de *Percsora* apartenis al la *fidkomisia* latifundio* de grafoj *Pallavicini.* La Aŭstria ministro pri internaj aferoj per dekreto estigis tiun altruditan societon aligante al ĝi la Percsora-n riverkurbiĝan konkavliman teritorion (konkavaĵon). Tio per pluraj kilometroj plilongigis la konstruendajn digojn, kiuj estis tre malfacile konstrueblaj kaj eĉ pli malfacile ŝirmeblaj. Tio sekvigis post sin, ke oni devis rezigni pri la fortikigo de la pli mallonga digo de *Sövényháza,* kiu norde protektis la urbon.

La mankojn de la digaro pligravigis, ke ĝis alveno de de la inundo el la 107 tratranĉoj konstruitaj sur Tiso nur 39 estis evoluintaj tiomgrade, ke ili povis transpreni la taskojn de la originala riverfluejo. Plej danĝera estis la situacio ĝuste inter Csongrád kaj. *Szeged,* kaj sude de Szeged, kie el la 11 tratranĉoj nur unusola evoluiĝis. En la plej primitiva stato estis ĝuste la granda tratranĉo malsupre de Szeged kies pretkonstruado estintus la plej grava rilate la urbon, ĉar ĝi estus akcelerinta la defluon de la altakvo.

La inundodanĝera situo de Szeged estis parte rezulto ankaŭ de geografiaj dispozicioj. Tiuj dispozicioj ne estis neŭtraligitaj laŭ la bezono kaj ebleco dum la reguligaj kaj inundopreventaj laboroj – pro la malfavoraj politikaj cirkonstancoj. Ĝuste kontraŭe: parte la akumuliĝo de la ĝeneralaj eraroj faritaj dum la riverreguligo, aliparte la lokaj preterlasoj, malfavoraj teknikaj intervenoj (kiel ekz. la malvastiĝoj kaŭzitaj de la fervojaj pontoj kaj digoj) pli danĝerigis la situacion en la Tiso-etapo ĉe Szeged.

Alia trajto de tiu riveretapo, – konsiderenda kiel neŝanĝebla geografia cirkonstanco – estas, ke Tiso ĉi tie akceptas sian plej grandan flankriveron: *Maros,* venanta el Transsilvanio (nun Rumanio). Ĝi formigis per siaj sedimentoj la „striktejon de Szeged", kiu estas esence transfluejo ĉe la aluvia konuso. Szeged konstruiĝis sur la insuloj de tiu Maros-a aluvia konuso. Rivero *Maros* estas tre riĉa je sedimentoj kaj per siaj inundoj ĝi mem konstruis la aluvian konuson, sur kies supro disbranĉiĝis la fluejo formante delton *(Szárazér, Aranka,* ktp.) tiel atingante la recipiento-riveron. La ĉefbranĉo turniĝante kontraŭ fludirekto de Tiso fluis el Sudoriento al Nordokcidento – kvazaŭ ne en riveron sed en lagon –, en tiun marĉan-lagan akvomondon, etendiĝinta ĝis *Hódmezővásárhely.*

La plano ordigi, aŭ eĉ translokigi la enfluejon de Maros, ripete prezentiĝis ekde la dekoka jarcento. La unuan konatan planon pretigis ĝuste Vásárhelyi jam en 1831. Kvankam la translokigo de la riverbuŝo sendube estus racia solvo, tamen pro la grandaj kostoj diversaj ekspertoj ne rekomendis tion. Laŭ ilia opinio nome ne eblis sufice malproksimen translokiĝi, la enfluejon de Maros por tiagrade, malaltigi la inundnivelon, ke pro la reciproka retroŝveliĝo ĉe la renkonto de la du riveroj, tiu nivel-malaltiĝo estus konsiderinda kaj proporcia kun la multekosteco de la laboro. Do tial la urba gvidantaro decidis, anstataŭ tiu plano, ordigi la enfluejan problemon laŭ propono de sia propra inĝeniero, *Vedres.* Tiu propono sajnis ne nur pli malkara, sed por la urbo, kiel akvo-trafika centro, ankaŭ pli utila.

Tamen ankaŭ multaj aliaj faktoroj intervenis al la pligraviĝo de la inundo-situacio ĉe Szeged.

Kiel konate, Vásárhelyi opiniis permesebla kiel plej malgrandan larĝecon por la inundejo 580 metrojn. La



Mapo pri la inundita tereno kaj pri la trarompoj de digoj en 1879

Aŭstriaj Ŝtatfervojoj – pro ŝparemo – konstruigis la fervojponton ĉe Szeged kun nur 352 metra arko, kaj similan akvo-striktiĝon kaŭzis ankaŭ la ponto de la Ebenaĵa Fervojo ĉe Algyő.

La tria, kaj plej danĝera striktejo, pr. 150 metra, estis tuj apud la urbo. Tiun kreis malnova konstruaĵo, la rondelo de la iama fortikaĵo de Szeged, inter la bastiono kaj la Újszeged-a (Novszeged-a) alta bordo, tamen ĝia efiko iĝis fatala nur tiam, kiam oni ĉesigis la menciitan inundejon de *Újszeged.* Oni taksis la retroŝveligan efikon sole fare de tiu striktejo je 50 cm-j, sed oni devas alkalkuli la akvoŝveligan efikon ankaŭ de la malsupraj striktejoj! (Tiu striktejo estis forigota nur en 1888).

La gvidantoj de urbo Szeged ĝustatempe ekkonis la antaŭsignojn de la danĝero minacanta la urbon. Plurfoje ili petis la apogon de la registaro por kreskigi la ŝirmadan sekurecon. Tamen esence ne okazis disponadoj.

En tiu stadio alvenis la eksterordinare precipitaĵriĉa vintro de 1878–79 – kaj ties sekvo estis: la inundokatastrofo de Szeged, – la malsukceso en la heroa lukto de la popolo de Szeged kontraŭ la absolutismo, la latifundioj kaj inundo. Kaj tiel tio iĝis samokaze fonto de la kompleta novkonstruo de la urbo, kiu eĉ ĝis hodiaŭ donis eblecon por validigo de la principoj de moderna urbokonstruado.

Instruaĵoj de la granda inundo

En la tago de la katastrofo – la ĝuste tiutage kunsidanta parlamento – jam povis aŭskulti interpelaciojn pri la malfeliĉaĵo, sed la respondo de la registaro atestis pri plena neinformiteco kaj indiferenteco. La indiferen-

El inter la 6350 domoj de la urbo plene pereis ses mil.

teco daŭris ĝis tiam, kiam kelkaj deputitoj kuraĝis responsigi la registaron, ne sole tial, ke ĝi ne kapablas informi pri la okazaĵoj, sed ĉar ĝi mem estas komplete neorientita, kaj tial ĝi ne estas kapabla fari la necesajn disponadojn.

La kabineto de Kálmán *Tisza** staris en plurdirekta demando-ŝtormo de la justa kaj bazita atako de la opoziciantoj. Inter tiuj cirkonstancoj la kabineto prokrastis la kunsidon por la sekvanta tago, sed ankaŭ tiam ĝi ne donis informaciojn.

La opoziciaj deputitoj nun jam postulis konkretajn dispoziciojn: unuavice sendi soldataron al la pluaj danĝerigitaj lokoj por anticipi katastrofon similan al tiu de Szeged.

Urbo Szeged unu semajnon antaŭ la inundokatastrofo, la 5-an de marto sendis peticion por helpo, tiun peton la kabineto pritraktis la 15-an de marto, kiam unu el la deputitoj de la urbo Nándor *Bakay* subtenis per dramaj vortoj la indikojn de memorando, ripetitajn jam plurfoje kaj ĉiam senrezulte, kaj kiujn la ĉi-tagaj tragikaj okazintaĵoj pravigis. Ne sciante respondi je la argumentoj, K. Tisza prokrastis la pritraktadon.

La plurfoje prokrastita interpelacio fine venis sur la tagordon la 18-an de marto. Tiam la opiziciaj deputitoj aliĝante al la propozicio de N. *Bakay* kaj liaj kunuloj, klare diris sian opinion, ke pro la okazintaĵoj oni devus sidigi sur benkon de akuzitoj la ĉefministron K. *Tisza* kaj la ministron pri trafiko Tamás *Péchy*. Pluraj postulis elsendon de Parlamenta komisiono por ekzameni la antaŭajn kaj postajn okzintaĵojn, – sed K. Tisza deklaris tiun proponon „deklaro de malkonfido", kaj per tio li atingis ke la registarpartia majoritato malakceptis per voĉdono la proponon.

Pro efiko de la premo de la publika opinio kaj de la opozicio, la kabineto ne povis ne aranĝi ian ekzamenon, kaj tial oni decidis inviti eksterlandan komisionon, de ekspertoj ke ili diru sian opinion pri la teknikaj problemoj de rivero Tisza.

La raporto de la komisiono evidente pruvis, ke la kaŭzoj de la katastrofo kaj de malsukceso de la Tiso-reguligo estis serio da teknikaj eraroj faritaj dum la planrealigo. Ĉio rezultis el la malbonaj organizado kaj gvidado de la laboroj, el la noca influo de la lokaj interesoj, el senskrupuleco de entreprenista laboro, t.e. el manko de centra direktado, kontrolo kaj apogo, unuvorte el kulpoj, netaŭgeco de la akvoafera politiko de la registaro.

Propre je la efiko de la Szeged-a inundo leviĝis la tasko de la reguligo de la Tiso-valo al tiu ĝeneral-interesa nacia problemo, sur kiun lokon la iniciintoj: István Széchenyi kaj Pál Vásárhelyi deziris meti ĝin.

Depost tiam pluraj skribis kaj rekonas, ke la inundo ĉe Szeged estis turniĝpunkto en la historio de Tiso-reguligo.

Rekonstruo de Szeged

Por apogi la rekonstruadon de Szeged ne sole la lando, sed preskaŭ tuta Eŭropo, eĉ pluraj transmaraj landoj partoprenis. Ties memoron gardas la nomoj de la bulvardoj.

La novkonstruado de la urbo eble la unuan fojon en la historio donis eblecon por adapti vastasfere la principojn de moderna urboplanado: nome, ke oni formu, konstruu tutan urbon laŭplane, kun ŝtata direktado kaj apogo, ellevante ĝin el la spontana evoluado kaj el la tradiciaj urboformadaj faktoroj, kaj el la agadsfero de la urba aŭtonomio. La projektanto de la rekonstruado de la urbo estis Lajos *Lechner*, kiu pli antaŭe pruvis sian taŭgecon gajninte la internacian konkuron por aranĝado de urboplanoj de Budapeŝto.

La projektanto konsideris ĉiujn postulaĵojn de formiĝo de moderna grandurbo, inter tiuj: la evoluon de la trafiko, la rapidan alireblon al la laborejoj, la aer- kaj sunradio-bezonon de la loĝantaro, ktp. Li projektis larĝajn stratojn, avenuojn, bulvardojn, parkojn, promenejojn kaj klopodis krei favorajn kondiĉojn por la modernaj komunumaj servoj.

Sed la realigon de la grandioza koncepto plurilate limigis la cirkonstancoj. La specifaj situo kaj cirkonstancoj de novkonstruado metis unua tasko la sekurigon de la urbo kontraŭ inundoj. Bedaŭrinde pro financaj kaŭzoj oni devis rezigni pri la ideala solvo, nome pri tio, ke oni altigu la grundan nivelon de la tuta urboteritorio super la altakvo-rivelo. La projektado devis akcepti la kompromisan realigon de la t.n. „ideala nivelo", respektive la programon de ĝia iom-post-ioma formado. Plene levi la ternivelon de la urbo eblis nur ĝis la interna bulvardo, ekstere de tio oni povis pensi nur pri laŭgrada dekliva altigo de la avenuoj resp. stratoj por kunligi la du bulvardojn. Tion oni devis aranĝi tiel, ke okaze de nova inundo – simile, kiel dum la dramo de j. 1879 – la loĝantaro trovu eblecon por rifuĝi al la Intern-urbo. La terenoj ekster la dua („ekstera")

bulvardo restis nealtigitaj. La protektadon kontraŭ inundo, traromponta la ĉefan sekurigan linion, servis nur la ronda taluso ĉirkaŭurba. Tiel formiĝis ĉirkaŭ la tradicia urbokerno la nova XIX jarcenta „burĝa-" zono: komercejoj, bankoj, ludomoj konstruitaj kun reprezentivaj fasadoj, kaj konstruaĵoj respondantaj al la ceteraj postulaĵoj de la urba vivo. La urb-aranĝado ne konsideris, pro limoj de siaj meterialaj rimedoj eĉ ne povis konsideri por teraltigo la jam ekzistantajn agrarajn loĝlokojn kaj la estontajn industrikoloniojn, kaj la loĝteritoriojn de ties laboristaro.

Bedaurinde la kompromisa solvo de la ideala nivelo montriĝis erara. Ĝi kreskigis la nombron de la kavaj lokoj plenigataj per fontantaj grundakvoj ne sekigeblaj, kaj ĝi levis preskaŭ neforigeblajn barojn al la disvastigo de la komunaj servoj. Samtempe ĝi faris pli kara la konstruadon per la postulaĵo de teraltigo ĉirkaŭ la domoj, kaj – pro la provizorkarakteraj konstruadoj – por longa tempo tutajn kvartalojn ĝi fiksis sur la pli frua evolua nivelo.

Malgraŭ ĉio ĉi la projekto de L. *Lechner* estis eminenta ne sole inter la donitaj cirkonstancoj, sed ankaŭ laŭ la postulaĵoj de tiu epoko. Li kreis novan, laŭtempan urbon sur la loko de la detruiĝinta kamparurbo vilaĝeca, – aŭ pli precize: li kreis la eblecojn por formiĝo de moderna urbo.

La renoviĝo kaj evoluo de la kontraŭinunda sistemo de Szeged

Grava kondiĉo por sukcesi en la novkonstruado de la urbo – post la antaŭcentjara inundokatastrofo – estis la konstruado de kontraŭinundaj virkoj de granda sekureco. La realigo de la protekta sistemo pretendis disponadojn koneksajn kaj influantajn la urbaspekton.

Post la granda inundo neniu kontestis, ke la ĉefa protekta linio de la Tiso-bordo estas funde fortikigenda, – kaj ne sole sur la etapo senpera apud la urbo, sed kaj supre kaj malsupre de tiu en tia longeco, ke oni evitu, eĉ en okazo de eksterurba digrompiĝo, la danĝerojn similajn al la 1879-a. Pro la stabileco de la bordaj protektadvirkoj necesis ankaŭ vastasferaj riverreguligaj laboroj, parte por sekurigi la bordetapojn en Szeged kontraŭ disfalo, parte por laŭeble ĉesigi la riverej-mallarĝiĝon. Denove pro la instruoj de la 1879-jara inundo oni opiniis necesa la pliigitan protektadon de la urbo per digrondo, kiu ankaŭ tiam donos sekurecon, se la ĉefa ŝirmadlinio supre aŭ malsupre de la urbo ruiniĝus. La akvo minacas la pli profunde situantajn lokojn de la urbo, – nur malgranda parto de Szeged estis sur kontentige alta loko. Oni esperis, ke per altigo de la ternivelo eblas ĝin levi super la inundniveloj de Tiso kaj tiel la akvo ne povos tien penetri.

Laŭ la planoj pretigitaj dum la j. 1879 oni komencis la laborojn de teraltigo kaj konstruadon de la digrondo. tiuj laboroj ekiris kun grandaj organiziteco kaj elano. La konstruadon de la digrondo oni komencis ĉe la „pordego" de *Tápé*, sur loko de la aliĝo al la ĉefa ŝirmlinio de Tiso. Per ĝi la tuta urbo estis en granda rondo ĉirkaŭita kaj oni alkonstruis ĝin al la fervojaj talusoj, kiujn oni simile altigis kaj fortikigis. La rondtaluso estis kovrita ekstere per brikoj, kaj tiel ĝi estis protektita ankaŭ kontraŭ ondobatoj en ĝia 12 km-a longo.

Paralele kun la konstruado de la digrondo okazis la altigo de la urba tersurfaco.

Szeged-Supra urbo, strato Dugonics-utca
1879
Alsóváros, (Malsupra urbo)



La terlaboroj okupigis 1600 terlaboristojn, inter tiuj krom la lokaj laboristoj ankaŭ italojn el Lombardio. La teraltigo estis finita dum rilate tre mallonga tempo: dum 180 labortagoj, kio estas vere honorinda, precipe se oni kalkulas, ke dum tiu tempo estis movigitaj 16,1 milionoj da kubaj metroj de tero.

Komence de la projektado oni intencis levi la tutan surfacon de la urbo ĝis la 822 cm-a akvonivelo, do je la 82,59 m-a *alteco super la marnivelo*, pli alten, ol la ĝistiama plej alta akvonivelo de Tiso. Tamen rekonis la projektantoj, ke per ties efektivigo oni devus levi la urbon sur multaj lokoj 3–4 metrojn pli alten. Tiel oni ruinigus en la eksteraj kvartaloj la tiam ankoraŭ ne prikonstruitajn fekundajn terojn, – kaj oni volis neniigi nek tiujn, nek la loĝdomojn, restintaj nedifektitaj. Tial oni devis kompromisi. Je la supre menciita nivelo de 822 cm-oj oni konstruis la internan, tn. malgrandan bulvardon, kaj pli altajn nivelojn oni formis nur en la urboparto interne de la malgranda bulvardo. La eksteran tn. grandan bulvardon oni konstruis sur alteco de 700 cm-a akvonivelo. Tiu bulvardo laŭlonge de ĝiaj etapoj ricevis la nomojn de la Eŭropaj ĉefurboj, kiuj sendis donacojn por la rekonstruado de *Szeged: Viena (Bécsi), Berlina, Londona, Pariza, Brusela* kaj *Roma* bulvardoj.

La nivelon de la avenuoj elradiantaj el la urbomezo, oni levis laŭ la alteco de la malgranda kaj granda bulvardoj, sed la interajn terenojn oni lasis kavaj, laŭ iom moderigita dekliveco, kelkloke, almenaŭ provizore ne altiginte la nivelon.

Bordmuro antaŭ rekonstruo



Bordmuro de Tiso post la rekonstruo

La sekurecon de la urbo kompreneble garantiis la fortikeco de la ĉefa ŝirmlinio. Relative pli simpla estis la fortikigo de la digo-etapoj supre kaj malsupre de la urbo. Tiun digon oni levis 1,5 m-jn pli alten ol la 1879-a nivelmaksimumo, kaj post la 1881-jara inundo, kiu ĉe Szeged denove superis per sia 845 cm-a alteco ĉiun ĝistiaman, kvankam tiun inundon la novaj talusoj jam retenis, la koncernan digon oni plidigikis.

Grava estis ankaŭ la transkonstruado de la urbaj digo-etapoj. Por tion fari oni devis ĉesigi la striktaĵon de la inundaj trafluejoj. Sur la Újszegedi (Nov-Szeged-a) flanko kontraŭ la hodiaŭaj klinikoj oni lokigis la digojn pli malantaŭen, en 375 m-a distanco de la transbordaj digoj kaj en la inundejo estis forigitaj ĉiuj konstruaĵoj malhelpantaj la defluadon de la akvo. La plej grava kontraŭ-inunda kreaĵo post 1879 iĝis la bordmuroj, kiujn post multflankaj longaj esploradoj oni konstruis en pluraj fazoj.

Unuopaj etapoj de la bordmura sistemo konstruiĝis – krom la unueca formado de la supra bordmur-sekcio, – parte en ŝtupara realigo kun suba apogmuro, parte en realigo de malsupra bordmuro. La muraĵoj staris sur fostaraj bazoj.

Tamen la grundmoviĝoj de la malsupra bordmuro kaŭzis ĉiam pli kaj pli da zorgoj. En 1889 unu el ĝiaj etapoj devis esti malkonstruita. Tiam oni fine decidis unue aranĝi la riverreguligojn kaj per tio oni esperis anticipi la pluajn damaĝojn.

En la 1880-aj jaroj la Tiso-fluejo ĉe Szeged estis en konstanta ŝanĝiĝo. La rivero jen sedimentiĝis, jen ellavis la fluej-etapon en Szeged, forportante sedimentojn. Oni devis timi, ke la intermitaj profundiĝoj de la fluejo kaŭzos falon de la bordmuro, – tial oni volis malhelpi tion per enkonstruado de transversaj digoj.

En j. 1917, kaj ĉefe post la 1919-a granda inundo daŭrigis la deglitoj de la bordoj, laste antaŭ la tiama finanç-palaco, kaj nun jam ili tuŝis ankaŭ la supran apogmuron. Tiu-okaze oni ĉesigis la kaŭzon de la deglitadoj per renovigo de la akvofiltrada reto, – sed la malleviĝintan etapon de la supra apogmuro oni devis rekonstrui. Inter 1946 kaj 1949 samloke, ĉe la malsupra apogmuro estis deglitadoj, en 1959 antaŭ la klinikoj. Ankaŭ ĉi-loken estis konstruita likad-sistemo, kiu ĉesigis la pluajn damaĝojn.

Post la 1970-a inundo venis sur tagordon nova pliigo de la sekureco de bordmuro. La novan bordmuron konstruigis la Hidrologia Direktoraro de Malsupra Tisoregiono inter 1973–1979.

Grava apartenaĵo de la nova bordmur-sistemo estas la nova filtrad-sistemo kaj la grandamasa ŝtonŝutado en la fluejon de la rivero, kiu celas ŝarĝadon kaj apogadon de la deglitadaj platoj de la bordmuroj en tiu etapo, kombinita kun fasĉinmatraco.

La kontraŭinunda sistemo de urbo Szeged en la pasintaj cent jaroj plene servis sian taskon kaj eble nur en 1970 ni povis pensi la unuan fojon, ke dua inundo povas atingi la urbon.

Post la tiama sukceso de la kontraŭ-inunda protektado, – kontraŭ la nunjara, iom malpli ol 1100 cm-a akvonivelo sukcese funkcianta bordmur-sitemo vekas rajtan esperon, ke en la estonte aperantaj tempetapoj ne minacos inundkatastrofo la urbon.

Tamen nia kontraŭinunda protektado neniam povas esti rigardebla finita. La virkoj ne en si mem ŝirmadas: al ili apartenas ĉiam la inĝeniero, la teknikisto, la laboristo, hidrologia oficisto, – kiuj ne sole konservas, sed ankaŭ evoluigas la inundpreventon.

(Tr. A. *Pechan*)

**libera reĝa urbo:* estas privilegio kaj titolo de urboj, kiun nomon donis la reĝo por honorigi meritojn faritajn al la lando kaj reĝo. Kondiĉo de tiuj rajtoj estis krom la supre menciitaj meritoj, ke tiuj urboj pruvis, ke ili kapablas memstare kovri siajn administrajn ktp. elspezojn.

***Buda* kaj *Peŝto* kune kun la tria urbo *Óbuda* (Old-buda) estis unuigitaj en unu urbon sub nomo *Budapest* (Budapeŝto) en 1872. Tiam la loĝantaro nombris 292 milojn.

***Lajos (Ludoviko) *Kossuth* (1802–1892) gvidanto de la revolucio kontraŭ dinastio *Habsburg*, (1848/49), gubernatoro de la revolucia registaro.

*Stefano Széchenyi (1791–1860) la „plej granda hungaro", havas grandegajn meritojn en la modernigo, eŭropigo de la hungara kultura, socia vivo kaj tekniko: reguligo de malsupra Danubo, fondo de Danuba ŝipnavigado, konstruo de Danuba Ĉenponto, de H. Scienca Akademio, ĉevalbredado, ktp.

*Vidu H. V. 1978/1. paĝoj 26–28 pri Vásárhelyi, Beszédes kaj Széchenyi, kaj sur paĝo 6–8 pri Kossuth.

**fidkomisio:* estis feŭda bienproprajo, kiu interne de la familio kun preskriboj ligite, estis heredebla, nevendebla kaj nedebetebla.

*K. *Tisza* (1830–1902) ĉefministro inter 1975–1890. (Hazarde la hungara nomo de rivero Tiso estas identa kun tiu de la ĉefministro: „Tisza").

KONSERVAS VIAN FIGURON,
REDONAS VIAN SVELTECON

MIKÖV

TABLOJDO "SACHARIMID"
en via kafo!
TARTRATA ACIDO
en teo kaj limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025 Budapest XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176-716, 573-088

Szilárd Bálint

Turisma vojaĝo sur la Meza Maro

Varmeta vento leviĝis. La maro ludis fantaziajn kolorojn, de verda tra blua ĝis la arĝentbrila grizo. La ondoj densiĝis, elakviĝis kaj la akvokolonoj refalegis. Ne nur la ŝipo dancis, ankaŭ la vojaĝantoj kliniĝis tien kaj reen.

Eva sidis ĉe malgranda tablo en la granda salono de la ŝipo. Vidalvide al ŝi ĉe alia tableto bruna, juna viro insiste rigardis ŝin. Ĉe la angulo de la salono ludis dancmuzikon orkestro. Ili ankaŭ balanciĝis. Multe da homoj forlasis la salonon, malmultiĝis la bunta publiko, kun murblankaj mienoj ili ŝanceliĝadis eksteren.

La bruna viro haltis antaŭ Eva:

– Pardonon . . . ĉu vi fartas malbone?

– Ne . . . tute ne . . .

– Vi estas ege pala! Ĉu mi povus akompani vin al via kajuto

– Dankon . . . mi ankoraŭ restas ĉi tie . . .

La viro kliniĝis kaj foriris. Post kelkaj minutoj la programestro anoncis, ke pro la granda ŝtormo finiĝas la programo, li petas ĉiujn iri al sia kajuto. Eva ekstaris, la bruna viro jam ne estis videbla. Tute ne estis simpla afero atingi la kajuton. Sur la flanko de la koridoro estis tenilo kaj oni povis alkroĉiĝi. La pordo de la ŝipkuracisto estis malfermita, oni povis peti medikamenton kontraŭ la marmalsano.

Dumtempe Eva atingis sian kajuton. Dum momenta tempo ŝi ekvidis ĉe la fino de la koridoro la nigrajn okulojn de la bruna viro. En la kajuto ŝi kaptis la brilan metalstangon ĉe la lito kaj starante pensadis pri la mistera viro, kiu tiel persiste rigardis ŝin. Eva malrapide sin malvestis kaj en la lito ŝi rigardis la grandajn ondojn, kiel ili frapadis la fenestron de la kajuto, kiel batis, sieĝis la rondan vitrotabulon. Malrapide ŝi ekdormis, la ŝipo balanciĝis, kiel lulilo, ŝi havis konfuzan sonĝon.

Ŝi abrupte vekiĝis kaj vidis antaŭ si la nigrajn okulojn de la bruna viro.

– Kion vi volas ĉi tie . . . kiamaniere vi povis eniri?! . . .

– La pordo ne estis ŝlosita, mi volas paroli kun vi!

– Forportu vin!

– Aŭskultu min . . .

– Malaperu! – kriis Eva kaj kaptis la vitroflorujon kaj kun plena forto ĵetis ĝin al la kapo de la bruna viro.

La vizaĝon de la viro inundis la sango, li elprenis naztukon kaj forkuris el la ĉambro.

Eva zorgeme ŝlosis la pordon kaj maltrankvile turniĝadis en la lito. Post duonhoro oni frapis la pordon. La unua ŝipoficiro kaj sekreta civila policano eniris en la ĉambron.

– Estimata sinjorino, ĉu vi konas s-ron Ali Hafiz? – demandis la detektivo.

– Tute ne . . . mi konas neniun ĉi tie . . .

– De via kajuto ĝis la tualetejo estis troveblaj sangosignoj sur la planko de la koridoro!

Eva sincere rakontis la tutan eventon.

– La kapdifekto ne estas interesa, sed la pikoj per ponardo estas gravaj . . . Kie estas via ponardo aŭ granda tranĉilo?

– Mi ne havas ĝin . . .

La viroj traserĉis la kajuton kaj la valizojn, sed ili trovis nenion.

– Mi petas vin, ne forlasu vian kajuton . . . morgaŭ antaŭtagmeze la ŝipo albordiĝos en la haveno kaj poste oni esploros la aferon . . . – diris la detektivo.

Komencis mateniĝi, sed ankoraŭ estis mallumo. Eva elrigardis tra la ronda ŝipfenestro. La domoj inter la palmoj apenaŭ estis videblaj, nur la bluaj hidrargaj-elektraj lampoj dispersis lumon sur la stratojn. La ŝipo malrapide naĝis al la haveno. Poste abrupte komencis heliĝi, el la maro ruĝa lumo filtriĝis sur la urbon kaj la domoj iĝis perle grizaj. Freŝa lumo salutis la urbon kaj Eva angore pensis pri la sekvonta komplika afero.

La ŝipo albordiĝis. La urbo estis finstacio de la mediteranea trafiko. La vojaĝantoj en granda amaso forlasis la ŝipon. Poste oni frapis la pordon de la kajuto. La unua ŝipoficiro kaj alia belvestita viro aperis en la pordaperturo.

– Kara sinjorino . . . via hotelĉambro kiun vi mendis en via lando, estas je via dispono . . . tiu sinjoro akompanos vin al la hotelo Astoria. Mi ege bedaŭras, ke en nia ŝipo vi falis en malagrablan situacion . . . – diris kliniĝinte la ŝipoficiro.

En la kapo de Eva muĝis la pensoj, el la taksio ŝi vidis nenion el la bunta tumulto de la svarmanta urbo.

Pasis la tuta tago, okazis nenio, ŝi ne havis rajton forlasi la hotelon. La sencela atendado forte muelis siajn nervojn. Fine plene vestita ŝi surfalis la liton kaj ploregis pro la senpoveco.

Postan tagon el la loka policejo vizitis ŝin oficiro kaj montris al ŝi luksan ponardon.

– Ĉu vi konas tiun ilon?

– Tute ne . . .

– Per tiu armilo oni pikis s-ron Hafiz!

– Kio okazis kun li?

– Li kuŝas en la hospitalo, ĝis nun li estas senkonscia . . . Tiu ponardo apartenas al tiu sinjoro, kiu loĝis en via najbara kajuto en la ŝipo kaj li antaŭ kelkaj tagoj informis la kapitanon, ke la ponardo malaperis el la kajuto . . .

– Tio neniom koncernas min . . .

– Vere?! . . . Oni vidis vin, kiam iun matenon vi eniris en la najbaran kajuton!

Eva paliĝis kaj hezite respondis:

– La purigistinoj malfermis ĉiujn kajutpordojn kaj mi eriĝis, sed mi tuj forlasis la fremdan kajuton . . .

– Bonvolu doni sur tiun paperon fingrostampon, ĉar la daktiloskopio pri la ponardo jam estas preta! – diris la oficiro kaj forlasis la ĉambron . . .

* * *

Kara Leganto! La resto de la manuskripto bedaŭrinde perdiĝis, tial la redakcio petas vian helpon fini la historion. Kion volis diri s-ro Hafiz al Eva, kaj kiu pikis lin? La aŭtoroj de la du plej bonaj kontribuaĵoj – ampleksantaj ne pli ol 30 tajpitajn liniojn – ricevos libropremion kaj la tekstoj aperos en HV.

Ora Obelisko por hungara ensemblo

La kooperativa ensemblo „Tápió mente" de Nagykáta (komunumo ĉ. 50 km-jn proksime de Budapeŝto) gajnis la ĉefpremion, la Oran Obeliskon, de la 36-a Internacia Folklorfestivalo en Agrigento de Sicilia. En la festivalo partoprenis 15 ensembloj el kvar kontinentoj antaŭ publiko de duonmiliono da homoj. Pere de la kolora prezentado de la itala TV eĉ pluraj milionoj da spektantoj povis rigardi la prezentaĵojn de la ensembloj.

Esperanto-aranĝajoj en Hungario

ZIP **Börzsöny**
ZAMENHOF INTERNACIA PACMARŜO
05–04/06 O: Budapeŝta Komitato de HEA
A: Budapest, Pf. 153., H–1443

MER **Szolnok-Tiszaliget**
MEZLERNEJA RIPOZTENDARO
06–17/25 O: Junulara Komisiono de HEA
A: Budapest, Pf. 193., H–1368

Miskolc
07–07/08 FERVOJISTA RENKONTO
O: Esperanto-Grupo
„Vörösmarty"
A: Miskolc, Szemere u. 26. H–3501

IMEK **Hódmezővásárhely**
07–08/14 2-a INTERNACIA MEDICINA
ESPERANTO-KONFERENCO (IMEK)
O: Medicina Esperanto-Grupo
A: Hódmezővásárhely,
Dr. Imre József u. 2.
H–6800

PIT **Zánka**
12-a PIONIRA INTERNACIA TENDARO
O: Teritoria Komitato de HEA
A: Pécs, Pf. 2, H–7601

MIEL **Mezőtúr**
MEZŐTUR INTERNACIA
ESPERANTO-LABORKAMPADO
O: Esperanto-Grupo „Baghy Gyula"
A: Mezőtúr, Petőfi u. 5, H–5400

SEU **Gyula**
07–08/14 17-a SOMERA ESPERANTO-
UNIVERSITATO
O: Konsilantaro de SEU
A: Gyula, 48-as u. 11, H–5700

Budapest
07–16 INTERNACIA VIRINA RENKONTO
O: Virina Komisiono de HEA
A: Budapest, Pf. 193., H–1368

IREN **Abaliget–Pécs**
12-a INTERNACIA RENKONTIĜO
NATURAMIKA
07–16/25 O: Teritoria Komitato de HEA
A: Pécs, Pf., H–7601

VIS **Budapest–Eger**
08–15/20 8-a VARIA INTERNACIA SEMAJNO
O: Budapeŝta Komitato de HEA
A: Budapest, Pf. 153., H–1443

AMi **Kaposvár–Zselic**
4–a AŬTUNA MIGRADO
09–07/09 O: Turisma Komisiono de HEA
A: Pécs, Pf. 2., H–7601

VEF **Budapest**
1979–12–28/
1980–01–02 9-a VINTRA ESPERANTISTA FERIO
O: Budapesta Komitato de HEA
A: Budapest, Pf. 153., H–1443

Kampanjo inter sportistoj relanĉita



Antaŭ kelkaj jaroj Hungara Esperanto-Asocio iniciatis fari intervju-serion internacian kun olimpikaj ĉampionoj en la sporte plej gravaj landoj. Tiuj intervuoj celus ricevi opiniojn de elstaraj sportistoj pri la lingva problemo en la internacia sporta vivo, precipe en la Olimpikaj Ludoj. Kun aperigo de tiuj intervjuoj en pluraj naciaj lingvoj, estus eble multe fari por la ekuzo de Esperanto inter sportistoj. Nun tiu kampanjo estas relanĉita.

Kiu volas kunlabori en tiu kampanjo, skribu al Imre *Szenes,* redaktoro de „Világ és Nyelv" (Mondo kaj Lingvo), hungarlingva revuo de HEA. Adreso de la redakcio: H–1368 Budapest, Pf. 193.

Peto el Lahti

Esperantistoj en la finna urbo Lahti volas atingi eldonon de esperantlingva prospekto fare de la Turisma Oficejo. Por ke ili sukcesu en tio, estas necese, ke multaj esperantistoj petu tian prospekton pri Lahti. Skribu tiucele al: *Lahden kaupungin matkailutoimisto, Kaupungintalo, SF–15100 LAHTI 10, Finnlando.*

Simpozio pri Eŭropa lingvo

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en la Universitato „René Descartes" de Parizo organizos simpozion pri *Principaj kondiĉoj por ĝenerala internacia/Eŭropa lingvo.* La simpozio okazos inter 1979–05–17/19. Oni ekzamenos la taŭgecon de la latina lingvo, de grandaj naciaj lingvoj, de aliaj (plejparte naturalismaj) lingvoprojektoj kaj de Esperanto.

Esperanto-libro por kultura datreveno de UNESCO

Kadre de la kulturaj datrevenoj de UNESCO, ekde 1978–07–22 oni solenas en la mondo *Jaron de Janusz Korczak.* Ĝi intence kuniĝas parte kun la Internacia Jaro de la Infano, proklamita por 1979, ĉar Korczak estis granda amiko de la infanoj kaj nelacigebla batalanto por la infanaj rajtoj. La Korczak-Jaro estas omaĝo al la granda filo de Pollando, pedagogo, edukisto kaj verkisto, kies eduk-teorioj kaj praktiko fariĝis konataj mondskale, speciale en pedagogiaj medioj. *Nun kun ĝojo ni povas komuniki, ke okaze de la Korczak-Jaro en Pollando aperos* libro pri J. Korczak ankaŭ en Esperanto.*

La famo de Korczak fontas el du faktoroj – li estas kreinto de propra eduk-skolo, kiun studas kaj disvastigas internacia movado –, sed inter pli vasta publiko diskonigis lian nomon lia morto: dum la dua mondmilito li decidis iri en la gaskamerojn de la Hitlera mortotendaro en Treblinka, por ne forlasi „siajn" mortkondamnitajn infanojn el la juda orfejo de la Varsovia geto. Tiele plej profunde demonstris J. Korczak sian komprenon de la ligo inter teorio kaj vivpraktiko.

La jubilea solenado ne havas nur festan karakteron. Okazis kaj okazas ankaŭ pluraj sciencaj konferencoj, en kiuj specialistoj pritraktas la sciencan, kaj intime kun ĝi ligitan literaturan kreadon de Korczak. Aperas ankaŭ novaj diverslingvaj studoj pri li, kaj pliaj biografiaj libroj.

Al la ĉi-lastaj apartenas la E-lingva libro menciita supre. Verkis ĝin elstara pola pedagogo Alicja *Szlazakowa,* kaj tradukis en Esperanton Jerzy *Uspienski.* La libro havas simplan titolon: „Janusz Korczak", sed ĝi estos tre bunte eldonita far la „Eldonejoj Pedagogiaj kaj Lernejaj". Tio estas kvazaŭ negranda albumo riĉe ilustrita per historiaj fotoj kaj grafikaĵoj, interalie de alilandaj artistoj, kiuj omaĝis al Korczak per siaj verkoj. La teksto estas vigle verkita biografio, riĉe dokumentita per citaĵoj el la verkoj de Korczak kaj aliaj materialoj. Ĝi prezentas ne nur la heroon, sed samgrade ankaŭ lian verkon, liajn ideojn kaj idealojn tre aktualajn en la nuna epoko de valor-kaoso. Ne sen emocio la aŭtorino prezentas la komprenon kaj opiniojn de Korczak pri la esenco, graveco kaj komplikeco de la infan- kaj junaĝo en la procezo de la homa maturiĝo. La profunda, realisma kaj kunsentema kompreno de la homo permesis al Janusz Korczak formuli principojn pri la homa edukado kaj memedukiĝo, kiuj taŭgas ne nur por edukistoj. Ilin povas – eble eĉ devas – apliki la gepatroj kaj ĉiuj homoj, kiuj deziras plibonigon de la interhomaj rilatoj. Pro tio ĝuste la scio pri J. Korczak, la kono de liaj pensoj kaj ideoj esprimitaj en la pedagogiaj verkoj kaj en la riĉa porinfana (sed ne sole porinfana!) literatura verkaro estas tre populariginda.

Por la esperantistoj estos certe interesa informo, ke Korczak estis aktiva simpatianto de Esperanto. En la studentaj jaroj li kolegumis kun la filo de d-ro Zamenhof, Adamo. Plej verŝajne li konis ankaŭ la aŭtoron de Esperanto. Kaj li devis kompreni la valorojn de la IL por la internacia kunagado de la infanoj, konsiderata de Korczak unu el la plej gravaj eduk-faktoroj. Pruvas ĉi tion interalie la fakto, ke la iniciatita kaj longtempe gvidata de li, unua en Pollando infana-junulara gazeto (de gejunuloj redaktita kaj verkita), la fama „Malgranda Revuo" *(Maly Przeglad)* aperadis ankaŭ en Esperanto! Tio okazis unufoje jare, la 18-an de majo, en la Tago de Bonvolo, sed en tiu ĉi tago la kompleta numero de la gazeto estis esperantlingva. Skribas pri tio ankaŭ Alicja Szlazakowa.

Por tiuj kaj aliaj motivoj la libro – aperanta ankaŭ en la angla, franca, germana kaj rusa – la plej multajn legantojn devos trovi inter esperantistoj. Laste mi aldonu, ke la E-varianto havas la plej grandan eldonkvanton, dank' al financa helpo fare de Pola Esperanto-Asocio

Jerzy *Uspienski*

*Probable la libro aperos samtempe kun tiu ĉi numero de HV.

Hungaraj memorajĵoj en la urbo Gdansk

Hungaroj kaj poloj estas amikoj depost multaj jarcentoj. Malnova pola kanto diras:

Pol', hungaro –
frata paro,
je la glavo,
trink-regalo.

La du naciaj historioj havas paralelaĵojn, kaj la du popoloj ĉiam helpis unu la alian, kaj estas gravaj personecoj, kiuj figuris en la nacia historio de ambaŭ landoj.

Gdansk estas unu el la polaj urboj plej malproksime situantaj de Hungario, tamen ĝi enhavas kelkajn interesaĵojn por hungaroj.

La hungara historio – simile al la pola – estis preskaŭ senĉesa batalo por la libero. János *Hunyadi* (1407–1456) estis la triumfa gvidanto de la hungaraj kaj balkanaj popoloj en la liberbatalo kontraŭ la turkoj en la dekkvina jarcento. En lia armeo partoprenis ankaŭ poloj. En Gdansk, en la „Longa foirejo" *(Dlugi Targ)* troviĝas reliefo sur la „Ora Domo" *(Zlota Kamienica)* pri la bataloj de János Hunyadi. Ĝia surskribo estas: *Hunniades.*

Stefano *Báthory,* regnestro de Transilvanio (1571–1575) estis elektita pola reĝo en la jaro 1575. Li restis pola reĝo ĝis sia morto en 1586. La urbo Gdansk deziris alian reĝon en la persono de la aŭstra imperiestro Maksimiliano. Báthory per armiloj devigis la urbon rekoni lin. En lia armeo troviĝis ankaŭ Bálint *Balassi* (1554–1594), la unua elstara figuro de la hungara literaturo. En Pollando Balassi verkis ampoemon „Al pola fraŭlino ludanta citron".

Ekde la jaro 1526, kiam Hungario estis venkita de la turkoj, la hungara popolo batalis samtempe kontraŭ la turkoj kaj aŭstrogermanoj. La pola reĝo Jan *Sobieski* politikis amike al la francoj, kiuj estis malamikoj de Habsburgoj. Pro tio en la unua periodo de sia regado Sobieski helpis Transilvaniajn hungarojn (kies princo estis Imre *Thököly).* Poste li batalis kontraŭ la turkoj, kaj li estris la unuigitan kristanan armeon, kiu forpelis la turkojn el Hungario. Pro tio ne nur Gdansk havas sian monumenton de Jan Sobieski, sed ankaŭ Hungario: ĝi staras en la hungara urbo Esztergom, sur la Danuba bordo.

En la dekoka jarcento hungaroj denove ribelis kontraŭ la Habsburga subpremo, per la gvidado de Ferenc *Rákóczi* la Dua (1676–1735; vd. pri tio la n-ron 5/1976 de HV). Li aliancis kun la franca reĝo Ludoviko la 14-a, kiu liveris armilojn al la hungaroj. Konstanta hungara delegito loĝis en la urbo Gdansk por ricevi la francan helpon kaj teni la kontakton kun la francoj. Post la malvenko de la liberbatalo (en 1711), multaj hungaraj rifuĝintoj vivis en Gdansk. Mem Rákóczi loĝis tie dum mallonga tempo (en 1712–1713) sub la pseŭdonomo „grafo de Sáros". Li loĝis en la malnova parto de la urbo *(Stara Predmiescie),* ĉirkaŭ la preĝejo de Sankta Elizabeta.

En ĉi tiu preĝejo oni entombigis kortegan marŝalon de Rákóczi, Ádám *Vay,* kun liaj edzino kaj filino. La kopioj de iliaj tombŝtonoj ĝis nun restis en la preĝejo: la kadavrojn kaj la originalajn tombŝtonojn oni transportis al Hungario en la jaro 1906.

Ĉi-supre estas vicigitaj nur la ĉefaj historiaj ligaĵoj de la urbo Gdansk kun Hungario; tiuj ĉi kontaktoj de la pasintaj jarcentoj servas kiel bona bazo por nuntempa reciproka simpatio kaj amika kunlaborado inter poloj kaj hungaroj.

D-ro Zsuzsanna *Berényi*

Fabloj eternaj

Ezopa Saĝo. Sepdeksep fabloj verse reverkitaj de K. Kalocsay. Dua eldono. Eldonis: Arthur E. Iltis, Saarbrücken, 1978. 127 p., 20 cm. Prezo: 12,– ned. gld. (Por Hungario: 100,– forintoj.)

La kripla korpo disvolviĝis, sed
honoro lia ree brilis pure,
spirito lia lumis, kaj ĝi lumas
ĝis nun, kaj lumos plu, neestingeble . . .

Jene Kalocsay skribas en la fablaro, kiun eldonis la dana eldonejo KOKO en la jaro 1956, kaj kies pecoj fariĝis komuna kulturtrezoro jam de du generacioj de esperantistoj. Tiuj ĉi versoj tentas esti rilatigataj al Kalocsay mem: li ankaŭ postlasis verkaron, kiu „lumas ĝis nun, kaj lumos plu, neestingeble . . ."

Estas tre bonvene, ke el la multaj Kalocsay-verkoj reeldoniĝis ankaŭ tiu ĉi, kiu havis siatempe egale grandan sukceson ĉe publiko kaj kritiko. Fabloj ĉiam estis populara ĝenro, kaj ilin volonte legas ankaŭ personoj, kiuj ne multe elspezas por poemlibroj. Tamen, tiuj moke spritaj historietoj estas samtempe ankaŭ bona poezio, kiu do kvazaŭ „kontrabandiĝas" al nepoeziemaj legantoj.

Ezopajn fablojn prilaboris pluraj esperantaj poetoj, sed la plej konataj fariĝis la reverkoj de Kalocsay. Dank' al tiu ĉi represo la internacia legantaro denove povos ĝui tiujn ĉi 2500-jarajn trezorojn, rejunigitajn per la plej moderna lingvovesto, Esperanto.

Por inde fini tiun ĉi recenzon, staru ĉi tie ok versoj de Kalocsay, ĝis nun neaperintaj, per kiuj li dankas al Poul *Thorsen,* tiama gvidanto de la eldonejo KOKO, pro la klopodoj koncerne la aperigon de la unua eldono de *Ezopa Saĝo.* (La versoj estis tiritaj el letero de 1956–04–04 de Kalocsay al P. Thorsen; ĵus s-ro Thorsen afable havigis al ni tiun ĉi leteron.)

Kara Thorsen, kiu paŝtis mian bestkolekton Ezopan,
ĉiuj bestoj prizorgitaj dankas vin kun granda salut'.
Beu ŝafo, bleku bovo, boju hundo, hurlu leono,
sin enmiksu la azeno entuziasme per ia'.
Kaj mi mem, la orkestrestro (primus inter pares), *omaĝas*
al vi per unua mia originala distiĥon'.
Kaj se en daktiloj puraj vi la pulson elanan ĝuas,
sentu, ke en ili saltas mia danke batanta kor'.

V. Benczik



Idilioj el Nov-Zelando

La Nova Butikisto de Nukugaia kaj aliaj noveloj de Bertram Potts. Eldonis: TK-Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1978. 250 p., 21 cm. Prezo: 15,– ned. gld.

Jen, dua novelaro de la nov-zelanda esperantista aŭtoro Bertram *Potts,* por kiu la jaro 1978 montriĝis aparte sukcesa: en tiu ĉi numero ni recenzas ankaŭ lian porinfanan poemaron, eldonitan pasintjare en Japanio.

La unua novelaro de Potts *(Nokto da timo,* 1971) estis laŭ amplekso modesta, dum ĉi tiu dua jam enhavas 13 verkojn, sekve ĝi povas doni klaran bildon pri la talento de la aĝa verkisto. Ni devas diri, ke tiu bildo estas nepre favora, kaj Potts firmigis sian lokon en la avangardo de la Esperanta prozo.

Donas interesan koloron al la novelaro, ke la fono de preskaŭ ĉiuj pecoj estas Nov-Zelando kaj ĝia insularo. Tiu fora parto de la mondo estas malmulte konata en la nuntempaj centroj de la E-movado, sekve la noveloj de Potts povas servi ankaŭ kiel fonto de informoj.

Tamen, antaŭ ĉio ili estas *agrablaj* legaĵoj. Tiu epiteto, kiu en nacilingvaj kritikoj ofte maskas nekontentecon de la recenzanto, en Esperanto havas alian nuancon. Ĝi signas literaturajn verkojn, kiuj verkiĝis unuavice por esti legotaj, sen ia strebado al juĝoj de verkisto-kolegoj aŭ de la postepoko. Potts ne eltrovis panaceon, kiu magie solvos ĉiujn niajn problemojn, de la naskolimigoj ĝis malarmado, li eĉ ne eltrovis racian internacian monsistemon: li verkas por distri nin.

Neniu pensu, ke tiu celo distri rezultigas verkojn sensignifajn. Potts mirinde konas la homojn, iliajn virtojn kaj malvirtojn, kaj li havas ankaŭ la necesan stilan arsenalon por plej trafe priskribi kaj eternigi tiujn ecojn.

Ĉefa trajto de la noveloj de Potts estas *idilio.* Idilio, kiu radias serenecon, silentan kaj mildan optimismon. Tiu ĉi trajto estas tiom pli atentinda, ke preskaŭ ĉiuj pecoj enhavas ĝermon de ebla konflikto, sed tiuj konfliktoj neniam disvolviĝas: mortigas ilin ne iaspeca dia interveno, sed sana sereneco de la atmosfero. La du ĉefaj konflikteblo j estas la rilato inter blankuloj kaj maorioj (praloĝantoj de Nov-Zelando) kaj la potencavido de cezaretoj en la malgrandaj insuloj (ekz. Stratler en *La Kopro-Kontisto* aŭ Pukuparata en *La Nova Butikisto de Nukugaia).*

Tiu kvieta etoso verŝajne ne estas nuntempa trajto de Nov-Zelando: Potts revivigas en la noveloj verŝajne siajn junaĝajn rememorojn. Priverkante ilin, li mem certe sentis la agrablan freŝon, kiu min tuŝis dum la legado, kaj vekis en mi flugemajn sopirojn al tiu fabellando.

Krom la atmosferkrea forto la plej atentinda virto de la Potts-a plumo estas la preciza, tamen ĉiam facilflua, elegante trafa stilo. Troviĝas multaj originalaj parolturnoj, elminado de latentaj kapabloj de la lingvo, tamen ili ĉiam efikas tute nature kaj simple. Do, ekzistas la ŝatinda eblo, ke tiuj turnoj sukcesos influi ankaŭ la parolan lingvon.

Ĉe la fino decus mencii du-tri plej elstarajn pecojn de la volumo. Tio ne eblas. La novelaro de Potts estas homogene bona, sen altaj pintoj aŭ profundaj valoj.

V. Benczik

Klasika poemaro

Streĉita Kordo. Originalaj poemoj de Kálmán Kalocsay. Dua eldono. Laŭ la unua eldono, aperinta ĉe Literatura Mondo en 1931, represis: Saarlanda Esperanto-Ligo, Saarbrücken, 1978. 189 p., 20 c. Prezo: 16,50 okcidentgermanaj markoj.

Dank' al Sarlanda Esperanto-Ligo „Streĉita kordo" denove revenas al legantoj. Antaŭ 48 jaroj L. Tárkony inspire nomis ĝin „. . . poemlibro kies apero malfermas novan horizonton por nia literaturo."

Nun, el la distanco de multaj jaroj, ni denove trafoliumas ĝin por konstati, ĉu vere ĝi estas kaj restas klasika verko aŭ jam plenumis sian rolon kaj iom post iom malaperos el la horizonto de Esperanto-literaturo? Ĉu ankaŭ nun ni trovas en ĝi pensojn

kaj sentojn, kiuj tuŝos iun kordon en niaj animoj, aŭ sonoj de „Strečita kordo" restos por ni malproksimaj kaj fremdaj?

„. . . Resonu tamen la kašitajn kantojn, Vi eble povos trovi aŭskultantojn."

Tiel modeste en la prologo la poeto deklaras sian profundan senton kiu naskis tiujn poemojn, serĉante vojon al la homoj: la fundamenta ideo de la poemaro estas la senlima amo al la homoj. La versaĵoj el ĉiuj 7 cikloj de la poemaro elokvente pruvas tiun konstaton.

La unua ciklo „Eĥo de l' Forta Voko" enhavas la priesperantajn poemojn de Kalocsay. Poemojn per kiuj la poeto esprimas sian revon pri „Nova Sent'" kaj „frata gent' ". Malgraŭ la brila tekniko tiuj poemoj ne emociigas. La temo kaj poetikaj rimedoj estas bone konataj ankoraŭ el la verkoj de Zamenhof. La tono estas tro patosa kaj la legantoj vane serĉas la veran, veluran voĉon de Kalocsay. Nur en la versaĵoj, kiel „Mortis Grabowski" kaj „La renkonto de kantoj" la sento estas pli natura kaj pli motivita.

La versaĵoj el la dua ciklo „La enfalinta mino" estas verkitaj inter la jaroj 1918–1920. Tiu signifas ke ili naskiĝis paralele kun la poemoj el la unua ciklo, sed la diferenco inter la du cikloj estas granda. Jam la enkonduka poemo „Iras abiturient' . . ." atestas pri poeto kun akra psikologia rigardo. La temo de tiu poemo ne estas nova kaj originala. Ĉiu homo en sia vivo almenaŭ foje eksentis la ĉagrenon pro la forflugo de la juneco, sed legante la poemon de Kalocsay ni kvazaŭ por unua fojo pli profunde sentas la feliĉon de „. . . l' tempoj kiuj ĉesis . . .", kaj la lastaj vortoj de la poemo pike rememorigas nin, ke malgraŭ la flugaj revoj „Filistro estos ankaŭ mi".

„Iras abiturient' . . ." estas modelo de plena unueco de enhavo kaj formo. Dank' al la vigla ritmo, al la internaj rimoj, la strofoj flugas. Por mi tiu poemo estas eta brilianto en nia originala poezio.

La antologioj de la originala Esperanto-poezio ankoraŭ estas malmultaj, sed se iam aperos antologio de originalaj ampoemoj en Esperanto, centran lokon en tiu antologio okupos kelkaj poemoj de Kalocsay el la ciklo „Aglo kaj kolombo". Ne nur tial ke ili estas perfektaj laŭ la formo. Kelkaj inter ili estas sonetoj, unu el la plej malfacilaj poetikaj formoj, sed ili estas vere sinceraj koraj kantoj.

Post ĉiu paĝo kaj post ĉiu ciklo ni konstatas la evoluon de Kalocsay kiel poeto. Iuj esperantistoj pensas, ke Kalocsay ne estis poeto laŭ destino, sed laŭ neceso. Eble ili pravas, ĉar antaŭ Kalocsay ne ekzistis vera originala Esperanto-poezio. Li ne havis instruistojn en Esperanto-poezio.

La poemoj de aliaj cikloj malkovras pli riĉan poezian mondon. La temoj estas pli abundaj, la rimedoj por ilia esprimo pli modernaj, la lingvo pli fleksebla, interesaj novaj rimoj, variaj ritmoj.

La poemoj „Patrineco" estas unu el tiuj poemoj, kiuj plej elokvente pruvas la talenton de Kalocsay. Per ĝi li viciĝas inter la plej talentaj poetoj el la monda literaturo, kiuj enrigardis en la faldojn de la delikata virina koro.

Multaj esperantistoj pensas, ke la stilo kaj lingvo de Kalocsay estas malfacilaj. Tio estas granda eraro. Kalocsay riĉigis Esperanton, sed la lingvo de liaj originalaj poemoj estas kristale klara. Ankoraŭ el unua legado la legantoj facile ekmemoras apartajn versojn kaj strofojn.

Mi estas certe ke tiu ne estas la lasta reeldono de „Strečita kordo". Ankoraŭ multaj generacioj de esperantistoj kaj ankaŭ eble ne nur esperantistoj revenos al tiu poemaro, ne nur por renkontiĝi kun la pensmaniero kaj poetika talento de Kalocsay, sed ankaŭ por prijuĝi la evoluon de nia nova Esperanto-poezio surbaze de tiu klasika verko.

Georgi *Mihalkov*

Skotoj ne estas angloj

Skota Antologio. Kun antaŭparolo de William Auld. Eldonis: Kardo, Glasgow, 1978. 255 p., 20 cm. Prezo: 3,20 britaj pundoj.

Antaŭ kelka tempo paroli pri skota verkisto en la hungara lingvo ŝajnis ekstravaganca precizemo: ordinara hungaro „rekonis" la vorton *skoto* nur en ŝercoj pri avareco, kaj, en adjektiva senco, koncerne viskion: tamen, en ĉi lasta kazo *skota* eĉ havis solenan stilnuancon. Tiu ignoremo ŝanĝiĝis nur lastatempe, unuavice pro oftaj gazetnovaĵoj pri la skota naciisma movado.

Male, en la hungaraj literaturaj enciklopedioj ĉiuj verkistoj, aperantaj en tiu ĉi antologio, portas indikon pri sia skoteco. Tamen, tiuj indikoj nur sporade eniris la konscion de la literaturkonsumantaj hungaroj: verŝajne tre malmultaj el ili povus nomi skotan verkiston krom la popularega *Burns*.

„Skotoj ne estas angloj" – mi skribis titole de tiu ĉi recenzo, sed mi devas aldoni, ke tiun konvinkon mi havis jam antaŭ ol ekfoliumi tiun ĉi antologion: se mi pensus male, verŝajne ĝi ne povus ŝanceli mian eraran opinion. Eĉ tia verko, pri kiu aparte atentigas la antaŭparolanto *(La rakonto de Vagul-Vilĉjo* de Walter *Scott)*, ne prezentis por mi ion vere diferencan disde tio, kion mi kredas esti normala atmosfero de angla literaturaĵo. Nu, verŝajne temas pri tio, ke la skoteco de la dialoga lingvaĵo ne povis esti adekvate interpretita en Esperanto, kaj ankaŭ pri tio, ke mia koncepto de „angleco" verŝajne estas ia miksaĵo de angleco kaj skoteco.

Post tiu iom longa kritiko – kiu fakte estas nura personaĵo – mi tamen rekonu, ke *Skota Antologio* estas libro tre ĝuinda kun fidinda nivelo.

La prozan parton (ĉ. 180 paĝoj) enkondukas fragmento el la *Kroniko de Skotlando* de J. *Bellenden* (16-a jarcento), kaj ĝin fermas la unua akto de teatraĵo de C. *Hanley* (kompreneble 20-a jarcento). Ŝajne la pli malnovaj pecoj de la proza sekcio impresas pli forte: al mi pleje plaĉis *Tordita Johana* de *Stevenson* kaj *La dometo en la arbaro* de Tobias George *Smollett*. Apartan mencion meritas la interesa eseeto de Sir Thomas *Urquhart: El „Logopandecteision, aŭ Antaŭparolo al la Universala Lingvo"*, kiu certe trovos intereson ĉe esperantistoj.

La poezia parto (ĉ 70 paĝoj) nepre ŝajnas pli kohera, ol la proza. (Pro tio mi demandas: ĉu ne estus pli utile kunfandi prozon kaj poezion?)

Kompreneble, ĝin regas Burns, kaj ne malprave. Lia poezio ege influis la postajn skotajn poetojn: eĉ *La rendevuo* de W. *Soutar* (1898–1943) sonas iel Burns-ece. Tamen, svarmas ankaŭ multaj vere individuaj voĉoj, kiel la spirsufoke fortimpresa James *Thomson* (ambaŭ: skotoj havis du poetojn kun la sama nomo – unu en la 18-a jarcento, alian en la 19-a), J. *Fergusson* kaj la frua geniulo W. *Dunbar*. Lia *Danco de la sep mortindaj pekoj* en la traduko de *Dinwoodie* estas ĉefverko de nia traduklitera turo.

La internacilingva literaturo multe riĉiĝis per *Skota Antologio*, eĉ se kiel *antologio* ĝi ne ŝajnas plene kontentiga. (Fakte, ĉu ĝi havas redaktoron? Mi vane serĉis lian nomon.) Tamen, kiel kolekto de altkvalitaj legaĵoj el la skota literaturo, ĝi estas senriproĉa: tion garantias la elitaj tradukistoj, kiel *Auld, Dinwoodie, Francis* kaj aliaj. Sed nepre mi bedaŭras, ke el la gaela lingvo estis tradukita nur sola peco . . .

V. *Benczik*

LEHEL

KOMPRESORA HEJMA FRIDUJO

HB 240 ***



HÜTÖGÉPGYÁR

Jászberény

Nova libroserio

En la nuna krucenigmo estas kaŝitaj tri titoloj de la nova libroserio konsistanta el kvar libroj. Ensendi sufiĉas nur la horizontalajn 1. kaj 118., kaj vertikalajn 1. kaj 97. La limdato estas: 1-a de aprilo 1979. Inter la solvintoj ni lotumos librojn.



Horizontale: 2. *Studaro traktanta la bazajn sciindaĵojn de nia movado (Redaktas: D-ro Detlev Blanke)* 19. Greka litero, la kvina en la alfabeto (laŭ originala pron.) 20. Voĉe komunikas 21. Frostoŝveloj 22. Organika ciankombinaĵo (R) 23. Meteorŝtono (R) 25. Eksplodilo pro amuzo (R) 26. Rilata al ano de gento loĝinta sur la teritorio de Bulgario 27. Japana poemformo (R) 28. Kvazaŭ sama (R) 30. La verkisto de Winnie-la-Pu 31. Parolo 32. Rifuĝejo 34. Vestaĵo de kavaleriano (R) 36. Simboloj de radono kaj aluminio 37. Sufikso kun o-finaĵo, esprimanta malgrandecon. 38. Instruanto (–o) 40. Vestaĵon purigis 42. Hispana, germana kaj Aŭstria aŭtoj 43. Internacie konata simbolo de nokaŭto 45. Malelspezema 45. Grasa (R) 47. Ŝtonereto 49. OE 60. Filo de Isaak 51. Maldika 53. Ankaŭ tia vortaro ekzistas 55. Tera nubo 57. Uterita 59. Forlaso de la lastaj silaboj de la vorto (R) 61. Produktu akran blekeskan bruon 62. Virnomo, origine signifas rokon 63. Angla nobelo 65. Grasa likvaĵo,. grava energioportanto (R) 66. Esti en ia sanstato (R) 67. Havigo de vivrimedoj 68. Difektigo de dentoj 69. Titolo en la islamaj landoj (R) 70. Membro 71. Purigi ĉambron 72. Teksto kun melodio 73. Epiteto de muzikinstrumento funkciigebla per aerpuŝo 74. Rifuzi komercajn rilatojn kun iu (R) 76. Branĉo de vintra sporto 78. Mezurunuon de la temperaturo 79. Nimfo de fontoj (R) 80. Simboloj de aluminio, fosforo kaj polonio 82. Kaposto (R) 83. Komparativa konjunkcio 85. Speciala vesto de juĝistoj (R) 87. Poeto de la fama poemo „La korvo" 88. Virnomo kaj nomo de malaltaj arbedoj 89. Greka litero 90. JAA 92. Malakcepti ion proponatan (R) 94. Tio de lingvoj okazis en Babilono (R) 96. PEM 97. Aŭdo . . . instrumetodo 99. Ŝtato en Afriko(–o) 101. Natrio, iridio kaj argono 102. Infanmensa homo 103. Rilata al magio, astrologio 105. Urbo apud Nilo (en E-o formo) 107. KKA 108. Opia kreskaĵo (R) 109. Tiu cezaro fariĝis viktimo de Bruto (en originala formo) 111. Grandulino(!) 113. Epiteto de la batalo de Vjetnama popolo 114. Tia estas la sinsekvo de la sezonoj. 116. Morale 117. Kunigado de haroj, pajlo, ktp.(–o) 118. *Verko de Frigyes Karinthy*

Vertikale: 1. *En tiu libro de Krilov la ĉefrolantoj estas bestoj* 2. La pensanta parto de la homo 3. Skeleto 4. Teatro de akrobatoj, klaŭnoj. 5. Ne la nia, ne la via 6. Slava popolo (R) 7. Sufikso por derivi parton de la tuto 8. Konforma al la ideo 9. Havigi al si ian rezulton de io (R) 10. Sanĝos la lokon 11. Piedhava trinkvazo (R) 12. Anigi al si fremdajn homgrupojn (R) 13. Argono, fosforo 14. Numeralo 15. Tirane traktadi (R) 16. Perforte irigi internen(–o) 17. Ofta demando por neado (2 vortoj 18. Larĝa kaj fortega trombo 23. Rilata al la antikva Ateno 24. Perforte igas ŝanĝi la lokon 27. Delikto de pruntedonanto de mono 29. Purigas per akvo 32. La unua viro 33. 33. Hudsona lutro 35. Voĉo de serpento 38. Disvolviĝi (R) 39. Stria rabobesto 41. Papera folieto 44. Trompi la edzon (R) 46. Eligi akran voĉon (R) 48. Sufikso montranta kolektivecon (+o) 50. Dentegojn de elefanto 51. Epiteto de klasika versfarado 52. Homforma skulptaĵo portanta balkonon 54. Alĝustigi ion por taŭgi funkciado 56. Movo por sin svingi antaŭen 57. Logigas 58. Ĉefa arterio 60. Bero populara en la gastronomio de mediteraneaj landoj 62. Malŝatata insekto turmentanta la homon per pikoj (R) 64. Konata hispana nomo de rivero (en multaj geografiaj nomoj) 67. Virina nomo 68. Manĝebla specio de ciprino 69. Komence tio estas granda 71. Iama rusa riĉulo (R) 72. Speco de planta lanugo (R) 73. Per tio ĉirkaŭprenas la geamantoj unu la alian 75. Muskaptilo viva (R) 77. Ilinio kaj fosforo 78. Koloro de nebulo 80. Amatino de Apolo 82. Rilata al la gambo 84. Nefakulo (R) 86. Futbalo kun ovalforma pilko (R) 88. Efektiva rezulto 89. Rubaĵon relokigi 91. Trompa en la geedza vivo 93. Direktante sian atenton al ies bono 95. Urbo en Alaska 96. Ŝalttabulo (R) 97. *Fantastika romano de Frigyes Karinthy* 98. Ne tiel 100. Ludi per korda instrumento 102. Rilata al „veturilo" de Noa 104. Internacie konata nomo de rajdkonkursoj (turf) 106. Oksigeno, litio, deŭterio 108. Aŭtoj el Peruo, Hispanio kaj Luksemburgio 110. Stano kaj argono 112. IKO 113. Angla kantformo (R) 115. Sufikso por esprimi kolektaĵon de samaj objektoj 117. Peter Peneter.

La ĝusta solvo de krucenigmo aperinta en Hungara Vivo 5a numero en 1978: La filoj de l' ŝtonkora homo (servo) El la „Verda Biblio" (Lajos Tárkony) Asocio (jaroj) Kvaropo. Libropremion gajnis Laimundas Abromas (Soveta Unio), Ladislav Prachař, (ČSSR), Jenő Nádor (Hungario).

* Ekzameno sen risko *

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Antaŭ nelonge Hungara Esperanto-Asocio eldonis malgrandan belan libron „25 jaroj" aŭ „Antologio de Belartaj Konkursoj". En la nuna numero la demandoj koncernas tiun antologion.

1. Bonvolu alsendi la titolon de la rakonto kiu gajnis unuan premion en la 1967-a jaro?

2. Kio estas la nomo de la ĉefheroo en la rakonto „La sekreto de la lernejestrino"?

3. Ni citas la unuan strofon de la poemo kiu gajnis unuan premion en la 1957-a jaro. Bonvolu alsendi la lastan strofon de la sama poemo!

„Ĉe l' bordo de l' rivero.
Ĉe l' bordo de l' rivero kaj senĝene
kuŝante sur la tero
la korpo svenas plene . . .
la pensoj flugas, flugas senrimene."

Esperantaj libroj el Hungario

G. Gárdonyi: **Sklavoj de Dio** *(Romano pri mezepoka vivo. 409 p.)* **Prezo: 10,80 ned. gld.**

F. Szilágyi: **Koko krias jam!** *(Fama originala novelaro. 200 p.)* **Prezo: 13,80 ned. gld.**

L. Tárkony: **De paĝo al paĝo** *(Eseoj pri la originala Esperanta literaturo. 121 p.)* **Prezo: 12,– ned. gld.**

Auld–Dinwoodie–Francis–Rossetti: **Kvaropo** *(Plej fama poemaro de la moderna Esperanta poezio. 252 p.* **Prezo: 18,– ned. gld.**

J. Baghy: **En maskobalo** *(Kvin intereskaptaj kaj facilflue legeblaj teatraĵetoj de la fama aŭtoro. 140 p.* **Prezo: 12,– ned. gld.**

Csiszár–Kalocsay: **6000 frazeologiaj esprimoj hungaraj-esperantaj** *(Frazeologio bone utiligebla ankaŭ por nehungaroj. 188 p.)* **Prezo: 13,20 ned. gld.**

Esperanta-Kamboĝa Vortaro *(La unua lernilo de Esperanto en tiu lingvo. 148 p.)* **Prezo: 18,– ned. gld.**

F. V. Dorno: **Aventuroj de L.R.M. Stultulof la X-a de Fuŝio – Levu la manojn!** *(Sprita satiro pri kretena reĝo, kaj krimkomedio okazanta dum Esperanto-kongreso. 140 p.)* **Prezo: 12,– ned. gld.**

E. Ady: **La morto de la ĉielarko** *(Poemoj kaj artikoloj de elstara hungara poeto kaj pensulo, plejparte en la traduko de K. Kalocsay. 90 p.)* **Prezo: 10,80 ned. gld.**

S. Szathmári: **Kain kaj Abel** *(Novelaro, kiu kompletigas la esperantlingvan verkaron de la elstara originalverkisto. 286 p.)* **Prezo: 16,50 ned. gld.**

Turista Kantaro *(58 kantoj tradiciaj kaj popolaj, ĉiuj kun muziknotoj. 84 p.)* **Prezo: 6,50 ned. gld.**

25 jaroj. Antologio de Belartaj Konkursoj 1951–1975 *(Tiu ĉi libro-redaktita de W. Auld kaj V. Benczik – enhavas la kremon de la premiitaj poemoj kaj prozaĵoj. 208 p.)* **Prezo: 13,80 ned. gld.**

F. Molnár: **La knaboj de Paŭlo-strato** *(Infanpsikologia romano de fama aŭtoro, konata unuavice kiel dramisto. 180 p.)* **Prezo: 13,80 ned. gld.**

M. Jókai: **La filoj de l' ŝtonkora homo** *(Teknike luksa bildrakonto, farita laŭ romantika romano. 64 p.)* **Prezo: 6,– ned. gld.**

I. Lejzerowicz: **el la „Verda Biblio"** *(Satiro pri la Esperanto-movado. 80 p.)* **Prezo: 8,10 ned. gld.**

Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado *(Studaro – redaktita de D. Blanke –, enhavanta la kremon de la ĝisnunaj tiukampaj esploroj. 226 p.)* **Prezo: 13,80 ned. gld.**

Ĉiuj libroj estas mendeblaj ĉe la Libroservo de UEA, ĉe aliaj libroservoj, aŭ rekte ĉe Hungara Esperanto-Asocio (H–1368 Budapest, Pf. 193). Esperantistoj en socialismaj landoj turnu sin al sia landa Esperanto-organizaĵo.

Korespondi deziras

Por bibliografio de sciencaj artikoloj en Eo, ĉiuspecaj periodaĵoj, revuoj, kolektivaj verkoj serĉataj de Edward *Wojtakowski*, PL–50–950 *Wroclaw 2*, PO. Kesto 312. – Muzikinstruistino Ljudmila *Severova* (33) serĉas geamikojn, SU–443000 *Kujbiŝev* Nova Sadovaja 295–20. – Laimius *Straŝnickas* (20) fraŭlo kol. diskojn, kolorbk, pm, revuojn, ktm. Certe respondas! SU–234–580 Litovio, *Alytus 3*, Topoliu 4–41. – Bogdan *Poznanski* (40) muzikinstruisto (fortepiano, gitaro, kontrabaso) en lernejo, interŝ. diskojn, bk, pm, koresp. pri ĵazo k ser. muziko, literaturo, poezio, pentrarto, kun geamikoj, HV-legantoj. PL–42–700 *Lubliniec* str. A. Mickieviĉ 36/1. – Binka T. *Ŝiŝkova* (23) pri turismo, foto, muziko, kino, novaĵoj de medicino, ktm, BG–7004 *Russe* ul. Pliska bl. Ĉerven vh. A pk. 19. – Sándor *Molnár* (28) fraŭlo kol. etikedojn de bierboteloj tutmonde, interŝ. kaj koresp. kun kolektantoj. H–4032 *Debrecen* Tanácsközt. str. 63. f. 2. – Nadeĵda *Malook* (25) inĝenierino de konstruado, pri teatro, muziko, SU–443 068 *Kujbiŝev* ul. Skljarenko 10–44. – Gelernantoj (13) kun diverslandaj gelernantoj, adr. s-ino Erzsébet *Fodor*, H–8200 *Veszprém* Wartha V. u. 4. – Kursanoj mezaĝaj kaj junaj kontaktiĝus kun ges-anoj ktm, adr. Laimundas *Abromas*, SU–234 432 Litovio, *p. Pilis 1* Jurbarko raj. – S-ino Lidija *Ŝpilko* (42) geografiisto en vulkanologia instituto, trovus geamikojn, kol. kolorbk, kor. serioze. SU–683000 *Petropavlovsk–Kamĉatskij*, pk. 46. – Kun seriozaj E-gvidantoj, ev. interŝ. infandesegnojn por ekspoz., Anatolo *Ivasenko* SU–350 000 *Krasnodar* centr. do vostrebov. – ankaŭ por gekomencantoj de 3 urbaj kursoj bezonas korespondantojn. – Zoja *Skvoreova* prez. de urba E-klubo serĉas korespondantojn por klubanoj – ev. ĝemel-grupon en Hungario, SU–443–001 *Kujbisev* Uljanovska 21–13. – Inĝ. Konstantin *Miŝin* ktm, pĉt, interŝ. monerojn, pm, bk, SU–198 215 *Leningrad* ul. 3. Internacionala, 36–55; Martta *Halonen* ktm, ĉefe kun virinoj, pri Esperanto, SF–87100 *Kajaani 10* Kauppakatu 44 C 27. – M. *Tŭmŭrtogoo* ktm, pri muziko, literaturo kaj sporto, inters. pm, bk, *Ulan-Bator* ŝ/ĥ 46–955, Mongolio. –

Cefredaktoro: **Vilmos Benczik.** * Responda redaktoro: **D-ro István Nagy.** Arta redaktoro: **Éva Farkas-Tatár.** * Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Péter András Rados, László Rieth, d-ro Mária Rózsa Szabó, Zsuzsa Varga-Haszonits** * Cefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pechán, Aurél Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** * Budapest, pk. 193. H—1368 Telefono: 141-078, 334-194. * Eldonas: **Hungara Esperanto-Asocio.** * Responda eldonisto: **Tibor Vaskó.** * Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K. H. I. 215—96—162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. * Abonprezo por jaro (ses numeroj) Ft 66,- - al eksterlando por unu jaro 78,- forintoj * Peranto al eksterlando: KULTURA, Budapest, P. O. B. 149. H—1389 Abonprezo por unu jaro (ses numeroj): 7,—Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. – 79-7050 Somogy megyei Nyomda Responda gvidanto: Béla Farkas, direktoro. * **Indexszám: 25 377 ISSN 0018—7704.**

Dum ekskurso,
ĉe sporto

en teo,

en limonado

Kun detalaj informoj ni estas je dispono de niaj klientoj
MIKÖV 1025, Budapest, XX., Nyári Pál u. 88. Pf. 75.
Telefon: 176–716, 573–088

Valoraj artobjektoj

porcelano de bona marko

stilmebloj

BÁV

Varojn aĉetitajn en la subaj vendejoj oni povas sendogane elporti el la lando

VI POVAS AĈETI EL GRANDA SORTIMENTO KONTRAŬ VALUTO INTERNACIE ŜANĜEBLA

Konsumturist



en niaj vendejoj en Budapesto:
I., Hess András tér 3.
VI., Népköztársaság útja 27. kaj 43.
Hotel Intercontinental – Hotel Gellért